

EL POPOLA CINIO

人民中國報道 5 · 1964





Ferbr

a Sunon Leviğantan

Foto de Huang Hiang

Popola Ĉinio 15-Jara

ĈINIO estas lando tre malnova en la mondo, sed ankaŭ lando en sia juneco.

La granda venko de la ĉina popola revolucio en 1949 reunigis ĉi tiun malnovan landon kun kulturo de kvin jarcentoj. La tri montegoj imperiismo, feŭdismo kaj burokratismo sur la ĉina popolo estis forigitaj. La ĉina popolo kiu konsistigas kvaronon de la tutmonda loĝantaro mastris jam siajn landon kaj sorton. Tio ne povas ne esti konsiderata kiel granda evento havanta profundan influon en la historio de la homaro.

La sukcesoj, atingitaj de la ĉina popolo dum la 15 jaroj, estas sennombraj, senprecedencaj en la historio, kaj ne imageblaj por nia antaŭa generacio eĉ en sonĝo.

Antaŭ ĉio, la ĉina popolo jam de tiu tempo liberiĝis de sklavigo, ne nur la sklavigo fare de imperiismo kaj eksteraj agresantoj, sed ankaŭ de tiu fare de la feŭdaj bienuloj, militaristoj kaj burokratoj. En Ĉinio realiĝis vera demokratio kaj libereco, kiuj estas ne nominalaj sed efektivaj por la plejmulto de la popolo.

La laboranta popolo de Ĉinio jam ne plu suferas malsaton kaj senlaborecon, nek la minacon de ambaŭ. Eĉ la seriozajn naturajn katastrofojn okazintajn antaŭ kelkaj jaroj oni jam venkis. Jaron post jaro oni vidas supreniĝon en la agrikultura produktado. Nun komenciĝas la aŭtuna rikolto. Verŝajne ni havos ankaŭ ĉijare relative bonan rikolton. Pasis nur kvin aŭ ses jaroj post la ĝenerala establiĝo de la kamparaj populaj komunumoj tra la lando, tamen solida fundamento jam estas metita por ili. Se ne ekzistus la sistemo de la Komunumo kiu per sia supereco donas la necesajn fortojn, estus neeblaj la rapida restarigo kaj disvolvado de agrikulturo.

Antaŭ 15 jaroj, en la malnova Ĉinio preskaŭ ne ekzistis moderna industrio escepte de kelkaj fabrikoj kiuj produktis konsumajn varojn kaj estis funkciigataj de imperiistoj. Nun la ĉina popolo konstruis jam sian sistemon de moderna industrio sin apogante komplete sur siaj propraj saĝo kaj laboroj. Tre granda disvolviĝo efektiviĝis ankaŭ en la aferoj de la surtera, enaera kaj surakva trafiko kaj komuniko. La malnova Ĉinio sian vivon tenis ĉiam per almozpetoj kaj pruntprenado al alilandoj. Nun Ĉinio jam estos baldaŭ lando sen ŝuldo al fremdlando. Tio ĉi ja estas fierinda por la ĉina popolo.

Centoj da milionoj da "malriĉaj infanoj", kiel nomitaj en la malnova Ĉinio, jam vizitis lernejojn. En la pasintaj 15 jaroj, centoj da altaj lernejoj jam edukis milionojn da kleraj laborantoj kun socialisma konscio. Ili estas konstruantoj de la nova Ĉinio kaj daŭrigantoj de la revolucio.


Plej granda ŝanĝiĝo dum la 15 jaroj okazis ne nur en la materia sfero, sed ankaŭ en la spirito de la homoj. Grandan familion en harmonia kunvivado formis la 650,000,000 popolanoj de 54 malsamaj nacioj unuiĝintaj ĉirkaŭ la Komunista Partio de Ĉinio. Por konstrui la grandan socialisman landon nun laboras sinforgese la laboristoj, kamparanoj kaj intelektuloj. Ili dediĉas sian tutan saĝon kaj forton al la konstruado de la patrolando "reciproke komparante, lernante unu de alia, klopodante por kuratingi la antaŭirantojn kaj helpante al la postiĝintaj" kaj tion rigardas kiel sian gloron kaj unikan vivcelon. Tiaj malbonoj kiaj egoismo kaj mallaboremo estas malestimataj de ĉiuj en nia lando.

Ĉiuj ĉi brilaj sukcesoj ne estas "miraklo" sed atingajoj per la revolucio sub la marksism-leninisma gvidado de la Komunista Partio de Ĉinio kaj prezidanto Maŭ Zedong.

Ĉu la revolucio haltis ĉi tie? Ne, la revolucio venkis kaj iras plu antaŭen. La ĉina popolo havas firman decidon kaj fidon por konduki ĝis la fina venko la revolucion en sia lando kaj ankaŭ sur la terglobo, kune kun la subpremataj popoloj de la mondo, alte tenante por ĉiam la ruĝan flagon de marksism-leninismo.

Malgraŭ ke la imperiistoj kaj ĉiuj reakciuloj rigardas popolan Ĉinion kiel dorno en la pupilo, ke la usona imperiismo eĉ opinias ke ĝi povas elimini la Ĉinan Popolan Respublikon el la monda mapo, vanaj montriĝos iliaj klopodoj. Kontraŭe al ilia deziro, popola Ĉinio plipotenciĝas de tago al tago. Estas neeble izoli Ĉinion disde la aliaj landoj kaj popoloj en la mondo. Niaj amikoj kaj kamaradoj troviĝas ĉie sur la terglobo. La ĉina popolo subtenas ĉiujn landojn kaj popolojn en ilia batalado por justeco. Ni ankaŭ dankas ĉiujn kiuj havas amikecon kaj bonintencion al la juna Ĉinio kaj donas al ĝi simpatian kaj subtenon.

Okaze de celebrado al la dekkvina datreveno de la naskiĝo de popola Ĉinio, kune ni krii kun ĝojo: Ĉiuj revoluciuloj unuiĝu kaj kune luktu por krei belan homan socion en la estonto.



Subtenon al la Vjetnama Popolo en Batalo kontraŭ la Usona Agreso!

LA 5-an de aŭgusto, 1964, usonaj mararmeaj aviadiloj lanĉis subitan atakon al la Vjetnama Demokratia Respubliko kaj bombadis sinsekve ĝiajn regionojn de Nghê An, Hon Gaj kaj Thanh Hoa. Tio estas nova krimago de Usono, kiu longe antaŭpreparis agresatakon al VDR. Antaŭ tio, la usona imperiismo jam plurfoje faris al ĝi armitajn provokojn.

La 30-an de julio la Uson-Nguyen-kliko sendis militŝipojn invadi la nordan teritorian maron de VDR, kanonis ĝiajn insulojn Hon Me kaj Hon Ngu.

La 1-an de aŭgusto, usonaj aviadiloj el Laoso invadis la VDR-an aeron, faligis bombojn kaj lanĉis raketojn.

La 2-an de aŭgusto, usonaj militŝipoj denove faris provokajn aktivadojn al VDR en ĝia maro, kiuj devigis la mararmeon de VDR kontraŭagi por sindefendo kaj peli ilin el ĝia teritoria maro. Profitante tiun okazon la usona registaro kreis sian fabelon de la tiel nomata Tonkin-golfa incidento.

La 5-an de aŭgusto, kreante la fabelon de la tiel nomata dua Tonkin-golfa incidento kiel pretekston, la usona registaro lanĉis subitan atakon al VDR.

Tiaj antaŭaranĝitaj agresaj paŝoj por atenci VDR-on vekis indignegon kaj protestojn de la tuta ĉina popolo.

La 6-an de aŭgusto, la Ĉina Popola Registaro publikigis solenan deklaron kiu montras ke la militfajro de agreso kontraŭ la Vjetnama Demokratia Respubliko estas farita de Usono. Pro tio ke Usono jam tiel agis, la Vjetnama Demokratia Respubliko gajnis la rajton batali kontraŭ agreso, kaj ĉiuj landoj de-

fendantaj la Ĝenevan Interkonsenton gajnis la rajton helpi al la Vjetnama Demokratia Respubliko en ĝia batalo kontraŭ agreso. La Vjetnama Demokratia Respubliko estas membro de la socialisma tendaro, kaj neniu socialisma lando povas sidi senfare dum ĝi estas agresata. La Vjetnama Demokratia Respubliko kaj Ĉinio estas najbaroj neapartigeble interdependantaj, kaj la vjetnama popolo estas gefratoj de la ĉina popolo. La agreso de Usono al la Vjetnama Demokratia Respubliko signifas agreson kontraŭ Ĉinio. La ĉina popolo absolute ne povas sidi indiferece sen doni helpon. La sanga ŝuldo de Usono al la vjetnama popolo nepre devas esti repagita. . . .


La soiena Deklaro de la Ĉina Registaro levis grandegan tajdon ĉe la ĉina popolo tra la tuta lando kontraŭ la armita agreso de la usona imperiismo al la Vjetnama Demokratia Respubliko. La popolo de multaj grandaj urboj, urbetoj, kamparoj kaj paŝtaj regionoj en Ĉinio okazigis unu post alia mitingojn kaj manifestaciojn. Nur en la kvin tagoj de la 7-a ĝis la 11-a de aŭgusto, la nombro de la personoj kiuj partoprenis tiujn mitingojn kaj manifestaciojn atingis jam 20,000,000. Ili esprimis siajn firman subtenon al la Deklaro de la Registaro, riproĉon al la usona imperiismo pro ĝiaj militaj provokoj, kaj gratulon al la vjetnamaj popolo kaj armeo pro ilia venko en la batalo kontraŭ la agreso, kaj deklaris ke la 650,000,000 popolanoj de Ĉinio ĉiuj estas ĉiam kun la vjetnamaj fratoj, kaj sin preparas por subteni per ĉiuj eblaj la vjetnaman popolon en la granda batalo kontraŭ la armita agreso de la usona imperiismo.

Usono Rompis la Ĝenevan Interkonsenton

LA 21-an de julio, 1954 kiam la unua Ĝeneva Konferenco atingis interkonsenton, la usona reprezentanto solene deklaris, ke la Usona Registaro ne uzos militajn fortojn aŭ minacojn por

atenci la Ĝenevan Interkonsenton. Sed faktoj en la pasintaj dek jaroj pruvis, ke ĝuste Usono mem rompis la Interkonsenton per armitaj fortoj.

En 1955 kiam la subskriboj sur la Ĝeneva Interkonsento ankoraŭ ne sekigis, la usona imperiismo jam establis SEATO-n (Traktato-Organizo de Sud-Orienta Azio), kaj metis arbitre Sud-Vjetnamion, Laoson kaj Kamboĝon sub la "protektion" de tiu milita bloko.



100,000 pekinanoj kunvenis la 10-an de aŭg. por subteni la vjetnaman popolon kontraŭ usona agreso.

Ĉinaj Esperantistoj Subtenas Vjetnaman Popolon

AL VJETNAMA PACDEFENDA ESPERANTISTA
ASOCIO 8. VIII. 1964

Karaj kamaradoj,

Al Vi kaj pere de Vi al la Registaro de la Vjetnama Demokratia Respubliko kaj al la tuta vjetnama popolo ni esprimas niajn plej fortan indignon kaj proteston kontraŭ la agresiva agado de la usona imperiismo kontraŭ via sankta patrio — la Vjetnama Demokratia Respubliko. Samtempe ni sendas plej korajn gratulojn pro via brila sukceso en la kontraŭbatalo al la usona imperiismo.

Ni firme subtenas la solenan deklaron de nia registaro je la 6-a de aŭgusto; ni firme staras ĉe via flanko kaj subtenas ĉiujn viajn justajn agadojn por oponi la agreson de la usona imperiismo kaj defendi vian patruon.

Ĉiuj klare vidas, ke la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj, kiuj trafis hontindan malvenkon en siaj krimaj aktivadoj en Sud-Vjetnamio agante kontraŭ la Ĝeneva Interkonsento, senhonte fabrikis mensogojn kaj faris provokajn atakojn al vi, spite de la opono de la tutmonda popolo, por sin savi el la senelira situacio. Ili freneze bombadis viajn limgardantajn militŝipojn, urbojn kaj vilaĝojn ĉe la marbordo kaj pereigis sen-

kulpajn popolanojn per barbara buĉado. Tiuj ĉi krimagoj estas evidente nur projektitaj paŝoj de la usonaj imperiistoj por pligrandigi militon. Antaŭ la klarvidaj okuloj de la tutmonda popolo, la usonaj imperiistoj ja neniel povos kaŝi sian krimagon de intenca disvastigo de la milito.

Ni kore sentas, ke la Vjetnama Demokratia Respubliko kaj nia patrio estas neapartigeble interdependaj najbaroj kaj la vjetnama popolo estas niaj gefratoj. La invado de la usona imperiismo al via lando signifas invadon al ni mem. Ni certe ne staros apude indiferece sen helpo al vi, ni nepre vin subtenos. La usona imperiismo nepre pagos por la sanga ŝuldo al la vjetnama popolo.

Ni avertas la usonan imperiismon: Tuj ĉesigu vian ludon de milita fajro, alie vi nepre forbrulos en la diabla katastrofo alportita de vi mem!

Ni estas esperantistoj, kaj ni uzos nian lingvon kiel batalilon por malkaŝi la monstrajn krimagojn de la usona imperiismo antaŭ la popolo de la tuta mondo, ke ili unuiĝu kaj ĝin faligu.

Ni firme kredas, ke la fina venko apartenos al la heroo vjetnama popolo.


ĈINA ESPERANTO-LIGO
REDAKCIO DE "EL POPOLA ĈINIO"

Samtempe, Usono tutforte bredas la pupan reĝimon en Sud-Vjetnamio praktikantan faŝistan regadon al ĝia popolo, kaj kuraĝigis la pupo-klikon rifuzi la justan proponon faritan de la Vjetnama Demokratia Respubliko laŭ la Ĝeneva Interkonsento por paca unuecigo de Vjetnamio per ĝenerala balotado en 1956, kaj tiel pelis la 30,000,000 popolanojn de Vjetnamio kunligitajn per sango kaj karno en profundan doloron de longtempa splititeco.

Usono ekspedis al Sud-Vjetnamio grandan nombron da militaj personoj, enportis en ĝin grandan kvanton da militaj ekipaĵoj kaj konstruigis multegon da militbazoj.

Usono ankaŭ instigis la pupo-klikon fari furiozan politikan persekuton al sia propra pacama popolo, kaj en la sama tempo, ĝi trejnigis, ekipis kaj komandis la pupan armeon de Sud-Vjetnamio el kelkaj dekmiloj da personoj por

fari sangan subpremado al ĝia popolo senarmila. Komence de 1961, Usono freneze klopodis plenumi la planon pri "Strategia Vilaĝo" en Sud-Vjetnamio kaj lanĉis la kriman "Specialan Militon" ne-proklamitan. Tio estas la krimagoj de la usonaj agresantoj en Sud-Vjetnamio dum la pasintaj dek jaroj. Ĝi kruele suferigis pli ol milionon da senkulpaj vjetnamoj per mortigo, torturado kaj malliberigo.



EN LA DEK KVIN JAROJ

LIN HAJ

ANTAŬ 15 jaroj, la ĉina popolo, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj prezidanto Maŭ Zedong, travivinte dum 28 jaroj malfacilajn batalojn, gajnis la finan venkon de la demokratia revolucio, kaj metis finon al sia duonfeŭdeco kaj duonkolonieco. Kaj de tiu tempo, la ĉina popolo jam mastras sian ŝtaton kaj komencis laŭ sia propra volo konstrui la novan Ĉinion riĉa kaj sendependa.

La Periodo de Ekonomia Restarigo

En la unuaj tri jaroj post la fondo de la nova Ĉinio (1950-1952), la ĉina popolo glate plenumis la taskon restarigi la nacian ekonomion, ebligis ke la produktado en industrio kaj agrokulturo atingis kaj superis la plej altan nivelon de la malnova Ĉinio. Dum ĉi tiu periodo, la Popola Registaro konfiskis ĉiujn burokratajn kapitalojn kaj starigis la ŝtatan ekonomion de socialismo; abolis ĉiujn privilegiojn de imperiismo en Ĉinio, likvidis ankaŭ ĝian ekspluatadon en ĉina ekonomio; unuecigis financajn sistemojn kaj stabiligis la prezojn kiuj ĉiam pli altiĝis dum la pasintaj 12 jaroj. Samtempe, oni ĝisfunde efektivigis la agraran reformon, disdonis sume ĉ. 700,000,000

muojn da tero al ĉ. 300,000,000 kamparanoj kiuj malhavis agrojn. Per bataloj kontraŭ korupto, malŝparo kaj burokratismo kaj kontraŭ subaĉeto, kontrabando, ŝtelo de ŝtata haveco kaj aliaj kontraŭleĝaj agoj, en la kapitalismaj industrio kaj komerco, forigis diversajn malpurarojn kaj venenojn postlasitajn de la malnova socio, kaj tiel starigis novajn morojn kaj kutimojn. Ĉe la vasta amaso de intelektuloj disvolviĝis la lernomovado por ideologia remuldo kaj pli altiĝis ilia politika konscio. En la sama tempo, per subpremado al kontraŭrevoluciuloj pro iliaj subfosaj agadoj kaj aliaj sociaj reformoj, oni malaperigis rabistojn, kanajlojn, publikulinojn, almozulojn, hazardludejojn kaj narkotajn venenajojn, farante la sociordon senprecedence bona kaj paca. La plenumiĝo de la restarigo de la nacia ekonomio kaj la venko de tiuj bataloj kreis necesajn kondiĉojn por la grandskala laŭplana konstruado ekonomia.

Tuj kiam venkis la ĉina revolucio, imperiismaj landoj estrataj de la usona imperiismo ekpraktikis la politikon de ekonomia blokado kaj embargado al Ĉinio. En 1950, la usona imperiismo lanĉis agresan militon kontraŭ Koreio kaj samtempe okupis la ĉinan teritorion — Tajvan kaj intencis etendi la flamojn de

la agresmilito de Koreio al Ĉinio, deziraĉis ekstermi la novan Ĉinion ĵus naskitan. Kune kun la korea popolo, la ĉina popolo venkis la usonan imperiismon en ĝia agresa milito, kaj defendis sian landon en socialisma konstruado kaj defendis la pacon de Azio kaj de la tuta mondo.

La Unua Kvinjara Plano

Ekde la jaro 1953, la nova Ĉinio eniris la konstruan periodon de la Unua Kvinjara Plano. En 1956, efektiviĝis la socialisma transformado en agrokulturo, metia produktado kaj kapitalismaj industrio kaj komerco, tiel ke la tiama kompleksa strukturo de ekonomio konsistanta el la sektoroj socialisma, kapitalisma kaj individua transiris al la unueca strukturo de socialisma ekonomio. La ŝtato kondukis paŝon post paŝo la kamparanaron al la vojo de komuna riĉiĝo trapasante la stadiojn de Interhempa Grupo, Elementa kaj Altgrada Agrokulturaj Kooperativoj. Koncerne la kapitalismajn industrion kaj komercon, ĝi alprenis la politikon de utiligo, limigo kaj transformo por ilia finfina ŝtatigo per diversaj formoj de ŝtata kapitalismo. Post realigo de la altgrada formo de la ŝtata kapitalismo, nome la kuna administrado ŝtata-privata oni donas al la kapitalistoj fiksitajn jaran interezon por difinitaj jaroj kaj havigis al ili taŭgajn laborojn. Dank' al praktikado de serio da ĝustaj politikoj en la socialisma transformado, oni bezonis nur malpli ol 7 jarojn post la fondo de la popola Respubliko por plenumi la malfacilan kaj kompleksan taskon de transformado de posedosistemo de produktorimedoj.

En 1957, la Unua Kvinjara Plano superplenumiĝis. Dum la periodo de la Unua Kvinjara Plano, la suma industria produktovaloro de la nova Ĉinio kreskis je 141%, kaj tiu de agrokulturo je 25%. Okulfrape altiĝis la industria nivelo de Ĉinio. Plifortiĝis la antaŭaj industriaj branĉoj, kaj establiĝis multaj novaj industriaj branĉoj de aeroplano, aŭtomobilo, novtipa ilmaŝino, elektroproduktaj kaj minekspluataj ekipaĵoj, altgrada alojŝtalo k.c..

Antaŭdata Plenumiĝo de la Dua Kvinjara Plano

En la pasinteco, Ĉinio estis lando malriĉa kaj postiĝinta, kiu suferis dum longa tempo imperiisman agreson. La ĉina popolo forte deziras rapidigi la socialisman konstruadon, kaj liberigon el la postiĝinteco kiun la historio trudis al ĝi. En 1958, la Komunista Partio de Ĉinio elmetis la Ĝeneralan Linion de Socialisma Konstruado: streĉi plene la energion kaj strebi ĉiam supren por multe, rapide, bone, ŝpare konstrui socialismon, kiu ĝuste spegulas la fortan deziron de la vasta popolamaso. Sub instigado de la Ĝenerala Linio, estiĝis en 1958 la Granda Antaŭensalto en la nacia ekonomio kaj efektiviĝis la popolkomunumigo en la kamparo tra la lando. La

ĉefaj industriaj celajoj de la Dua Kvinjara Plano (1958-1962) antaŭdate plenumiĝis en nur du jaroj. En la periodo de la Unua Kvinjara Plano, estis nur 413 grand- kaj mezgrandtipaj industriaj entreprenoj kiujn Ĉinio projektis kaj ekipis, sed en la periodo de la Dua Kvinjara Plano la nombro atingis 1013. La proporcio de maŝinoj kaj ekipaĵoj provizitaj de Ĉinio mem altiĝis ĝis 85%, dum tiu de la Unua Kvinjara Plano estis nur 55%. La proporcio de ŝtalaj produktoj provizitaj de Ĉinio multiĝis de 75% ĝis 90%. Ĉe la jarfino de 1962, la nombro de diversaj sciencaj kaj teknikaj laborantoj pliiĝis je 70% kompare kun tiu en 1957. Krome konstruiĝis en la periodo de la Dua Kvinjara Plano granda nombro da akvoutiligaj establaĵoj. Ĉio ĉi metis la primaran fundamenton por konstrui en Ĉinio memstaran kompletan kaj modernan sistemon de ekonomio.

Supervenko de la Portempaj Malfacilaĵoj

Ekde 1959, Ĉinion trafis, en 3 sinsekvaj jaroj, naturaj katastrofoj de superakvego kaj sekegeco kaj faris al ĝia ekonomio gravajn damaĝojn. Sed la ĉina popolo ne estis terurita de la portempa malhelpo dum sia antaŭenmarŝado kaj venkis la malfacilon sub la gvido de la Popola Registaro pli rapide ol ĝenerale taksite dank' al ĝia unueco kaj solidareco. La fondo de la Popola Komunumo kaj la potenca materia fundamento starigita dum la Antaŭensaltego ludis gravan rolon en la luktado por venki la malfacilaĵojn. La imperiistoj kaj ĝiaj lakeoj ĝojis pro la malfacilaĵoj de la nova Ĉinio esperante ke la ĉina popolo estos prempereigita de la malfacilaĵoj kaj per diversaj subfosaj aktivadoj klopodis pezigi la malfacilojn. Sed ilia espero krevis jam kiel sapoveziko. Nun la ekonomia stato de Ĉinio pliboniĝas de jaro al jaro kaj jam aperis ĉiuflanka boniĝo. Ekzemple, en la sfero de industrio, Ĉinio jam povas mem projekti multe da grandtipaj, modernaj industriaj entreprenoj, inkluzive de ŝtalfera uzino, karbominejo kaj oleorafinejo, kun jarprodukto de milionaj tunoj, hidroelektra centralo kun kapacito de pli ol 600,000 kilovatoj, kemisterka fabriko kun jarprodukto de 100,000 tunoj. Kaj en la sfero de agrokulturo, ĝis la jaro 1963, sume konstruiĝis en la lando pli ol cent grandtipaj akvorezervejoj, ĉiu kun kapacito de pli ol 100,000,000 kubmetroj, konstruiĝis pli ol 3800 irigaciaj distriktoj, kun po akvuma areo de pli ol 10,000 muoj, kaj dekmiloj kaj dekmiloj da etaj akvorezervejoj, akvokondukejoj, mekanikaj dren-irigaciaj stacioj k.s. prikalkulataj. Sekve de la senĉesa plifirmiĝo de la popolkomunumo kaj dank' al plifortigo de la subtenado de la industrio al la agrokulturo, nova prosperiĝo de tiu ĉi lasta ekaperis en Ĉinio.

En la pasintaj dek kvin jaroj, ankaŭ la scienca kaj kultura aferoj en la nova Ĉinio atingis grandan sukceson. Ekzemple, koncerne al la alta edukado de la malnova Ĉinio, diplomitoj el la altlernejoj dum la dudek jaroj de 1928 ĝis 1947, sin nombris je

185,000 personoj, sed tiuj en la jaro 1963 sola jam atingis 200,000. La Ĉina Akademio de Sciencoj jam havas sub si ĉ. cent esplorajn organizojn. Granda disvolviĝo estis ankaŭ en la saniga kaj sporta aferoj. Nun reto de kuracaj kaj sanigaj organizoj jam formiĝis en plejparto de la urboj kaj vilaĝoj en Ĉinio. Ni prenu kiel ekzemplon nur la jaron 1962, la nombro de kuracejoj kaj sanigejoj jam atingis pli ol 197,000, t.e. pli ol 250-oble kreskis en komparo kun tiu de 1949. En literaturo kaj arto, estiĝis disflorado kaj prosperiĝo neniam vidita en la historio de Ĉinio.

Luktado por Paco kaj Progreso

La dek kvin jaroj depost la fondo de la nova Ĉinio estas rimarkinda jararo dum kiu la ĉina popolo konstante kaj sensanceliĝe luktis por mondpaco kaj homa progreso. La Ĉina Popola Respubliko estis iniciatinto de la Kvin Principoj por Paca Kunekzisto, ĉiam persistas en la diritaj principoj kaj la Spirito de Bandung, kaj faris sian gravan kontribuon por defendi la pacon de Azio kaj de la mondo. Ĉinio jam starigis, ĝis aŭgusto de la kuranta jaro, diplomatajn rilatojn kun 47 landoj, subskribis kun multaj aziaj kaj afrikaj landoj traktatojn de amikeco kaj neinteragreso aŭ de paco kaj amikeco, kaj kontentige solvis la landlimajn problemojn kun Birmo, Nepalo kaj aliaj najbaraj landoj, aparte kontraktis kun la Mongola Popola Respubliko, Afganio, Pakistano landlimajn traktaton kaj interkonsenton.

En la dek kvin jaroj, la ĉina popolo konstante protektis la unuecon kaj kunlaboradon de la socialismaj landoj, oponis la imperiismajn politikojn de agreso kaj milito, firme subtenis la batalojn por liberigo de ĉiuj popoloj en la mondo, firme subtenis la luktojn de la popoloj en Azio, Afriko kaj Latinameriko kontraŭ imperiismo kaj por nacia sendependeco, demokratio kaj libereco, firme subtenis la mondpacan movadon kaj ĉiujn justajn batalojn de la popoloj en ĉiuj landoj. Ĝi rigardis tiujn batalojn kiel subtenadon al ĝia propra afero de revolucio kaj konstruado kaj sian subtenadon al tiuj bataloj kiel sian sanktan devon internacian.

La popolo de Ĉinio persistos por ĉiam ĉe tiuj ĉi gvidaj principoj kaj luktos por prosperiĝo kaj potenciĝo de la nova Ĉinio, por eterna mondpaco kaj bela estonto de la homaro.

“Dajno”, knabino el ĝingpo-nacio de sudokcidenta Ĉinio, estas fidela en sia amo; sed la lokaj feŭdaj fortoj per insidoj malhelpas kaj devigas ŝin edziniĝi al alia persono. Ŝi kuraĝe liberigas sin el la persekuto kaj aliĝas al la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Fine ŝi reiras al la monto Ĝingpo kie ŝi laboras por la demokratia transformado kaj sukcese renversas la feŭdan regadon kaj establas demokratian reĝimon. La foto reprezentas scenon de la opero.

Foto de Huang Hiangkun



La pekina opero “La Ruĝa Lampo” temas pri fervojista familio de tri generacioj kiu persistas en revolucia batalo. La foto montras malcedemajn kaj sentimajn geheroojn Li Juhe

LA PEKINA OP





(maldekstre, rolita de la fama aktoro Li Ŝaŭĉun), lia patrino (dekstre, rolita de Gaŭ Jukian) kaj Tiemej, lia filino (meze, antaŭ la martiriĝo de li kaj lia patrino.
Foto de Zoŭ Giandong

ERO RENOVIGAS

HONFAN



NOVA FESTIVALO DE LA PEKINA OPERO

Ĉiu pekinano povas senti ke la somero de 1964 estas sezono de revolucio en la Pekina Opero La Festivalo de la Pekina Opero pri Nuntempaj Temoj, kiu daŭris de la komenco de junio ĝis la fino de julio, faris sensacion al la tuta publiko de la ĉefurbo. En tiu festivalo partoprenis 26 pekinoperaj trupoj el 19 provincoj, provinc-nivelaj urboj kaj aŭtonomaj aŭtonomaj regionoj. Dum la dekoj da tagoj, ili ludis 182 fojojn de 36 modernaj teatraĵoj de la Pekina Opero, kiuj altiris spektantojn je 229,300 personfojoj. La prezentadon partoprenis ankaŭ la famaj geaktoroj, nome Ma Lianliang, Li Ŝaŭĉun, Juan Ŝihaj, Gaŭ Janhia, Tong Ĝiling k.a., la veteranaj aktoroj de la Pekina Opero, kiaj Ĝoŭ Hinfang, Ju Ĝenfej k.a. persone donis konsilojn al geaktoroj en iliaj provludoj. La prezentado akiris senprecedencan sukceson, kaj markis komenciĝon de nova etapo en la disvolviĝo de la pekinopera arto en nia lando.

NOVA VIVO DE LA MALNOVA OPERARTO

La Pekina Opero, tiu tradicia speco de opero havanta historion de preskaŭ 200 jaroj, same kiel multaj aliaj operoj, ricevis novan vivon post la Liberiĝo de Ĉinio.

En 1950, la dua jaro post la Liberiĝo, la Registaro difinis jam la orientilon por la opera arto "Floru kune cent floroj, evoluigu novon el malnovo". Laŭ tiu orientilo, oni devas unuflanke revizii kaj reformi laŭ la vidpunkto de historia materiismo la malnovan tradician repertuaron kaj verki novajn instruajn teatraĵojn de historiaj temoj, kaj aliflanke oni devas adapti tiujn specojn de operoj por reprezenti la nuntempan vivon kaj speguli la aktualajn luktojn en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado por servi plibone al la socialisma socio.

En la pasintaj dekelkaj jaroj, la ĉinaj teatraj laborantoj, sub la gvido de la Partio kaj la Registaro, faris multajn laborojn en la reviziado kaj reformado de la Pekina Opero kaj malkovris multajn bonegajn teatraĵojn preskaŭ perdiĝintajn kaj faris prilaboron al multaj operoj.

La operludantoj kiuj vagis senlabore sur stratoj en la pasinteco, denove sin organizis, revenis sur la scenejon kaj ricevis altan pritakson kaj prizorgon de la ŝtato. Establiĝis la eduka fako de operarto preskaŭ ne ekzistinta antaŭe, en Pekino kaj aliaj urboj fondiĝis operlernejoj, pligrandiĝis jaron post jaro la nombro de la profesiaj operaj artistoj kaj laborantoj.

Ankaŭ en la pasinteco oni faris klopodojn por reprezenti la nuntempan vivon per la Pekina Opero. Ekzemple, s-ro Mej Lanfang, la fama majstro de la Pekina Opero, tion provis antaŭ tridek jaroj, sed pro malhelpado de la reakciaj fortoj en la malnova socio, tia reformado ne povis atingi sukceson. Post la Liberiĝo, diverslokaj laborantoj de la Pekina Opero faris novajn provojn, kaj inter ili, la pekinopera "Blankhara Knabino" atingis relative sukceson. Tia

provado multe pli rapide disvolviĝis en la lastaj du jaroj.

MODERNIGO KAJ REVOLUCIIGO

Tamen por tia malnova speco de teatraĵo kia la Pekina Opero, estas neeble kontentigi la postulon de la nova epoko kaj de la nova rigardantaro, kaj ludisian rolon servi al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, se oni nur faras al ĝi reviziadon kaj plibonigon, nur forkribras el ĝi la elementojn propagandantajn feŭdan superstiĉon, kaj nur faras iom da provoj por reprezenti la nuntempan vivon. Kvankam multaj bonegaj tradiciaj operoj estas en la Pekina Opero, kiuj prikantas la laboremon, kuraĝecon kaj maltimon al tiranoj, prezentas la kontraŭbatalojn de la subprematoj en la ĉina historio, priskribas la sinceran amon de multaj gejunuloj, tamen tiuj operoj estas limigitaj nur en la historia temaro. La personoj en ili estas regnestroj, ŝtatoficistoj kaj generaloj aŭ belulinoj kaj geniaj kleruloj de feŭda socio. Iliaj enhavoj temas pri problemoj de la feŭda socio. Tiuj personoj kaj temoj, eĉ se ili havis siatempe progresan signifon taksite laŭ la historia vidpunkto, tamen ili estas nur malnovaj restaĵoj postlasitaj for de la epoko kaj neniel akordiĝas kun la penso, sento, deziro kaj espero de la ĉina popolo en la epoko de socialismo, por ne paroli pri edukado per ili al la popolo pri batalado kontraŭ imperiismo, feŭdismo kaj burĝa ideologio.

Post kiam en Ĉinio okazis la Novdemokratia Revolucio kaj tuj sekve la socialisma revolucio,

fundamenta ŝanĝiĝo prenis lokon en la socia sistemo. Literaturo kaj arto devas speguli la epokon. Kaj la Pekina Opero kiel arto, kiel superstrukturo de la socio nepre devas sin adapti al la postulo de la disvolviĝo de la socio kaj suriri la vojon de modernigo kaj revoluciigo. Tia estas la postulo de la kultura revolucio de la socialisma epoko al la arto de la Pekina Opero, kaj samtempe, tio estas ankaŭ la neevitebla vojo en ĝia evoluado.

Ĉar la Pekina Opero jam formis dum longtempa evoluado siajn fiksitajn formulojn de prezentado, muziko kaj danco surbaze de la reala vivo de la antikvuloj, tial oni dubis ĉu la Pekina Opero havus kapablon prezenti la nuntempan vivon. Oni ankaŭ timis, ke la arta formo de la Pekina Opero neeviteble detruigiĝos kaj ĝia tradicia karakterizaĵo tute perdiĝos, se tia reformo okazos.

KOMENCO SUKCESA

La prezentado de pekinaj operoj kun modernaj temoj dum pli ol unu monato per faktoj respondis al tiuj homoj kiuj dubis kaj maltrankviliĝis pri la modernigo de la Pekina Opero.

Multaj el la luditaj operoj atingis tre bonan sukceson. Ili kreis multe da brilaj heroaj figuroj sur la scenejo, aldonis novajn kreaĵojn al la ludarto, heredante kaj disvolvante la specialaĵojn de la pekinopera arto.

Koncerne la temojn de la luditaj 36 pekinaj operoj, iuj el ili spegulas la socialisman revolucion



Longmej (dekstre) kaj Juĵong (maldekstre), mongolaj junaj heroinoj en la pekina opero "Heroaj Fratinoj sur la Stepo" kiu rakontas pri ilia luktado kontraŭ neĝventego por protekti la ŝafaron.

Foto de Ĉen Gĵuanmej

“Kukol-monto” prezentas heroan armitan batalon de spontanea revolucia taĉmento de kamparanoj kontraŭ la reakciaj benuloj, kiu fine venkis sub la gvidado de la Komunista Partio de Ĉinio. Jen la taĉmento antaŭen marŝas sub la ruĝa flago.

Foto de Ĝang Jinhua



kaj socialisman konstruadon, aliaj la historion de revoluciaj bataloj kaj la luktan vivon de la popolamaso, triaj la realan vivon de la nacimalplimulto kaj kvaraj la bataladon por defendi la hejmlandon kaj helpi Koreion kontraŭ la usona agreso. La herooj en tiuj operoj ne plu estas regnestroj, altrangaj generaloj kaj ŝtatoficistoj sed estas nuntempaj laboristoj, kamparanoj, junulaj intelektuloj kaj revoluciaj soldatoj. La rigardantaro povas vidi kaj la gloran sed malfacilan vojon kiun la revolucio trapasis kaj la novan fizionomion de la socialisma konstruado. Tiamaniere la aprezantoj de la nuna Pekina Opero ne plu estas tiaj operamantoj en la pasinteco kiuj orel-ĝuis la prezentadon kun fermitaj okuloj fingrosekvante la takton sur la tablo, sed samklasaj fratoj havantaj la komunajn senton kaj ideon kun la herooj, tial la Pekina Opero fariĝas pli kortuŝa kaj efektiva.

Koncerne al la teatrarto, oni povas vidi el la ludado de la modernaj pekinaj operoj, tradiciajn kaj nove kreitajn formulojn de prezentado.

Oni utiligas ĝiajn malnovajn tradiciajn formulojn ne per simpla imitado aŭ transpreno sed konforme al la postuloj de la nuntempa vivo. Ekzemple, en kantmaniero, heredante la tradiciajn ariojn por la modernaj operoj oni ilin rearanĝis laŭ la postulo de la intrigo kaj la spirita fizionomio de la nuntempuloj tiel ke iliaj ritmo, intenseco ktp. taŭgu por prezenti la sentojn kaj animstaton de la nuntempuloj. Krome, ankaŭ la akrobata interbatado en la tradiciaj pekinaj operoj multe ŝatata de la spektantoj estas konservita kaj eĉ disvolvita en la modernaj operoj. Heredante la tradician akrobataĵon karakterizitan per rapideco, precizeco kaj eleganteco oni faris ĝin taŭga por prezenti la nuntempajn batalmovojn.


La nove kreitaj prezentaj formuloj ĉarmas kvazaŭ buntaj kaj abundaj floroj. Kvankam kelkaj el ili restas ankoraŭ en la stadio de eksperimentado, tamen

multaj jam estas aprobe akceptitaj de la publiko kaj eĉ la fakuloj. Ĉar ili estas kreitaj ne nur konforme al la moderna vivo sed ankaŭ surbaze de la reguloj de la tradicia ludarto de la Pekina Opero, konservante la karakterizajn trajtojn de tiu arto. Ekzemple, en la prononcado la moderna teatraĵo alprenis la prononcmankon de la moderna komuna lingvo bazita sur la pekina dialekto kaj nuligis la miksaĵon de aliaj dialektoj kaj antikvaj elparoloj. Tio neniam difektis la kantadon aŭ parolon en la operoj, sed ebligas al la spektantoj plibonon komprenon kaj aprezon. En la sfero de ĝia muziko, oni kondukis ankaŭ novajn provojn; kaj por reprezenti la homajn agojn en la nuntempa vivo, oni kreis novajn formulojn. Ĉio ĉi estas arta kreado kiu prenis la tradiciajn formulojn kiel sian bazon kaj ilin superis.

ŜATATA DE ĈIUJ

La pli-ol-monata prezentado de la modernaj pekinaj operoj en la ĉefurbo vekis tiel grandan intereson ĉe la publiko, ke ĉiuj deziregas rigardi ĝin. La biletoj por ĉiuj prezentadoj tuj elĉerpiĝis post ekvendo. Ne nur la malnovaj amantoj de la Pekina Opero sed ankaŭ tiuj kiuj malofte vizitis pekinoperan teatron en la pasinteco fariĝis fervoraj rigardantoj. Plej ofte aŭdiĝis la jenaj komentoj el la rigardantaro: “Tio vere estas Pekina Opero kun moderna temo”, tio signifas ke ĝi kontentigis jam ilian postulon ĝui la pekinoperan arton kaj samtempe plenumis ilian deziron ke la teatraĵo spegulu la nuntempan vivon en servo al la socialisma socio.

En la pasintaj dekkelkaj jaroj, la ĉinaj laborantoj de la Pekina Opero multe klopodis farante ripetajn provojn en ludo de operoj kun modernaj temoj. Nun, el tiuj penadoj jam elkreskis la unuaj brilaj floroj. Alvenis ja nova printempo de la pekinopera arto.



Laboristino de la Tria Radio-Fabriko de Ŝanhajo kontrolas duonkondukilajn radioricevilojn ĵus faritajn.

Foto de Gu Songnian

PLEJ GRAVAS LA KVALITO

JANGĈENG

AŬDINTE, ke ĉirkaŭ 80 elcentoj de la industriaj produktaĵoj de Ŝanhajo atingis avangardan nivelon de la tuta Ĉinio, mi vizitis kelkajn fabrikojn en Ŝanhajo kun admiro por malkaŝi la "sekretan" de ilia sukceso.

Kial "Libera je Kontrolo"?

En Hinhua-a mentolofabriko mi informiĝis pri kortuŝa okazaĵo. Tiu fabriko ricevis mendon pri eŭkalipt-oleo, kaj laŭ la kontrakto la ĥemia pureco de tiu produktaĵo devas esti pli ol 90%. Elfabrikite, ĝia ĥemia pureco montriĝis ĝuste 90%. Ĉu ĝi estis laŭnorma? Iuj opiniis, ke ĝi fundamente konformas al la postulo de la kontrakto kaj oni jam povas ĝin liveri al la mendinto. Tiam ankaŭ la lasta konsentis ĝin akcepti. Sed plejparto el la laboristoj kaj oficistoj de la fabriko havis alian opinion. "Ja ekzistas diferenco inter la 90% kaj la pli ol 90%," ili diris. "Estas absolute ne permeseble al nia socialisma entrepreno malaltigi la normon de kvalito." Fine, ĉiuj en la fabriko unuanime decidis denove ĝin prilabori kaj faris ĝin plene konforma al la kontrakto. Ĉar ili traktas sian laboron tre serioze kaj starigis por si perfektan sistemon por garantii la kvaliton de siaj produktaĵoj, tial ili ĝuas, laŭ la permeso de la kontrola oficejo, la honoron esti "libera je kontrolo".

La Tuta Lando kaj la Tuta Mondo

Preskaŭ en ĉiu fabriko, kiun mi vizitis, okulfrapis afiŝoj kaj propagandaj tabuloj sur kiuj oni montris la

eminentajn normojn atingitajn en tekniko kaj produktokosto de aliaj fabrikoj samspecaj en kaj ekster Ĉinio kompare kun tiu de ilia fabriko. Ĉiu sekcio kaj grupo en la fabrikoj havas sian planon por laŭgrade plialtigi la produktokvaliton kaj ĉie bolas entuziasmo kuratingi la avangardajn nivelojn. Oni rigardas plialtigon de la kvalito de siaj produktaĵoj kiel fidelan praktikon de la ĝenerala linio por socialisma konstruado, kaj unuaklasigon de ili kiel konkretan paŝon por atingi la plej altan internacian nivelon.

La Ŝanhaja Tianĉu-fabriko de Bongustiga Esenco havas la plej longan historion inter ĉiuj tiaj fabrikoj en Ĉinio, kaj la bongustiga pulvoro de ĝi produktita kun fabrikmarko "Tianĉu" (Ĉiela Kuirado) estas ŝatata tra la tuta lando kaj havas multajn klientojn ankaŭ eksterlande. Sed la laboristoj de tiu fabriko tute ne kontentiĝis pro tio. Kiam ili informiĝis ke la Tiangin-a Fabriko de Bongustiga Esenco en norda Ĉinio akiris grandan sukceson en plibonigo de produktokvalito dum la lastaj jaroj, ili tuj sendis al Tiangin por lerni ĝiajn spertojn; krom tio ili ankaŭ kolektis el fremdlandoj specimenojn de plej bonaj bongustigaj pulvoroj por fari analizon, kaj starigis al si la taskon, ke en ĉiuj detaloj la produktokvalito atingu la mondan nivelon. De tiam ili ĉiusemajne okazigis kunvenon en kiu partoprenis veteranaj laboristoj, teknikistoj kaj gvidantaj funkciuloj por fari taŭgajn aranĝojn por efektiviĝi sian planon. Dank'

al tiuj klopodoj iliaj fabrikoj faris grandan salton en kvalito kaj atingis la nivelon internacian.

Strebi al la Unua Klaso

La Tria Radio-Fabriko de Ŝanhajo naskiĝis antaŭ kvar jaroj rezulte de kombino de koton-ŝpinejo kaj fabriko de malgrandtipaj elektraĵoj. Nun ĝia produktaĵo kun fabrikmarko "Meiduo" jam fariĝis famkonata tra la tuta lando. Nelonge post ĝia funkciado la laboristoj sur sia nova posteno jam kapablis fabriki radiaparatojn dank' al pena lernado pri tekniko. En la jaro 1962 okazis en Ŝanhajo kvalito-konkurso de radiaparatoj, en kiu oni faris, per diversaj provoj, komparadon inter la produktaĵoj de ĉiuj fabrikoj. Kvankam en diversaj provoj la "Meiduo"-radiaparato montriĝis sufiĉe bona, tamen dum la provado de skuado oni trovis, ke iuj el ĝiaj partoj estas ne sufiĉe firmaj. Tiam iuj el aliaj fabrikoj opiniis, ke ĝi povas esti juĝata kiel duaklasa. Sed ĝiaj produktantoj opiniis, ke ĝi povas esti nur triaklasa. Ili malvenkis en la konkurso, sed tio instigis ilin al pli energia laboro. Ili starigis por si pli altan celon, ke ne nur ĉiu parto estu unuaranga sed ankaŭ la kvalito de ĉiu radiaparato kontentigu la postulojn de la aĉetantoj. Por atingi tiun celon ili fojon post fojo plibonigis la strukturon de la radiaparato, kaj starigis severan regularon por kontroli la produktokvaliton. Krome, ili ankaŭ pretigis serion da kartoj en kiuj estis registritaj la nomoj, adresoj kaj aliaj notoj de aĉetantoj, kaj per tio regule kolektadis de ili kritikojn kaj opiniojn pri iliaj fabrikoj. Dank' al ĉio ĉi tio, la "Meiduo"-radiaparato pli kaj pli progresis en kvalito kaj finfine estis juĝata kiel unuaranga produktaĵo dum la tutlanda kvalitokonkurso de radiaparatoj en la unua duono de 1963.

La Lasta Demando

Antaŭ mia vizito al Ŝanhajo iuj diris al mi, ke la brila sukceso de la ŝanhaja industrio estas atingita dank' al bonaj ekipaĵoj kaj granda investo. Ĉu vere? Kun tiu demando mi vizitis la respondeculojn de koncerna gvidanta institucio en Ŝanhajo. De ili mi informiĝis, ke post la Liberiĝo la nombro de importitaj ekipaĵoj liveritaj de la ŝtato al Ŝanhajo estas nur iom pli ol mil, inter kiuj troviĝas nur malmulte da altklasaj kaj precizaj, kaj tiu kvanto estas malpli granda ol tiu liverita al iu ajn alia industria urbo de Ĉinio, eĉ malpli ol tiu al granda entrepreno nove konstruita.

Antaŭ la Liberiĝo la ŝanhajaj laboristoj multe suferis de imperiistoj kaj reakciuloj kaj pro tio ĉiam ardas en iliaj koroj flamo de kolero kaj malamo kontraŭ la malamikoj, kaj el tio naskiĝis la granda forto, per kiu ili nun konstruas sian socialisman patrolandon. El la ekipaĵoj de la ŝanhaja industrio 70-80% estas malnovtipaj kaj instalitaj antaŭ du-tridek jaroj. La laboristoj ilin reformis kaj novigis kaj fabrikis per ili varojn unuaklasajn. Ekzemple, estas bezonata en ŝtalpremioj speco de altranga cilindro por laminatado de speciala ŝtalo. Se oni ilin aĉetus de eksterlando, por ĉiu el ili oni devus elspezi la monon egalan al la kosto de kvarcent porkoj, kaj krome oni devus atendi por longa tempo antaŭ ol ĝin ricevi. Aŭdinte pri tio, la laboristoj de la koncerna maŝin-fabriko firme postulis ke ili mem ĝin fabriku, kaj fine ili sukcesis.

La ŝanhajaj laboristoj havas konkretan ideon pri la principo "konstrui socialismon sin apogante sur siaj propraj fortoj". Koncerne al la tuta Ĉinio, oni devas sin apogi ĉefe sur la fortoj de sia propra lando; koncerne al Ŝanhajo, oni devas sin apogi ĉefe sur la fortoj de sia propra urbo; kaj la samo validas ankaŭ por ĉiu ajn fabriko. Neniu atendas, ke kuko mem falu el la ĉielo.

Nun, en nia lando, tiu spirito jam fariĝis granda movforto en industria konstruado kaj "Lernu de Ŝanhajo" uziĝas kiel devizo por la diverslokaj entreprenoj.



Bongustiga esenco produktita de Tianĉu-fabriko. Foto de Jang Putaŭ



La ĉina grimpisto sukcese atingis la pinton de la monto Ŝiŝa Pangma la 2-an de majo, 1964.

GANG GONGBI:

Konkero de la 14-a Plej Alta Monto Neniam Surgrimpa

ŜIŜA Pangma restis, ĝis antaŭ nelonge, virga montpinto sur kiu troviĝis neniu homa spuro. Sed en la 2-a de majo, 1964, je la 10-a horo kaj 20 minutoj, ĝi estis fine konkerita de ĉina montgrimpa ekspedicio. Tio estas alia nova sukceso atingita de ĉinaj grimpisto post surgrimpo de Ĝolmo Lungma en 1960.

Longe antaŭ ol la ĉina montgrimpa ekspedicio Tibeto de Ĉinio, nordokcidente de Ĝolmo Lungma. Oni diris, ke ĝia alteco estas 8013 metroj super mar-nivelo, sed ĉifoje la sciencaj laborantoj de la ĉina montgrimpisto konstatis per surloka mezurado, ke ĝi altas precize 8012 metrojn.

Kial Ŝiŝa Pangma longe restis virga montsupro? Ĉar ĝia suda flanko estas kvazaŭ tranĉita, kaj supre de la aliaj flankoj estas krutajoj altaj je centoj ĝis miloj da metroj. Nur ĉe la nordokcidenta flanko troviĝas multfenda glacirivero kun deklivo de 40-50 gradoj, kiu estas trairebla. La tiea klimato estas tiel

malbona ke ventas kaj neĝas dum plejparto de la jaro, kaj la bonvetera periodo pli mallongas ol tiu de Ĝolmo Lungma.

Ĝuste pro tio ĝin nomis iuj grimpisto el eksterlando la "Mistera Montsupro" aŭ "Nigra Virgulino".

Provado de la Ĉina Montgrimpa Ekspedicio

Longe antaŭ ol la ĉina montgrimpa ekspedicio eniris la montregionon de Ŝiŝa Pangma, jam komen-ciĝis la preparaj laboroj por trovi grimpan vojon k. c. Oni trifoje faris esploradon pri la monto ekde 1961 ĝis 1963. En marto de 1964, la ekspedicio unuafoje sendis sian taĉmenton de transporto al la kruta Ŝiŝa Pangma. Sur la vojo pli ol 5000 metrojn alta ili renkontis malfacilon: maldekstre estas montvalo profunda je centoj da metroj, alte staras mirinda arbaro de glaciaj rokegoj; dekstre troviĝas kruta rokodeklivo. Grandegaj rokoj postlasitaj de la glacirivero staras tiel malorde, ke oni devis ilin ĉirkaŭiri.

En la daŭro de pli ol unu monato, la transportistoj konstruis de 5300 ĝis 7700 metroj super la marnivelo ses kampadejojn kaj finis la preparadon.

Supren al la Kulmino

La 25-an de aprilo, bruis tamamado kaj tondris tamburado miksiĝante kun sonora kantado en la baza kampadejo de la grimpisto 5000 metrojn super la marnivelo. En ĝojkrioj kaj bondeziroj dek tri sturmantoj komencis sian grimpadon. Tiutage sur Ŝiŝa Pangma furiozis neĝvento, ĝisoste frosta. Ili devis fari grandan fortostreĉon por ĉiu paŝo. Post tritaga peniga grimrado, transpasinte la malglatan glaci-riĉon kaj glitigan krutan "glacituran barikadon" fine ili sin levis de la ĉefsidejo ĝis la 3-a kampadejo 6300 m. super la marnivelo.

En la tagmezo de la 1-a de majo, la grimpisto atingis la "sturmekampadejon" 7700 metrojn super la marnivelo. Oni decidis ke tri el ili restu tie pro sia malforteco, kaj aliaj dek anoj dividiĝis en tri kunligajn grupetojn por surgrimpi la kulminon.

La 2-an de majo, ili iris antaŭen plu. Kiam ili proksimiĝis al la alteco de 7800 metroj, baris al ili la vojon vastega glaci-deklivo. Supre de la deklivo estas monteĝo, malsupre valo pli ol cent metrojn profunda, kies kruteco estas super 50 gradoj. La sturmantoj devis ĝin transpasi. Por tion fari ŝtupetoj estis elskrapitaj sur la glacio. Sed ili iompostioe difektiĝis pro la ripeta frotado. Subite, Vang Fuĝoŭ,



La grimpisto transsaltas la fendegon en glaciejo 5800 m. super la marnivelo.
Foto de Jan Dongliang

kiu sukcese surgrimpis Ĝolmo Lungma, ruliĝis malsupren post kelktempa grimpirado. Ĉe la ekfalo li, havanta riĉan sperton, tuj donis la signalon "Protektu" kaj liaj samgrupanoj Ĉen San kaj Jun Deng tuj enpikis tutforte la glaciĉiĉojn en la glacian kaj firme tenis la ĉefŝnuron kiu ligiĝis kun la pioĉotenoj. Tial, Vang Fuĝoŭ haltis rulfalinte pli ol 20 metrojn. Post ioma ripozo li denove grimpis supren. Ili ĉiuj sukcesis transpasi la glaci-deklivon 20-metran en pli ol duonhoron.

Konkero de la Kulmino

Iom ripozinte kaj sin refreŝiginte per kunportata oksigeno la sturmantoj daŭrigis sian grimpadon al la kulmino. Antaŭ iliaj okuloj aperis neĝodeklivo de ĉ. 45 gradoj. Ĝin transgrimpite ili surpaŝis kreston en maldekstro kun neĝtavolo ĝisgenue dika.

"La kulmino! Jen ĝi!" ĝoje ekkriis la grimpisto, kiuj sin trovis nur ĉ. dek metrojn for de ĝi! Ili interkuraĝigis kaj interhelpis. Preterpasinte la fungoforman neĝblokegon, kaj transirinte neĝkovritan montkreston, ili venis al pli kaj pli vasta tereno, dum ĉiam pli vasta fariĝis la vidkampo. La dekopo fine suriris unu post alia ebene-tan elstarajon el neĝo kaj glacio — jen la kulmino!

Hodiaŭ, 4 jarojn post kiam ĉinaj montgrimpisto sukcese surgrimpis la montegon Ĝolmo Lungma, tiu ĉi pli ol 8000 metrojn alta giganto, kiun neniu en la mondo iam suriris, jam estas sub la piedoj de la ĉinaj sportistoj de montgrimrado.



Ĉinaj grimpisto sin levis ĝis la alteco de 7700 m. super la marnivelo.

Foto de Vang Ĝenghua

HIE KIGUJ:

Post la Dejoro

Finiĝis la dejoro.

*Kun ĝoja kaj malpeza koro
mi zumas per ario.*

Ho, patrio,

hodiaŭ je la finsekunda veno

ne vanis mia sturma peno;

promeso mia fariĝis flago ruĝkolora

kaj flirtas sur konkursbulteno, lok' honora.

Finiĝis la dejoro.

*Kun ĝoja kaj malpeza koro
mi zumas per gajkanto.*

*La kamentub-giganto
ankoraŭ altas en la koro,
ankoraŭ estas muĝeganta
la kanto de motoro.*

*Mi kvazaŭ aŭdas,
ke ĝia krio laŭtas:*

*Bravege, kamarado,
do bise la sturmadol!*

Jen hejme mi jam estas,

(sed enfabrike l' koro restas!)

kaj nova batalplano

elfluas el la pens-fontano. . .



AVO ŜERCEMULO

HUANG GINGIE

Ilustraĵoj de Haŭ Hongĝang

AVO ŝercemulo, sesdek-jara grasdika kaj malalta, estis jardungito ĉe bienulo dum jardekoj antaŭ la Liberiĝo. Kapabla fari laboron de ia ajn speco, li tamen restas solulo ĝis maljunaĝo. Li estas malkaŝema, sprita kaj ŝercema, tial la samvilaĝanoj lin kromnomas Avo Ŝercemulo. Post la Liberiĝo, li fariĝis ankoraŭ pli vigla en ludo de spritaĵoj kaj faro de laboroj. Nun li funkcias kiel bovbredisto de nia komunumo.

La tago, en kiu mi hejmenrevenis, estis la 29-a de la lasta monato en la luna jaro. Kiam mi pasis tra la pinarbetaro ĉe la montpiedo, subite ekaŭdiĝis gaja parolo: "Jen al vi! Dolĉaĵo, ha ha, he he! Vi ne volas akcepti? Mi eĉ domaĝus ĝin."

Ĉe tio mi rekonis la voĉon de Avo Ŝercemulo. Kun kiu li babilas tie en tiu horo de la jarfino? Sekvante la voĉon mi iris en la arbetaron. Mi vidis ke Avo Ŝercemulo kun fasko da drogherboj en la mano babilas kun sia bruto. La bovo ne volas preni la herbojn, skuante sian paron da kornegoj. Ha, li ŝercas eĉ kun bovo!

"Bonan tagon, Avo Ŝercemulo!" mi laŭte lin salutis.

Ekvidinte min li tre ĝojiĝis kaj rapidis al mi. Senatente li renversis per la piedo la korbon apud li kaj disŝutiĝis la drogherboj sur la teron. Mi tuj alkuris por helpi al li ilin rekolekti.

Avo Ŝercemulo diris gajmiene: "Jen vidu kiel bonaj estas ĉi tiuj drogherboj! Niaj avoj diris, ke tio ĉi estas fortigilo por bovoj. Antaŭ kelkaj jaroj, mi faris provon per ĝi, donante ĝian dozon al ĉiu bovo antaŭ la printempa plugado. Bona efiko! Dum printempo kaj somero, ili plugis kaj turnis noriojn, sed neniom malgrasiĝis." Karese frapante la rondcan postajon de la bovo li demandis min subite: "Vi ankoraŭ ne hejmeniris? Rapidu hejmen, via panjo tre sopiras vin! Mi iros vin vidi morgaŭ."

Mi estis kaj ĝoja kaj emociita, ke li jam preparas por la printempa plugado antaŭ la forpaso de la Printempa Festo, vere des pli ruĝa en la maljuneco.



Mi Estas Zorgantino de la Pumpmaŝino

*Ekstere de l' vilaĝo,
fluetis en adaĝo
malgranda rivereto,
sen urĝo, sen ondĵeto.
Dum plantoj preskati brulis,
ŝvitantojn ĝi spegulis:
la avo sitelportis,
kaj paĉjo nori-rulis.
Li sitelportis ade,
li ĉerpis akvorade,
kurbiĝis dors' ilia,
doloris l' ost' tibia.*

*Torentis ilia ŝvito,
pli ol la rivereto!*

*Ekstere de l' vilaĝo
torento en junaĝo
jen grimpas la deklivon
kantante recitativon;
ĉar nova jam pumpilo
funkcias nun kun brilo.
Mi iĝis zorgantino
de l' bona pumpmaŝino.
Ĝi laŭte gaje bruas
kaj plaŭde l' akvo fluas.
Kun la komunumanoj
ekkantas ankaŭ l' ranoj
pri riĉa grenrikolto,
pri sia nova sorto.*

TRAD. LAŬLUM



La sekvajn tagojn mi lin vizitis, tamen ne sukcesis lin vidi dum du tagoj. Samvilaĝanoj diris al mi: "Ho, li jam fariĝis nia bovkuracisto, kaj tre aktivas. Li jam iris kuraci bovon de la brigado post la monto."

En la mateno de la tria tago de la lunkalendaro Novjaro, kiam ni volis eliri, Avo Ŝercemulo venis, en nova vatita robo, kun glate razita vizaĝo. Mi proponis teon al li. Kun taso en la mano li demandis tion kaj tion gaje ridante. Ŝajnis ke hodiaŭ li venis speciale por babili kun mi. Ne plu povante sin deteni mia frato diris: "Avo Ŝercemulo, sidu momenton, ni iros al la onklo kaj revenos baldaŭ en la posttagmezo, ni satbabilu kun vi poste!"

"Vi iros al via onklo? Momenton atendu, mi havas ion por li, volu kunporti." Tion dirinte li hejmen rapidis.

Post momento, li revenis kun granda pako en neta kuba formo kun kvadrata ruĝa papero supre. Oni tuj povis vidi, ke ĝi estas por donaco. Tion rimarkinte la frato elŝteliris. Kuntirante la brovojn mi diris: "Avo Ŝercemulo, nuntempe oni ne plu observas tian ceremonion! Vidu, ankaŭ mi nenion kunportos tien kiel donacon."

Li trudis la pakon en miajn manojn dirante: "Ja estas necese esprimi bondeziron ĉe la Printempa Festo. Ne ordinara estas la rilato inter via onklo kaj mi. Transdonu mian saluton al li kiam vi lin vidos."

Mi ne akceptis la pakon. Panjo diris ke li kaj mia onklo estas kolegoj. Ili fariĝis intimaj amikoj kiam li iris al la brigado de la onklo por kuraci ĝian bovon en la pasinta jaro. Ŝi diris, ke mi alportu ĝin por Avo Ŝercemulo. "Panjo, kial vi ne pensas en mia pozicio: En militista kostumo tamen kun dona-

copako, ĉu ne estas ridinde!"

"Kial ridinde! Estas deca afero ke la nevo faras donacon al sia onklo dum vizito. Kaj krome, tion vi ja faros en mia nomo." Dirante Avo Ŝercemulo ree trudis al mi la pakon. Mi insistis ne akcepti, sed li ne cedis. La pako estis ŝovata tien kaj reen kaj — pum! ĝi falis teren.

Elŝutiĝis ĝia enhavo. Mi rigardis kaj rekonis ke ili estas sekigitaj drogherboj. Ĉu tio ne estas la fortigilo por bovoj pri kio diris Avo Ŝercemulo?

Avo Ŝercemulo kolektis la drogherbojn de sur la tero kaj diris: "Vi junuloj ne bone taksas nin maljunulojn. Ĉu nur vi povas progresi sed ne maljunuloj? Montoj ne troviĝas ĉe via onklo, do tie oni ne povas kolekti tiujn drogherbojn. Kial ni ne helpu ilin per tio kion ni havas?"


Kun ridoj mi akceptis la pakon dirante: "Avo Ŝercemulo! Ja ŝercema vi estas. Kial tion vi ne diris pli frue? Ĉu mi povus rifuzi kunporti al la onklo pakon de drogherboj kiujn vi kolektis por alia komunumo?"

Ankaŭ mia patrino ekkomprenis kaj ridetante ŝi frapadis la dorson de Avo Ŝercemulo. Ŝajne ke ankaŭ li sentis kontenton kaj foriris kun rido.



Tri Vojaĝoj tra la Granda Kanalo


ĜU KI*



Supra foto:

*Barĝaro sur la rekons-
truita Granda Kanalo.*

Foto de Gi Juking



Malsupra foto:

*Ŝikiaŭ-kluzo — la pordo
inter la Kanalo kaj
Jangzi-rivero.*

Foto de Ĝoŭ Kingĝeng

LA Granda Kanalo de Ĉinio norde komenciĝas de la ĉefurbo Pekino, trapasas kvar provincojn kunligante kvin akvosistemojn — la Flava Rivero, Jangzi-rivero kc., kaj etendiĝas ĝis Hangĝoŭ, la pitoreska ĉefurbo de Ĝegiang-provinco. Ĝi longas pli ol 1700 km., estas la plej longa artefarita akvovojo en la mondo kaj havas historion de pli ol 2400 jaroj. En la pasinteco ĝi estis naviga ĉefvojo inter la sudo kaj nordo de Ĉinio kaj faris rimarkindajn servojn al la tiamaj trafiko, ekonomio kaj kulturo.

KANALO PRESKAŬ SEN NAVIGADO

Mi havis tri vojaĝojn tra la Granda Kanalo. La unua okazis en 1936, la jaro antaŭ la Kontraŭjapana Rezistmilito. Tiam ĝia riverlito jam fariĝis kaj mallarĝa kaj malprofunda pro manko de prizorgo dum longa tempo. La parto en norda Giangsu-provinco larĝis nur ĉ. dek metrojn. Ĉe kurbiĝoj eĉ du vaporŝipoj ne povis ĝin trapasi samtempe vid-al-vide. Tie la digoj estis malaltaj kaj la Granda Kanalo ne povis glate enflui en Jangzi-riveron, kaj dum akvego oni devis breĉigi la digojn por ellasi superfluan akvon. Sed tio dronigis la ĉirkaŭaĵon en vastan maron kaj jetis centmilojn da kamparanoj en senliman suferon. Pro obstrukcoj en navigado, mi vojaĝis kvar tagojn nur tra ĝia parto en Giangsu-provinco. Dum tiu vojaĝo mi vidis la urbojn malprosperaj kaj la vivtenon de la kamparanoj tre malfacila.

“SURAKVAJ TRAJNOJ”

En 1955 mi faris la duan vojaĝon. Tiam la ŝtato jam komencis jungi Huaj-riveron kaj parte rekonstrui la Grandan Kanalon. Sur la Kanalo jam konstruiĝis iuj akvoreguligaj kaj ŝipaj kluzoj kaj laŭlonge de ĝi aperis prosperaj scenoj. En sia meza parto la Kanalo estis plilarĝigita kaj pliprofundigita. Sur ĝiaj bordoj verdaj salikoj staris en vicoj. Tiam estis ĝuste frua printempo, la salikoj ludis per siaj vergoj kaj abrikotaj arboj pompe floris. Ĉarma pejzaĝo. Sur la Kanalo frekventis vaporŝipoj trenantaj po dekelkajn barĝojn plensarĝitajn per karbo, greno, salo, ligno ktp. Tieaj loĝantoj nomis ilin “surakvaj trajnoj”. Tre viglis la transportado. Ĉe Huaj-an, nia ŝipo transpasis grandan kanalon kun longeco de 170 km., kies vasta kaj profunda fluo estis kelkoble pli larĝa ol la tiama Granda Kanalo. Tiu kanalo formis, kune kun la aliaj interligitaj riveroj, irigacian reton por servi 25,000,000 muojn da fekunda tero. Sed tiam ankoraŭ ne estis tute solvitaj la problemoj de navigado kaj irigacio de la Granda Kanalo; kaj tro mallarĝa estis la parto inter la gubernioj Gjeŝoŭ kaj Ŝaŭbo, kiu estis alinomita la Gorĝo de la Kanalo. Sed ĝuste tie la transportado viglis eksterordinare. Por radikala rekonstruado de la Granda Kanalo unue oni devis ellabori ĉioamplksan projekton por ke ĝi konformu al la nova disvolviĝo de la nacia ekonomio.

REKONSTRUADO DE LA GRANDA KANALO

En la aŭtuno, 1963 mi faris la trian vojaĝon. Tiam la parto de la Kanalo en Giangsu-provinco estis jam rekonstruita laŭ la “ĉioamplksa projekto por sinteza

utiligo”, kaj malfermiĝis al navigado. La rekonstruado de la Granda Kanalo ne celis restarigi ĝian malnovan fizionomion, sed ĝin reformi radikale: Iuj partoj de la Kanalo estis pliprofundigitaj kaj plilarĝigitaj, dum aliaj translokigitaj kune kun la digoj.

La maljuna Granda Kanalo alprenis tute novan aspekton. En la pasinteco la parto de la Kanalo sude de Jangĝoŭ ĝis ĝia enfluejo al Jangzi-rivero estis zigzaga kaj maloportuna por navigado. Post rekonstruado ĝi fariĝis rekta, larĝa kaj libera de baroj. La novaj digoj estis rektaj kiel streĉitaj fadenoj. 500-tonelaj ŝipoj navigis senbare, “surakvaj trajnoj” kuris kiel bobenoj, suden kun karbo, salo kaj greno, kaj norden kun bambuo, ligno kaj industriaj produktaĵoj el Ŝanhajo, Nankino k. a. urboj. Ili navigis en du vicoj, senĉese en tago kaj nokto. Laŭdire, kiam finiĝos la tuta rekonstruado, tra la nova naviga vojo povos trapasi ŝipoj 2000-tonelaj.

JANGĜOŬ

Alveninte Jangĝoŭ, mi vizitis la faman kluzon “Vanfu” longan je proksimume duon-kilometro, kiu kontrolas la enfludon de Huaj-rivero en Jangzi-riveron, unuflanke de ĝi estis ponto por funkciigi la kluzon kaj aliflanke ŝosea ponto, sur kiu povas samtempe trapasi grandtipaj ŝarĝaŭtoj aŭ traktoroj en kvar vicoj. Mia vizito daŭris ĝis vesperiĝo, kiam la ponton brile iluminis elektraj lampoj. Sur la ponto tien kaj reen kuris aŭtoj, kaj sur la rivero kuris ŝipoj unuj post aliaj en vicoj senfinaj. Ambaŭflanke de la Granda Kanalo disetendiĝis reto de irigaciaj kanaletoj kies irigaciaj kaj drenaj ekipaĵoj estis funkciigataj plejparte per elektro. En la pasinteco tie oni ofte suferis de inundo, sed nun oni jam ne plu timas sekegon aŭ inundon.

Daŭrigante mian veturadon al la nordo, mi alvenis la supre diritan Gorĝon de la Kanalo, kiun mi preskaŭ neniel povis rekoni. La fluejo estis kaj larĝa kaj rekta, kaj tre oportuna por trafikado de la ŝipoj. Ekzemple, la Kanalo en Baŭjing estis jam plilarĝigita kelkoble, kaj iuj partoj de la Kanalo estis eĉ forlasitaj kaj anstataŭitaj de novaj. La nove konstruita Okcidenta Digo estis dekoble pli dika ol la malnova, kio malpliigis la minacon de inundo al la najbaraj regionoj.

* * *

La tri vojaĝoj okazis en du malsamaj epokoj. Mi devas rimarkigi, ke la jaro 1936 estis ĝuste la plej prospera periodo de la kuomintanga regado; sed en 1955 la nova Ĉinio fondiĝis nur ses jarojn, kaj en 1963, ĝi travivis nur dek kvar jarojn, kaj plie, tiam ĝi ĵus spertis naturajn katastrofojn en tri sinsekvaj jaroj. Sed la trifojaj impresoj prezentis tiel okulfrapan diferencan. Mi estas konvinkita, ke se mi havos ŝancon fari kvaran aŭ kvinan vojaĝon tra la Kanalo, mi certe vidos pli multe da ĝojigaj ŝanĝiĝoj.

**La verkinto estis vicedirektoro de dogana buroo dum la kuomintanga regado. Nun li estas membro de la Giangsu-provinca Komitato de la Politika Konsiliĝa Konferenco de la Ĉina Popolo.*



K-do Vu Juĝang kontrole demandas la infanojn pri ilia kono pri la Han-lingva Fonetika Alfabeto. Foto de Ĉen Juefeng

La Han-lingva Fonetika Alfabeto en Praktiko (Mallongigita)

VU JUĜANG, Ĉefo de la Komitato por Reformo de la Ĉina Skribo

La knabinetoj Gaŭ Ĝi (6-jara, maldekstre) kaj Ĵen Si (5-jara) de iu infanejo ricevis premion pro sia bona lernado de la norma lingvo per la Han-lingva Fonetika Alfabeto.

Foto de Hju Kingfu



JAM pasis ses jaroj depost la oficiala publikigo por praktikado de la Han-lingva Fonetika Alfabeto en aprilo, 1958. Dum tiu periodo ĝi uziĝis en diversaj kampoj kaj ludis rolon konsiderindan.

Kiel Fonetikaj Signoj por Ideografiaĵoj

Ekde la aŭtuno, 1958, en la elementaj lernolibroj de la han-lingvo estis uzitaj la fonetikaj literoj kiel helpiloj por legi la ideografiaĵojn kaj lerni la komunan lingvon parolan. Ankaŭ al la novaj vortoj en la gimnaziaj lernolibroj de la han-lingvo estis aldonitaj fonetikaj literoj por helpi al la lernantoj elparoli la ideografiaĵojn senerare. Tio multe faciligis la instruadon de la han-lingvo kaj altigis la efikecon de lernado.

Diversaj han-lingvaj vortaroj eldonitaj post 1958 enhavis ankaŭ fonetikajn literojn apud la vortoj ideografiaj. Tio multe helpis la prononcan unuecigon kaj disvastigon de la komuna parola lingvo.

De la lastaj jaroj fonetikaj literoj estas uzataj en la *Popola Ĵurnalo*, *Ĉina Junula Ĵurnalo* kaj aliaj ĵurnaloj kaj gazetoj kaj parto de legajoj por infanoj kaj legantoj de malalta klereco, por montri la elparolon de ĉiu malfacila ideografiaĵo, kaj tiu aranĝo trovis varman akcepton ĉe la vasta legantaro. La han-lingvo havas dekmilojn da ideografiaĵoj, el kiuj ĉ. sep mil estas ĝenerale uzataj, kaj multaj vortoj malfacile memoreblaj kaj facile misprononceblaj troviĝas en legajoj. Tial fonetika indiko pri tiuj malfacilaj ideografiaĵoj estas utila kaj helpa ne nur por la polamaso kaj junaj legantoj, kiuj posedas malabundan provizon de la han-lingvaj ideografiaĵoj, sed ankaŭ por multaj intelektuloj, kiuj konas relative multajn ideografiaĵojn.

Helpo al Kreado kaj Reformo de Skribaj Lingvoj de Nacimalplimulto

Multaj nacimalplimulto de Ĉinio ĝis nun ne havas siajn proprajn skribajn lingvojn, kaj neperfekta estas la lingvoj de iuj nacimalplimulto, por kiuj ja necesas plibonigoj. Por helpi la laborantan popolon de la nacimalplimulto lerni siajn proprajn lingvojn kaj progresigi siajn naciajn kulturojn, post la Liberiĝo, la registaro helpis ilin en la kreado kaj reformado de iliaj skribaj lingvoj sur la bazo de la Han-lingva Fonetika Alfabeto.

Ĝis nun jam kreiĝis por dekelkaj nacioj inkluzive de la ĝuang-a, mjaŭ-a, ji-a, dung-a k.a. novaj alfabetoj baziĝintaj sur latina literaro. Oni helpis al



Caj Kjuan, studento de la Sun Jatsen-universitato instruas laboristojn pri la Han-lingva Fonetika Alfabeto. Foto de Li Hujfang

la ĝingpoj kaj lahuoj pretigi reformajn projektojn, kaj helpis al ujugura kaj ĥazaka nacioj en la farado de novaj skriblingvaj projektoj laŭ la latina alfabeto, por substitui la malnovan skribon kun arabaj literoj. La supre diritaj novaj skribolingvoj estas ĉiuj kreitaj aŭ reformitaj sur la komuna bazo de la Han-lingva Fonetika Alfabeto kun necesaj kompletigoj kaj modifoj laŭ la bezono de iliaj lingvoj.

La kreo kaj reformo de la skribaj lingvoj de nacimalplimulto ne nur akcelas la evoluon en kulturo de tiuj nacioj sed ankaŭ kreas favorajn kondiĉojn por la kultura interfluo kaj plifortigo de unuiĝo inter han-nacio kaj la nacimalplimulto.

Helpo al Fremduloj Lerni la Han-lingvon

Sekve de la altiĝo de la internacia pozicio de Ĉinio, pli kaj pli multe da alilandanoj deziras kompreni Ĉinion kaj pli kaj pli fortaj fariĝas iliaj deziroj lerni la han-lingvon. Sed ilin timigas la malfacileco en ĝia lernado. La proklamo de la Han-lingva Fonetika Alfabeto liberigis ilin de la malfacileco kaj malfermis al ili multe pli rapidan vojon en la lernado de la lingvo.

Depost 1958, bonan rezultaton oni atingis dank' al apliko de la fonetika alfabeto en lernigado de la han-lingvo al la eksterlandaj gestudentoj en Ĉinio. Kaj ankaŭ en aliaj landoj estas multaj lernejoj kiuj uzas la alfabeton kiel lernigilon de la han-lingvo. Varman akcepton de fremdaj legantoj ĝuas la legajoj kun paralele metitaj ideografia kaj fonetika tekstoj, kiujn eldonis la Eldonejo por Reformo de la Ĉina Skribo, inter ili troviĝas ankaŭ la verkoj de prezidan-

to Maŭ Zedong, distribuiĝas eksterlanden kiel legaj kaj lernaj materialoj.

Plibonigo de Instruado al Surd-mutuloj

En la pasinteco, la surd-mutaj lernantoj estis instruataj per fingra parolo. Ili ne nur ne kapablis buŝe paroli sed ankaŭ malriĉis en vortprovizo, ofte inversis vortordojn, eraris gramatike, kontraŭlogike kaj konfuzis la sencojn de vortoj en siaj verkekercoj. Depost 1954, buŝa parolo fariĝis iom post iom la ĉefa instrumentado anstataŭ la fingra. Post kiam publikiĝis la Projekto de la Han-lingva Fonetika Alfabeto evidenta progreso estas atingita en la lernigado de buŝa parolo al la surd-mutuloj dank' al ĝia apliko. Nun ĉiuurbaj lernejoj por surd-mutuloj havas la Alfabeton kiel lernobjekton.

Cetere, kompleto da han-lingva fingroparola alfabeto estas elfarita surbaze de la Han-lingva Fonetika Alfabeto. Ĝi povas esti uzata kiel helpilo al la surd-mutaj infanoj por lerni elparolon kaj legadon de la han-lingvo, kaj oni ankaŭ povas ĝin uzi mikse en la fingra lingvo por sin esprimi per vortoj kun abstrakta senco.

Plibonigo de la Brajla Skribo por Ĉinoj

Estas granda malfacilo en lernado de la han-lingvo por la blinduloj. Oni iam kreis skribosistemon

por ilia lernado, sed en ĝi estis multe da neperfektaĵoj. Sed nun uzante la skribon de la Han-lingva Alfabeto, oni povas ne nur legi kaj skribi kaj lerni teknikojn, sed ankaŭ korespondi kun neblinduloj, utiligante la ordinaran skribmaŝinon kun latinaj literoj. Ĉar la signaro en la Han-lingva Fonetika Skribo estas tute konforma al tiu de la internacia komuna skribo por blinduloj. Ĝi estas oportuna ankaŭ por adopti la brajlan signaron internacie uzatan en matematiko, fiziko kaj kemio, kaj kreas favorajn kondiĉojn por la blinduloj, kiuj lernas fremdlingvan brajlon. Nun la projekto de la Han-lingva Fonetika Alfabeto jam trapasis provojn en elektitaj lokoj kaj povos tuj ĝin vaste uzi post kiam ĝi estos decidita post studo.

Plirapidigo de la Telegrafa Komunikado

Por telegrafa komunikado han-lingvaj ideografiaĵoj devas esti unue transskribitaj en kvaropojn de ciferoj, tial necesas deĉifrado en ambaŭ la senda kaj riceva stacioj. Memkompreneble, tio malrapidigas la komunikadon kaj facile kaŭzas erarojn en la transsendado. Post publikigo de la Alfabeto, nia Ministerio de Poŝto kaj Telekomunikoj malfermis ekde la Nacia Tago en 1958 enlandan telegrafan komunikon per la Han-lingva Fonetika Alfabeto. La komunikado per tia signaro estas pli rapida ol tiu per ciferoj. Tempo povas esti ŝparita trione en la rekta komunikado de

La komunumanoj lernas la Han-lingvan Fonetikan Alfabeton post laboro. Foto de Luo King



literoj sur teletajpilo, kaj kvarone ĝis duone sur la Mors-aparatoj per signo-legado aŭ sonaŭdado.

Aplikado en Korespondo per Vidsignaloj

La han-lingvaj ideografiaĵoj, pro sia multnombro, neniel povas turniĝi en signalojn de flagaj aŭ lampaj paroloj por fari korespondon per vidado. Estis malracie, ke oni uzadis la anglan lingvon en la mararmeo de la malnova Ĉinio. Post la Liberiĝo la ĉina mararmeo iam uzis la novan skribolingvon de latinigo. Post publikigo de la Alfabeto, preskaŭ ĉiuj ĉi tiuj komunikoj estas farataj en la fonetikaj literoj krom la signaloj internacie uzataj. Lastatempe la fonetika flagparolo estas uzata ankaŭ sur fiŝboatoj. La malfacilo de voĉa komunikado sur fiŝboatoj estas do forigita kaj la tempo de la interkomunikado estas mallongigita favore al la fiŝado.

Kiel Signoj kaj Mallongigoj

Signoj kaj mallongigoj uziĝas vaste en la scienca, teknika kaj produkta kampoj. Antaŭ la publikigo de la Han-lingva Fonetika Alfabeto, oni povis nur uzi la signojn kaj mallongigojn alprenitajn el fremdaj lingvoj. Tio estis solvo maloportuna. Post la publikigo de la Alfabeto, krom la internaciaj komunaj signoj kaj mallongigoj uzataj kiel antaŭe, ni komencis uzi niajn proprajn memkreitajn per la fonetika alfabeto sur la bazo de la han-lingvo. Kaj la industriaj kaj fervojaj entreprenoj fiksitis signarojn por distingi maŝinojn, vagonojn, desegnojn, dokumentojn ktp. uzante la alfabeton. La Ministerio de Poŝto kaj Telekomunikoj adoptis jam en 1958 la Alfabeton por skribi la telekomunikajn loknomojn de la lando, nuligis la antaŭajn "poŝtotelegrafajn loknomojn" enkondukitajn de fremduloj, kaj difinis la mallongigojn de loknomoj per komencaj literoj.

Uzata en Kompilado de Vortaroj

En la pasinteco, la han-lingvaj vortaroj estis ĝenerale ordigitaj laŭ la elementaj signoj aŭ skribaj strekoj, kio malfaciligis la konsultadon ĉe la uzantoj. Post publikigo de la Alfabeto, multaj vortaroj adoptis la ordigan sistemon laŭ la fonetika alfabeto. Tia sistemo multe faciligas la konsulton, kaj estas multe pli bona ol la aliaj ordigaj metodoj. Ĉiu kiu scias la elparolon de vorto, sed ne ĝian formon, aŭ scias la elparolon kaj formon sed ne ĝian signifon, povas rapide ĝin trovi en vortaro. En tiuj ĉi vortaroj estas krome aldonitaj indeksoj de la plena vortlisto ordigita laŭ la elementaj signoj aŭ skribostrekoj, kaj ĉiu kiu ne scipovas la Alfabeton aŭ prononcon de la vorto, povas unue konsulti la indekson.

Uzata en Ordiga Indekso

En la pasinteco ankaŭ la indeksoj por materialoj kompilitaj en la han-lingvo estis aranĝitaj laŭ la ordo de la elementaj signoj aŭ skribostrekoj kaj oni ne povis facile trovi la vorton serĉatan. Pro tio multa tempo perdiĝis, malpliiĝis la laborefiko. La publikigo de la Han-lingva Fonetika Alfabeto malfermis al la ordigaj indeksoj sistemon facilan kaj oportunan. Estas nun multaj bibliotekoj, malsanulejoj kaj entreprenoj kiuj jam starigis indekson laŭalfabetan. Ekzemple, la malsanulaj kartoj de la Unia Hospitalo de Pekino estas aranĝitaj laŭ la alfabeto ordo. Se oni bezonas informon pri la historio de malsanulo, oni povas trovi en malpli ol unu minuto lian karton el la pli ol miliono da kartoj.

Supre estas skiza bildo pri la aplikado de la Han-lingva Fonetika Alfabeto en diversaj kampoj. Sekve de la po-grada disvastiĝo de la Fonetika Alfabeto kaj popularigo de la fonetika scio en la popolamaso, ĝia aplikado certe pli kaj pli disvastiĝos.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

ĈIAM PLI MULTA PROVIZO

Laŭ statistiko de la Komerca Ministerio pli da porkaĵo kaj ovoĵo estas venditaj en pli ol 20 provincoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio ekde la komenco de la kuranta jaro kompare kun la sama periodo de iu ajn jaro de post la Liberiĝo en 1949.

En la vendejoj de manĝaĵoj en ĉiuj grandaj kaj mezgrandaj urboj estas alte amasigitaj viando, ovoĵo, kokoj, anasoj, freŝaj fiŝoj kaj legomoj. Ankaŭ prilaboritaj viandoj ekz-e ŝinko, kolbaso, salita

porkaĵo kaj lardo estas akireblaj.

La plimultiĝo de porkoj kaj kortbirdoj bredataj en la kamparo de la popolaj komunumoj donas ankaŭ grandan sumon da provizaĵoj al la malgrandaj urboj.

LIBROJ POR MONGOLAJ INFANOJ

Laŭ statistiko pli ol tri centoj da libroj por infanoj kun preskvanto de miliono da ekzempleroj estis eldonitaj en 1963 en la mongola lingvo fare de la eldonejoj en Interna Mongolio kaj en Pe-

kino. Krome estis presita en la mongola lingvo miliono da ekzempleroj da lernolibroj por lernantoj en la elementaj kaj duagrada lernejoj.

Parto de la libroj por infanoj estas bazitaj sur la fabloj, popolaj rakontoj kaj enigmoj tre popularaj por la mongola popolo. Multaj infan-libroj eldonitaj en la han-lingvo, la ĉefa lingvo de Ĉinio, estas tradukitaj en la mongolan lingvon. Ankaŭ verkoj de Andersen, Puŝkin kaj aliaj eksterlandaj verkistoj aperis en tiu lingvo.



La hodiaŭa Ĉielpaca Placo.

Pekino

Hieraŭ kaj Hodiaŭ

GIAŬ ŜIGAJ*

MI havas bonan interligon kun Pekino. En Pekino mi vivis longtempe kaj dum lernado kaj dum profesia laborado. Ankaŭ dum la 15 jaroj depost la Liberiĝo mi ĉiam loĝas en Pekino escepte de maloftaj vojaĝoj al aliaj lokoj. Ja tre ĉarma kaj alloga estas la natura medio de Pekino kun ĝiaj pitoreskaj lagoj kaj montoj, belaj parkoj kaj interesaj antikvaj vidindaĵoj. Sed parolante pri la sorto de Pekino antaŭ la Liberiĝo, mi tuj nature ekpensas pri la travivaĵoj de la prapatroj kaj tiuj de mi mem dum la unua duono de mia propra vivo.

Retrorigardo

Pekino funkciis kiel ĉefurbo de feŭdaj dinastioj dum 800 jaroj. Dum tiu longa periodo ĝi vidis plurfoje ŝanĝiĝojn de dinastioj. Dum la pli ol 90 jaroj antaŭ la Liberiĝo ĝiaj loĝantoj vivis en mizero kaj postiĝinteco sub la premado kaj ekspluatado de la imperiistoj, feŭdistoj kaj Kuomintango.

Mia hejmo situas ĉe la okcidenta ekstremo de Ĉang-an-strato (Strato de Eterno Paco), ĉe kies centro sin trovas la fama Ĉielpaca Pordego. Estas tre feliĉe, ke mi povas loĝi ĉe ĝi kaj kontakti kun ĝi ĉiutage.

* *La verkinto de ĉi tiu artikolo nun estas membro de la Tutlanda Komitato de la Politika Konsilia Konferenco de la Ĉina Popolo kaj konsilanto de la Ŝtata Konsilo; antaŭ la Liberiĝo li estis vicĉefsekretario de la kuomintanga kontraŭkomunisma Ĉefstabo Banditeksterma de Norda Ĉinio kaj ribelis kontraŭ la kuomintanga reĝimo dum la paca liberigo de Pekino en 1949.*




Foto de Li Ziking

Profundan impreson pri ĝi mi havas. Dum la feŭdismaj dinastioj oni iris sur ĉi tiu strato ĉiam kun timtremo, ĉar malatente transpasinte la Orientan aŭ Okcidentan Pordotrion je unu paŝo oni povis malfeliĉe trafi la punon de senpiedigo. Kvankam antaŭ la Liberiĝo Ĉang-an-strato jam estis unu el la ĉefstratoj de la urbo, tamen tiam ĝia plej larĝa parto larĝis nur 20 metrojn. Post la Liberiĝo ĝi estis radikale rekonstruita kaj larĝigita kaj ĝia maksimuma larĝo atingas 80 metrojn. Ambaŭflanke de la strato etendiĝas po neta linio de ferbetonaj lampkolonoj kun po dekelkaj lunsimilaj lampoj, dank' al kies ilumino ĝi havas ĉarman noktan aspekton.

Rara Placo en la Mondo

La Ĉielpaca Placo antaŭ la Ĉielpaca Pordego ĉe la centro de Ĉang-an-strato nun jam fariĝis placo 40-hektara post fojrefoja plivastigo, kaj ĝia grandeco estas rara en mondo. En la suda parto de la placo sin trovas la Monumento de Popolaj Herooj kun alteco de 40 metroj. Ĝi majeste staras simbolante la noblajn farojn

de la ĉina popolo, kies heroaj gefiloj batalis kaj sin oferis unuj post aliaj dum la lastaj cent jaroj por la nacia sendependeco, demokratio kaj libero.

Ĉe la orienta flanko de la Ĉielpaca Placo estas la grandiozaj Muzeo de la Ĉina Revolucio kaj Muzeo de la Ĉina Historio; ĉe ĝia okcidenta flanko estas la Popola Halo, kies plankareo superas tiun de la tuta malnova palaco. Kune kun la Ĉielpaca Pordego tiuj ĉi novaj konstruaĵoj formas elegantan kaj grandiozan aron.

La Nova Fervoja Stacio de Pekino

Oriente de la Pordego, ambaŭflanke de Ĉang-an-strato leviĝas altaj novaj konstruaĵoj. Inter ili troviĝas centraj ŝtatificejoj, la Pekina Hotelo k. a. Ĉe tiu ĉi strato la plej movplena estas la nova fervojstacio. Ĝia plankareo estas 8-oble pli granda ol tiu de la malnova. Antaŭ la domego estas placo povanta enteni kvindek mil personojn. En la stacio troviĝas 3 larĝaj subteraj irejoj, 6 kajoj kaj 12 trakoj. Ĝiaj 18 atendejoj povas enteni samtempe 14 mil pasaĝerojn. En ĝi troviĝas ankaŭ restoracio, kinejo, ĉambro por televido, per-televida konsultejo, ripozejo por patrinoj kaj infanoj, klubo, legĉambro kaj diversaj instalaĵoj servantaj al la pasaĝeroj.

La Kultura Palaco de Nacioj

Ĉe la okcidenta parto de Ĉang-an-strato, t. e. najbare de mia hejmo, sin trovas vico da novaj domegoj: la Domego de Internacia Komerco, la Kultura Palaco de Nacioj, la Hotelo de Nacioj k. a. La



La Ĉielpaca Pordego antaŭ la Liberiĝo.

plej alloga el ili estas la Kultura Palaco de Nacioj. Ĝia meza parto alte leviĝas kaj la flankaj partoj antaŭen etendiĝas kaj duonĉirkaŭas la placon antaŭ ĝi. La ĉefa parto de la palaco kun tegmento el firmaj ĉevronoj kaj emajlitaj tegoloj estas riĉa je naciaj gustoj. En ĝi troviĝas muzeo, halo, gastigejo, restoracio k.t.p. Ĉiu-tage venas al ĝi diversnaciaj vizitantoj el diversaj provincoj kaj regionoj. Ĝi simbolas la grandan solidarecon de niaj nacioj.

La Trafiko de Pekino

Antaŭ la Liberiĝo, en 1948, la tuta Pekino havis nur kvardek kelkajn tramojn kaj 5 kadukajn aŭtobusojn. Sed nun en Pekino funkcias jam pli ol 400 trolebusoj kaj pli ol 1000 aŭtobusoj, kaj ekster la interna urbo funkcias ankaŭ multaj tramoj. Nun krom la fervojoj kaj aŭtovojoj interligantaj Pekinon kun la tuta lando, funkcias, inter ĝi kaj pli ol 70 urboj, 14 linioj de civila aviado, kaj aldone pluraj internaciaj aerlinioj.

La nuna trafiko de Pekino ja estas nekompareble pli oportuna ol tiu antaŭ la Liberiĝo.

Ĉiu Havas Sian Laboron

Mia hejmo situas ĉe Erlonglu-strato en la okcidenta kvartalo. Ĉi tie ne ekzistas eĉ unu malla-

borema vagulo. Multaj virinoj nun enviciĝis al la laboruloj kaj ili povas plene disvolvi siajn talentojn kaj saĝon. Ekzemple la tuta personaro, de la fabrik-estroj kaj sekciestroj ĝis la ordinaj laborantoj de fabriko de elektraj instrumentoj situanta proksime de mia hejmo, konsistas preskaŭ nur el virinoj. Nun ĉiuj eminentaj laborantoj en tiu ĉi fabriko estas virinoj, kiuj estis konsiderataj en la malnova socio kiel "malsuperaj". Nun ĉiuj estas egalrajtaj kaj ĉie regas amikeco kaj solidareco.

Novaj Moroj

En Pekino la maljunuloj estas speciale estimataj. Ĉi tio montriĝas kaj en ilia politika kaj ekonomia vivo, kaj en ilia socia vivo, kaj ĉie ili estas bone prizorgataj. Ekzemple en aŭtobusoj vidinte maljunulon staranta oni tuj konkure cedas al li la propran sidlokon.

Por trovi la adresaton de letero kun malklare skribita adreso leterportisto klopodas ĉie serĉadi ĝis finfina sukceso. Por redoni survoje trovitan objekton al ĝia mastro, oni volonte atendas surloke la perdinton. Ĉio ĉi prezentas novajn morojn ĉiutage videblajn en nia socio.

Kompreneble la menciitaj ekzemploj estas nur bagateloj, sed por mi longtempe loĝinta en Pekino ili ja atestas pri profunda ŝanĝo de la urbo.

Novaj domoj ĉe la Okcidenta Ĉang-an-strato.

Foto de Li Gilu



Mi Kreskas en la Nova Ĉinio

LA nova Ĉinio jam vidis dekkvin jarojn depost sia naskiĝo kaj dume mi jam fariĝis junulo el knabo.

En 1945, kiam venkis rezistmilito kontraŭ la japanaj invadantoj, mi estis apenaŭ sep-jara. Mi memoras, ke iun nokton de fruaŭtuno, mi vekigis surprizite de ĝojkrioj kaj krakado de petardoj — la popolo freneziĝis de ĝojo pro la kapitulaco de la japanoj.

Mia patro iris kun mi en la ĝojegan homamason kaj diris al ĉiuj kiujn li renkontis: “Ekde nun ni ĝuos vivon trankvilan!” Kompreneble ankaŭ mi estis ĝoja, ĉar de post tiam ni ne plu bezonos rifuĝi por eviti japanajn bombadojn. Kun infana pasio mi deziregis rapidan alvenon de la “trankvila vivo”. Sed, mi ne sciis kial, ne nur ne venis la trankvila vivo, tute male, ĉio en la socio fariĝis eĉ pli malorda ol antaŭe. La prezoj plialtiĝis tagon post tago kaj impostoj plimultiĝis jaron post jaro, sur la malĝoja vizaĝo de mia patro ofte videblis maltrankvilo.

En la jaro kiam mi estis dekunu-jara, mia hejmloko liberiĝis. Mi ĝojis precipe pro tio ke mi povis denove vizitadi lernejojn kun mia librosako. Kaj el la ridetanta mieno de mia patro mi divenis la alvenon de la trankvila vivo.

La Neforgeseblaj Dek Unu Jaroj

Antaŭ la somera libertempo de 1957, mi ĝoje finis la ses-jaran vivon de mezgrada lernejo, kaj sukcese trapasis la ekzamenon de la ĉin-lingva fakultato de la ŝtata Siĉuan-a Universitato, kaj poste komenciĝis mia universitata vivo al kiu mi aspirois eĉ en sonĝo.

Mi ankoraŭ memoras, ke en la unua tago kiam mi eniris la mezlernejon, mi vere timis, ke mi ne povos fini mian lernejan studon! Ĉar antaŭ la Liberiĝo mia frato devis ĉesigi sian lernadon pro malriĉeco. Tiam li ploradis preskaŭ tutan semajnon pro sia malfeliĉo.

Unu semajnon post la komenciĝo de lernado, la aŭtoritato de la lernejo informis, ke ĉiu lernanto kies familio havas financon malfacilon rajtas peti monhelpon, kaj tiel mi ricevis la popolan stipendion de la ŝtato same kiel multaj aliaj gefiloj de laboruloj. El la vorto “popolo” mi ekkonsciis ke la pordo de la lernejo malfermiĝis por ni.

Dum la kvinjara universitata vivo, tiu sento fariĝis ankoraŭ pli forta. Mi daŭre ricevis la po-

polan stipendion, kiu inkluzivis ne nur la pagon por manĝaĵo, sed ankaŭ sumon por aliaj vivbezonaĵoj. Kaj same kiel la aliaj universitataj gestudentoj mi ricevadis senpagan kuracon. Krome, la ŝtato kreis por ni tre bonajn kondiĉojn por studo, havigante al ni sufiĉe da instruistoj kun riĉa sperto, bibliotekon kun milionoj da libroj, laboratoriojn bone ekipitajn, kaj vastajn kaj komfortajn klasĉambrojn. La medio de la universitato estas tre bela kaj kvietita. Kiam la suno subiras, la studentoj duope aŭ triope interparolas pri siaj akiroj de la tago aŭ pri siaj idealoj promenante sur la aleo aŭ ĉe la lotus-lageto.

En la universitato ni lernis literaturajn teoriojn klasikajn kaj modernajn, klasikan kaj modernan han-lingvon, kaj ankaŭ la literaturajn historiojn de Ĉinio kaj fremdlandoj. Ni tre interesiĝis pri la rusa literaturo kaj sovetia literaturo. Krom tio, oni establis ankaŭ liberan kurson pri ĉinaj antikvaj kaj modernaj fame konataj verkistoj kaj verkoj. Ankaŭ fizika laboro estas vicigita en la instruplano kiel regula kurso. En la postkursita tempo ni ofte kulturis arbojn, florojn kaj legomojn en la ĝardenoj de la universitato, krome, ĉiujare ĉirkaŭ du monatojn ni laboris en fabrikoj aŭ kamparo. Dank’ al tio ni tenis bonan kontrakton kun la socia vivo kaj la laboranta popolo, kaj firmigis la scion kiun ni lernis.

Post intensa lernado, ni ankaŭ partoprenis en variaj kulturaj amuzoj. Ni vizitis klubojn kaj kinejojn, kaj faris ŝatatajn ludojn sur sportejoj. Kiam venis somera libertempo, gvidate de la universitato ni vizitis vidindaĵojn, fabrikojn kaj vilaĝojn. Kaj la studentoj, kiuj volas pasigi sian libertempon kun siaj familianoj en aliaj lokoj, ĝuas 50-pocentan rabaton al la veturkosto de la ŝtataj fervojoj.

Al Laborposteno

Je la fino de lernado en universitato, kiam ni, ĝuinte la lastan someran libertempon de studenta vivo, revenis al la universitato, la aŭtoritato jam bone aranĝis la laborpostenojn por ni 800 diplomitaj gestudentoj. Oni okazigis por ni solenan adiaŭan vesperon, kaj faris por ni ĉion necesan por transiro al la laboroj, inkluzive de aĉeto de biletoj por vagonaroj kaj ŝipoj. La ŝtato ne nur pagis por ni la tutan veturkoston, sed ankaŭ donis vatitajn surtutojn kaj pantalonojn al tiuj kiuj laboros en malvarmaj limregionoj. Iuj aĝaj instruistoj rakontis al ni pri siaj dolorigaj travivaĵoj de “diplomiĝo — senokupiĝo”

antaŭ la Liberiĝo, tio tamen sonis en miaj oreloj kvazaŭ mito.

Kio precipe min ĝojigis estis tio, ke mi estis asignita labori en la ĉefurbo de nia patrolando — Pekino, kio estis neimagebla por mi eĉ en sonĝo. Kiam mi alvenis al la institucio, bonan prizorgon ni ricevis, senpage vizitis teatrojn, kinejojn kaj vidindaĵojn ĉirkaŭ Pekino, kaj oni okazigis vesperon por nin bonvenigi. La respondecaj kamaradoj afable demandis unu post alia niajn opiniojn kaj postulojn pri niaj laboroj. Kiam ni havis malfacilon en la laboro, la malnovaj kamaradoj tuj donis al ni helpojn kaj instruojn. El la mienoj de la kamaradoj mi trovis, ke ili ĉiuj ĝojas se ili povas helpi la novajn kamaradojn fariĝi lertaj en la laboro.

Pensoj pro Ricevita Letero

Lastatempe mi ricevis leteron de mia fratino, en kiu ŝi diris ke nia nevino ĉijare eniros mezgradan

lernejon. Kiel granda estas la ŝanĝo de nia vivo! Sciu, en la jaro de Liberiĝo ŝi ankoraŭ ne naskiĝis!

En 1949, nia familio konsistis nur el ses anoj, kaj apenaŭ povis teni niajn vivojn per metilaboro, kaj la frato, fininte elementlernejan lernadon, restis en la hejmo sen laboro. Sed nun la familianoj jam plimultiĝis ĝis naŭ, la frato, bofratino kaj fratino sinsekve suriris laborpostenojn, kaj nia vivo pliboniĝas jaron post jaro.

En la letero mia fratino diris krome, ke lastjare nia komunumo havis riĉan rikolton, la fizionomio de nia hejmloko tre multe ŝanĝiĝis, malgrandaj vaporŝipoj jam povas rekte atingi nian hejmlokon, la varfo estas ligita kun la nove konstruita aŭtovojo, kaj la surakva kaj surtera trafikadoj estas tre intensaj. Por batalakiri pli riĉan rikolton en tiu ĉi jaro, ili kolektive transportis sterkon al la kamparo.

La letero de mia fratino igis min ekpensi pri demando kiun mi neniam pensis antaŭe: Kiel ni kreskadis kune kun la nova Ĉinio?

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

1400 NOVAJ PRODUKTAĴOJ

Pli ol 1400 novaj industriaj produktaĵoj estis premiitaj en lasta junio de la Centra Registaro. Ili estas aŭ produktaĵoj gravaj por la disvolviĝo de la ĉina nacia ekonomio aŭ novaj atingiĝoj de la scienco kaj tekniko.

Tiuj novaj produktaĵoj apartenas al multaj kampoj de peza kaj malpeza industrioj, komunikado, medicino, edukado, scienca esplorado ktp. En la unua kategorio de la premiitaj troviĝas precizaj maŝinoj kaj instrumentoj, altrapidaj elektronaj kalkulmaŝinoj, kaj en la dua kategorio, inkluziviĝas kompletaj ekipaĵoj por grandaj fabrikoj de nitrogenaj sterkoj, petrolaj rafinejoj kaj hidraŭlikaj elektrostacioj.

RIĈA RIKOLTO DE FIŜKAPTADO

La rikolto de fiŝkaptado en la fiŝejo ĉe la Ĝouŝan-insularo proksima al Ĝegiang-provinco montriĝis duoble abunda ol tiu en lastjara somero. Similaj informoj venis ankaŭ de aliaj fiŝkaptejoj de Ŝandong, Fugian kaj aliaj provincoj.

NOVA TERAPIO POR TOKSA DISENTERIO

Nova efika rimedo por kuraci toksan disenterion, kiu ofte kaŭzis fatalan okazon por infanoj, estas trovita de D-ro Ĝu Ŝouho, fakesstro de Infan-malsanoj de iu hospitalo. La metodo estas arte kaŭ-

* * *

UNU PLIA U-2-AVIADILLO DE USONO-ĈIANG-KLIKO FALIGITA

La 7-an de julio, k.j., la altskolta aviadilo U-2 de Usono-Ĉiang-kliko refoje atencis la ĉinan

zita vintrodormo, dum kiu la korpa temperaturo de la malsanulo malaltiĝas iom post iom. Tiu terapio estas iniciatita en 1958. Post plurjara klinika eksperimentado de aliaj kuracistoj nun ĝi estas vaste aplikata en Pekino kaj aliaj urboj de Ĉinio.


aeron, kaj estis tuj faligita en orienta Ĉinio de nia aertrupo. Tiu estas la 3-a U-2-aviadilo kaj la 10-a spionaviadilo de la kliko faligita de Ĉinio depost 1958. Jen estas listo de la faligitaj dek aviadiloj:

<i>Tipo kaj N-ro de Aviadilo</i>	<i>Dato</i>	<i>Loko de Faligo</i>
RB-57A	18, feb., 1958	Ŝandong-prov.
B-17	29, maj., 1959	Guangdong-prov.
RB-57D	7, okt., 1959	Norda Ĉinio
RF-101C	2, aŭg., 1961	Fugian-prov.
P2V-7	6, nov., 1961	Liaŭdong
U-2	9, sep., 1962	Orienta Ĉinio
P2V-7	19, jun., 1963	Orienta Ĉinio
U-2	1, nov., 1963	Orienta Ĉinio
P2V-7	11, jun., 1964	Norda Ĉinio
U-2	7, jul., 1964	Orienta Ĉinio

JUAN MU:

SURPOSTENE

— Jen Kiel Laboras
Ĉinaj Laboristoj —



Li Tianĝaŭ kontrolas per aŭdo la funkciadon de la maŝino.

Foto de Vang Decun

BONAN sukceson atingis la produktado de Daking-olekampo. Laŭdire, unu el la kaŭzoj estas ke ĉiuj ĝiaj laboristoj laboras konsciencie. Plena de scivolo mi vizitis unu el ĝiaj oleputoj, kie postenis la laborgrupo de Li Tianĝaŭ.

Same en Ĉia Vetero

Nelonge post la finkonstruo de la oleputo, frusomera tagmezo, senĉesa pluvado. Jam estis tempo por fari ĉiuhoran kontrolon de la ekipaĵoj. "Putestro! La pluvo baldaŭ ĉesos, do momenton ni atendu kaj kontrolu iom poste, ĉu bone?" demandis metilernanto Liu Juĝi al la putestro Li Tianĝaŭ. Ili ambaŭ estis en la deĵorĉambro.

"Ne!" Li Tianĝaŭ, kiu estas kompartia membro, dirante elpaŝis el la ĉambro kun ilo en manoj. Li iris unue al la putaperturo ĉambro kaj kontrolis la

ekipaĵojn, poste al la varmiga forno kaj trovis ke ĝia fundo jam estas en akvo, kaj baldaŭ estingiĝos la fajro en la forno. Li fosis sulkon, forfluigis la akvon, larĝigis la malfermajon de la valvo, kaj vigligis la fajron. Li revenis en la deĵorĉambro tramalsekigita. Demetinte la veston kaj tordelpreminte la akvon li diris al Liu Juĝi: "Ju pli malbona estas la vetero, des pli necesas labori laŭ la sistemo." Depost kiam la putestro kontrolis la ekipaĵojn dum pluvado anstataŭ Liu Juĝi, tiu ĉi grupo starigis sian bonan laborstilon: Ili faras regule ĉiuhoran kontrolon pri la oleputaj ekipaĵoj en ĉia ajn vetero.

Same Nokte Kiel Tage

Profunda nokto. Nigraj nuboj la ĉielon kovris. La brigadestro pri oleĉerpado venis al la grupo de Li Tianĝaŭ por kontroli deĵorŝanĝon de la noktaj laboristoj. Precize je la 24-a horo, du laboristoj kune

iris el la deĵorĉambro kaj laŭvice kontrolis la dekojn da "kontrolpunktoj" de la putapertura ekipaĵo. Veninte al la ole-gasa apartigilo, la deĵoranto Li Ĵungi mantuŝis la vitran tubon kaj diris kapskuante: "Netolereble! Jen olekoto sur ĝi. Mi transprenos la deĵoron nur post kiam vi elpurigos ĝin." La deĵoranto tuj prenis pecon da felto kaj frotepurigis la tubon ĝis plena brileco antaŭ ol forlasi sian postenon.

La sekvan tagon, laboristoj diris al Li Ĵungi: "La estro kaŝe kontrolis vian laboron hieraŭnokte!" "Tion ni ne timas. Ni laboras same nokte kiel tage!" ridis Li Ĵungi.

Same dum Ĉeesto kaj Foresto de la Gvidantoj

Alia vespero. Ĉio en nebuleca pluveto. Li Tianĝaŭ venis al la puto por kontroli laboron. La fosforaj montriloj de lia horloĝeto montris ke jam estas 57 minutoj post la 7-a. "Restas nur 3 minutoj ĝis la 8-a. Ĝang Giahiang jam devas sin prepari por la kontrolirado. Kial ankoraŭ regas mallumo ĉe la puto?" Nekomprenoble. Ĝuste tiam eklumiĝis la lampo ĉeputa kaj el la deĵorĉambro elpaŝis homo kun tuboturnilo en mano, kaj rapidis al la aperturejo. "Jen li! Akurata kiel horloĝo!" Li Tianĝaŭ vidis ke Ĝang Giahiang laŭvice kontrolis ĉiujn "punktojn" de la apertura ekipaĵo, kaj faris kontroliron laŭ la tubolinio vadante en ko'lo. Poste Li Tianĝaŭ eniris la deĵorĉambrom kaj diris al Ĝang Giahiang: "Ĝang-ĉjo, tre severe vi kontrolis hodiaŭ!" Tiu ĉi respondis: "Ne zorgu pri nia laboro, kamarado putestro. Same ni laboras dum ĉeesto kaj foresto de la gvidantoj!"

Same kun aŭ sen Kontrolo

La grupo de Li Tianĝaŭ starigis regulon por sia kontrolado: farante la ĉiuhoran kontroliron pendigi al ĉiu funkcia maŝino tabuleton kun la vorto "Funkcia" kaj al ĉiu haltigita maŝino tabuleton kun la vorto "Haltigita". Kaj tiu regulo estas severe observata. Iunokte tuj post la 24-a horo, Li Tianĝaŭ ŝteliris al la puto, kaj deprenis la tabuleton de "Funkcia" sur la ingotuba valvo kaj pendigis sur ĝi anstataŭe "Haltigita" kaj foriris.

Frumatene de la sekva tago, li iris al la puto por kontroli. Li legis jenan noton en la taglibro de nokta deĵoranto: "La unuan horon nokte, malkovriĝis ke oni erare pendigis sur la ingotuba valvo la tabuleton "Haltigita" anstataŭ tiun de "Funkcia". Leginte tion Li Tianĝaŭ ridis. Rimarkinte lian ridon la nokta deĵoranto preskaŭ tute certiĝis pri la kaŭzo kaj demandis: "Putestro, ĉu vi ŝanĝis mian tabuleton?" Li Tianĝaŭ diris: "Jes, mi provis vian laboron kontroli!" La nokta deĵorinto sonore ridis: "Kio ne en ordo? Ĉiam same kun aŭ sen kontrolo!"

Pro tio ke la laboristoj de la Li Tianĝaŭ-a Grupo havas la bonan laborstilon "Kvar-same-an", la oleputoj de ili prizorgataj jam produktadis sekure dum

pli ol 180 tagoj, superplenumante ĉiun sian monatan produktoplanon.

Guto da Akvo

Bela mateno. Li Tianĝaŭ estis helpanta laboron de la deĵorantoj ĉe la puto. Subite li trovis, ke sur la pinto de plumba balasto elputigita estas guto da akvo en grandeco de fabograjno. "Akvero! De kie alvenis akvo en la puton?" Eĉ guteto da akvo ne preterglitis liajn akrajn okulojn sen rimarko. Li volis ĝin zorge depreni, sed neatendite, ĉe ekmovado de la pezajo, la akvero forruliĝis.

Li Tianĝaŭ, tamen, pensadis pri tio dum kelkaj tagoj. Kune kun aliaj laboristoj li studis de kie venis tiu akvero.

Post longa atenta laboro ili sukcesis elpreni akvekzemplon el la apartigilo kaj senprokraste sendis ĝin al la laboratorio por analizo.

La rezulto montris, ke la akvo estas praloĝanto de la geologia tavolo. Sed Li Tianĝaŭ kaj aliaj ne povis trankviliĝi.

"Al kiu akvotavolo ĝi apartenas? En kiu parto la akvero penetris en la putotubon?" Ili volis ĝisfunde solvi la problemon.

Tial ili elserĉis la registrojn pri la putotraborado antaŭ kelkaj jaroj kaj faris analizadon kaj esploradon dum ok monatoj, ĝis kiam ili trovis la pozicion de la akvotavolo laŭ la diagramoj de la puta temperaturo kaj de elektra mezuro, certiĝis pri la kaŭzo kial la akvero eniĝis en la oleputon kaj eltrovis rimedojn por funkciigi la puton normale kaj senĉese. Nur tiam ili fariĝis trankvilaj.

Demandite kial ili havas tiom grandan intereson en guto da akvo, Li Tianĝaŭ diris: "La posteno de oleĉerpistoj estas kaj sur kaj sub la tero. La tuta popolo konfidis al ni la administradon de la oleputo, estas nia devo ĝin bone prizorgi."

PENSEROJ

- * La malvero deziras forgluti la veron, sed mem fariĝos nur ĝia nutraĵo.
- * Artefaritaj floroj belaj povas trompi la papiliojn, sed ne la abelojn.
- * Eĉ dum veturo sur plej rekta ŝoseo oni devas firm teni la direktilon.
- * La vortoj — nur floroj, la agoj — fruktoj.
- * La ombro ĝojas pro sia giganteco, sed tiu grandeco ja rezultigis el tio, ke ĝi estas malproksime de la lumo.
- * Kiam la aglo flugas, ĝi tranĉas la nubojn per siajflugiloj; kiam ĝi ripozas, ĝi alte staras sur rokego. Ĝi neniam sin kaŝas en herbaĉoj.
- * Ifoje ankaŭ la majesta pino delasas velkintajn foliojn kaj branĉetojn, sed neniam ŝanĝiĝas ĝia frostospita naturo.

Duafoja Vivo

Ilustraĵoj de Ĝou Ĝianfu

ONI diras, ke la vivo estas donata al ĉiu homo nur unufoje. Sed mia edzo Hju Vejming ja ricevis vivon duafojan.

NEATENDITA MALFELIĈO

Mi kaj mia edzo estas geinstruistoj, li instruas en la Tria Mezlernejo de la urbo Baŭding kaj mi en la Hianhjue-strata Elementa Lernejo. Nia naŭjara filo lernas en Pekino, kaj nia kvarjara filineto vivas ĉe ni.

En la somero de la pasinta jaro sur Vejming falis tuberkuloza encifalito. En la komenco ni ĝin preteratentis, kaj kiam li estis kuracata en la hospitalo, lia malsano jam fariĝis sufiĉe grava kaj danĝera.

Senmove starante ĉe la lito, mi rigardis mian edzon implikiĝintan en aron da diversaj tubetoj: tubeto por injekti fluidaĵon, tubeto por injekti sangon, tubeto por eligi urinon kaj tubeto al la stomako. Mi malĝojis pro tio, ke mia edzo estas senespera, kaj mi ankaŭ estis kortuŝita pro tio, ke kuracistoj kaj flegistinoj faris kion ili povis por savi lin. Ĉiufoje, kiam mi ploris, kuracistoj, flegistinoj kaj gvidantaj kamaradoj de la Tria Mezlernejo tuj min konsolis:

“Ne ĉagreniĝu, ni energie klopodos lin savi!”

“Se nur lia koro ankoraŭ batas, ni certe lin savos el la danĝero!”

INTER VIVO KAJ MORTO

Dum kelkaj tagoj la malsano de Vejming estis en krizo. Mi lin flegis tage kaj nokte, kaj gekamaradoj ofte min anstataŭis post siaj klashoroj, por ke mi povu ripozi. Poste, vidante ke mi jam ne plu povas elteni, ili konsilis al mi iom ripozi hejme. Mi pensis, ke se li jam neniel povos esti savita, do mi revenu hejmen por iom prepari por li la postmortan aferon.

Reveninte hejmen, mi malfermis vestŝrankon kaj eltiris liajn vestojn: “Tiun ĉi veston li

ŝatas, do li ĝin portu, tiu ĉi estas lia. . . .” Mi ordigis, murmuris kaj miaj larmoj surverŝiĝis sur la vestojn, kiuj baldaŭ foriĝos kun la homo. . . .

Portante en la brakoj la vestojn por la mortanto, mi faletante kaj ŝanceliĝante venis al la hospitalo. Apenaŭ mi enpaŝis ĝian pordon, kiam iu flegistino min sciigis: “Jam estas espero!” Verŝajne ŝi ĝojis eĉ pli ol mi.

Jen kio okazis: Post kiam mi foriris de la hospitalo, oni denove okazigis specialan kunvenon kaj decidis ankoraŭfoje fari streĉan klopodon por savi mian edzon.

Enirinte en lian ĉambron, mi ekvidis, ke liaj okulharoj moviĝas. Ĉu vere? Mi viŝis miajn okulojn kaj denove lin rigardis: Tute vere! Mi rigidigis, la pakajo de la vestoj en la brakoj falis sur la plankon. Rigardante Vejming reviviĝantan, senvole mi rememoris pri la morto de mia pliaĝa fratino.

Sur mian pliaĝan fratinton falis virina malsano, kiu tute ne estas nekuracebla. Sed nur pro tio, ke ŝi ne povis esti kuracata ĝustatempe kaj estis timigita



de japanaj agresantoj, ŝi baldaŭ mortis. Sed nun kvankam mia edzo trafis mortan malsanon, tamen li reviviĝas.

MEDIKAMENTO EKSTER LA MEDIKAMENTOJ

En la hospitalo Vejming restis plenan duonjaron, gekamaradoj savis lin de la rando de morto. Mi pensis, ke multajn detalojn Vejming ne sciis, sed foje, kiam mi apogis lin por ekzerci sin en paŝado, subite li diris emocie: "Pejhua! Mia malsano povas esti kuracita nur dank' al medikamento ekster la medikamentoj. La prizorgoj de la organizo donis al mi kuraĝon kaj forton por transvivi mian malsanon!" Aŭdinte lin mi ekmemoris la okazintaĵojn.

Kiam li ĵus rekonsciiĝis el sia sveno, la kuracisto diris, ke estus bone doni al la malsanulo iom da suko el lotusradiko, kiu povas vekti la apetiton, ĉar li jam pli ol dudek tagojn nenion enbuŝigis, nek akvon, nek rizon.

Tion eksciinte, la sekretario de la kompartia ĉelo de la Tria Mezlernejo tuj revenis al la lernejo, refaldis la pantalonubojn, eniris en la lotusejon kaj elfosis freŝan lotusradikon. Krome, li sendis ankaŭ alian kamaradon al loko kelkdek liojn for por aĉeti akvokaŝtanojn. Kiam mi manĝigis al la malsanulo sukron de lotusradiko kaj akvokaŝtanoj kaj sciigis lin de kie oni akiris la lotusradikon kaj akvokaŝtanojn, tiam kvankam li ankoraŭ ne povis elparoli, tamen larmoj senĉese fluis el liaj okuloj. La zorgado de la Partio plifortigis lian memfidon kontraŭ la malsano.

Kiam lia vivo estis en danĝero, direktoro Hju de la hospitalo venadis lin rigardi tri- aŭ kvar-foje en ĉiu tago. La sekciestro de internaj malsanoj Li Tingfang kaj kuracisto Ĉen Ŝikun kaj aliaj lin prizorgis preskaŭ tutajn tagojn. La instruistoj de la Tria Mezlernejo kaj akompanis la malsanulon apud la lito kaj klopodis ekstere por li. Ĉiajn nutraĵojn, kiajn li volis manĝi, ili portis al li. Kiam la malsanulo bezonis injekton de sango, laboristo kaj lernantoj de la Tria Mezlernejo ĉiuj sin proponis por oferi sian sangon al li.

Tion vidinte, Vejming ne povis trankvile kuŝi de ekscitiĝo. Kiel bonegaj kamaradoj! Kiel bonegaj knaboj!

ĈIE TROVIĜAS KARULOJ

Dum la duonjara flegado de la malsanulo kortuŝaj aferoj estis multaj kaj nefinrakontebaj.

Nia kvarjara filineto Mimi restis hejme, kaj ĉirkaŭ unu monaton mi ŝin ne prizorgis. Sed ĉiufoje mi vidis ŝin sate manĝinta kaj ŝiajn manojn, vizaĝon kaj vestojn ĉiam puraj. Kies manĝon ŝi manĝis en tiuj tagoj? Kiu ŝin lavis? Kiu instruis ŝin kanti novajn kantojn? Kiu al ŝi rakontis rakontojn? Kiu akompanis ŝin dormi nokte? Respondi tiam mi ne povis. Mi demandis Mimi, sed ŝi nur diris: "Onklo estas bona, onklino estas bona, fratoj, fratinoj ĉiuj estas bonaj." Nur poste mi sciigis, ke iuj geinstruistoj donis al ŝi gepatrajn prizorgojn. Foje mi revenis hejmen, sed nenie mi povis trovi mian Mimi. Poste mi trovis ŝin en la domo de instruistino Huang Vengjuan. Tie ŝi manĝis, kaj instruistino Huang almetis al ŝia bovlo viandon pecon post peco. Tion vidinte mi estis plena de dankoj, sed ne povis trovi taŭgajn vortojn por min esprimi.

Dum la flegado pri la malsanulo mia laboro estis konkure portata de miaj gekolegoj. La lernejestro, direktoro de instruado kaj aliaj geinstruistoj ofte min vizitis, kaj min konsolis: Ne zorgu pri la laboro, sed bone flegu la malsanulon. Kiam alvenis la tago de salajrpago, ili rapide sendis al mi la monon.

Kiam mi rememoras ĉion ĉi tion, mi demandas min: Ĉu Hju Vejming estas sole mia karulo? Ne, ne sole mia, ĉar la duafojan vivon al li donis ĉiuj kiu lin helpis.




ARTAJ FOTOJ de Huang Hiang


Huang Hiang, unu el la famaj fotartistoj de Ĉinio, naskiĝis en 1904 en Ĉangjang-gubernio, Hubej-provinco. Li komencis fotadon jam en 1921, kaj ekde la jaro 1948, li faris grandan progreson en studo de la fotarto, kaj kreis ne malmulte da belaj fotoj. Dum la pasintaj dek jaroj li vizitis pli ol dudek provincojn kaj urbojn, kaj kreis multajn novajn verkojn. La jenaj estas elektitaj el tiuj kiujn li faris dum la lastaj jaroj.




Aŭtuno ĉe la Monto Huangsan (Anhuj-provinco)



Montoj Similaj al Smeraldaj Harpingloj (Gujlin en Guanghi-provinco)





La Fonto de Songhua-rivero (Gi-
lin-provinco en nordorienta Ĉinio)

K U R A Ĝ O

MI havas plej intiman kunlernanton nomitan He Ĉang. Ni ambaŭ estas fervoraj teatraj-amantoj. Se teatraĵo prezentiĝas en iu ajn proksima loko, tiam ni nepre iras tien por rigardi, kiom ajn longa estas la vojo kaj malbona la vetero, kaj tion ĉi ni faras spite malsaton kaj riproĉojn de plenkreskuloj. Kelkiam, misinformite, ni estis vane irintaj pli ol dek liojn da vojo kaj vidis nenian prezentadon, sed ni ne plendis. He Ĉang diris: "Kuraĝo tio ja estas."

Iufoje, kiam mi hejmen revenis el la lernejo, panjo diris al mi: "Erbaŭ, morgaŭ iru en la urbon por alporti kelkajn bambuidojn al via fratino." Antaŭ ol mi ekparolis, He Ĉang jam senprokraste donis konsenton: "Iru! Ekiru jam nun!" Tion dirante, li kaŝe faris al mi signon de teatraĵo. Mi ekĝojis: "Bone, ni do iru kune." Panjo ĵetis rigardon al la ĉielo kaj hezite diris: "Jam estas malfrue. . ." He Ĉang elstarigis sian bruston: "Onjo, ne ĝeniĝu per zorgoj, se ni iros kune!"

Ricevinte permeson de sia patro, He Ĉang ĝojege ekiris kun mi al la urbo. Ĉe la ekiro li jam diris al mi:

"Jen bona novaĵo: La provinca oper-trupo venis al la gubernia urbo. Ĉivespere ni nepre satĝuu spektaklon."

Mi kompreneble estis tre ĝoja, sed, rimarkinte la subirantan sunon, mi tuj malpacienciĝis: "Kiamaniere ni povos ĝustatempe atingi la urbon?"

Iom gratinte al si la kapon, He Ĉang ekhavis ruzon: "Ni veturu per ŝarĝaŭto."

"Per ŝarĝaŭto? Ja neniun ŝoforon ni konas! Kiu do volus nin veturigi?"

Farante geston de "vojbarado al aŭto", li diris: "Ni diru: Onklo ŝoforo, ni devas pli frue atingi la urbon pro urĝa afero. Bonvolu nin helpi. . ."

Mi iom cerbumis kaj trovis tion ne taŭga. Mi diris: "Tamen malobservi la trafik-regularon mi ne kuraĝas."

"Vi ne kuraĝas? Timemulo!" He Ĉang ekkoleris. "Mi mem baru la vojon kaj vi min helpu nur per peto. Ĉu bone?"

"Tion mi povus," mi konsentis kontraŭvole.

Ni do kaŭriĝis ĉe rando de la ŝoseo. Malfeliĉe, tiun tagon sur la ŝoseo veturis tiom malmulte da aŭtoj, ke ni ekaŭdis motorbrulon nur post pli ol duonhoro.

He Ĉang ekĝojegis tiel, ke li faris transkapiĝon sur la tero. Sed mi, mi ne sciis kial, tre ektimiĝis, ke mia koro tamburis kaj miaj lipoj tremis. Vere, tian aventuron mi neniam spertis. Tamen mi penis

laŭeble min ŝajnigi kuraĝa kaj montri al He Ĉang nenian malkuraĝon.

Ŝarĝaŭto fluge ĵetis sin al ni. La ŝoforo ripete sonigis la kornon jam de malproksime.

He Ĉang neniom timis la averton. Li senĉese svingadis siajn manojn, starante meze de la ŝoseo.

"Knar! Ss—" La aŭto sin haltigis abrupte.

El la aŭto elsaltis barba ŝoforo, kiu kun rondigitaj okuloj kolere kriegis:

"Diablotoj! Ĉu vi ne volas vivi plu?"

He Ĉang respektive riverencis al la barbulo kaj diris kun rideto:

"Pardonu al ni, onklo ŝoforo. Ni havas peton, ke. . ."

Antaŭ ol He Ĉang finis la parolon, la barbulo jam nin ekinstruis: "Kian peton? Vi volas veturi per mia aŭto? La ŝarĝaŭto ne povas veturigi homojn!" Parolante li enaŭtiĝis kaj laŭte kriis: "Flanken, vi bubaĉoj mortospitaj!" Li ekmovis sian piedon kaj la aŭto ronkis kaj forveturis.

Tiam mi ĵetis rigardon al He Ĉang: li mordvundis sian lipon pro kolerego.

"Erbaŭ, ni nin nepre venĝu! Amarajon ni igu lin gustumi en la estonto."

"Jes. Sed nun ni rapidu al la urbo por ĝui teatraĵon." Mi kaptis lian manon kaj ekiris lin tirante. . .

Ni atingis la teatron forte spiregante. Direktinte la rigardon al la giĉeto, ni vidis du grandajn vortojn tie: BILETOJ ELĈERPIĜIS. Mi kaj He Ĉang preskaŭ ekploregis. Nature ni kulpigis la barbulon pri ĉio ĉi kaj pli firme decidis fari venĝon al li.

Iun matenon post du monatoj mi hazarde renkontis la ŝarĝaŭton de la barba ŝoforo. Mi intencis fari venĝon, sed mi tuj ŝanceliĝis, kiam mi ektrovis min sola tie. Mi pensis, ke ĝi certe revenos. Sekve mi rapidis al la hejmo de He Ĉang por lin informi. Malfeliĉe li forestis por viziti sian avinon. Kion fari? Kiam mi ekmemoris la ofendon, kiun la barbulo faris al ni, mia koro tuj pleniĝis de bolanta sango. Mi nepre venĝos la ofendon. Se tion mi jam faros, He Ĉang certe ne plu nomos min timemulo.

Tiun tagon la aero estis tiel sufoko varma, ke ŝajne pluvego estis neevitebla. Mi embuskis ĉe ŝoserando kun terbuloj kiel obusoj en la manoj. Kun malsata stomako mi atendis kaj atendadis ĝis krepuskiĝo, sed la aŭton mi ne vidis. Subite de malproksime eksonis motorbruo. Mi tuj pretigis min por atako. Levinte la rigardon, mi tuj vidis ke ĝi estas ĝuste la aŭto de la barbulo. Mi ekkoleris, tamen mia kolero estis miksitita kun ĝojo. Rapide la aŭto galopis. Kiam mi estis preta ĝin kanoni, la aŭto, kiu

estis plensarĝita, ŝanceliĝis pro malglataĵo sur la ŝoseo dejetante el si du grandajn pakojn sur la ŝoseon.

Mi alproksimiĝis al ili: Ha, sur ili vidiĝis jenaj vortoj: "KEMISTERKO", "NE MALSEKIGU". Mi ne povis min deteni de ekĝojo: "Vi barbulo malzorgema! Mi do vidos kiel vi respondos pri la perdo de la pakoj." Subite eksplodis neatendita tondrego, kiu kvazaŭ skuis la montojn kaj tremigis la teron, kaj



pizograndaj pluveroj ekfrapadis mian kapon. Mi estis jam forkuronta, kiam mi subite ekmemoris la vortojn, kiujn mia instruisto ofte diris al mi: Ni devas prizorgi la publikajn proprajojn. Sendube la du pakoj da kemisterko estas publika proprajo. Se oni sterkos kampon per ĝi, pli da greno certe povos produktiĝi. Tiam mi jam forgesis la neplenumitan venĝon. Kun granda forto, kiu venis mi ne sciis de kie, mi tiris unu el la du pakoj sur la alian, demetis mian veston, kaj kovris per ĝi la pakojn. La pluvo ĉiam pli densiĝis. Kiam mi estis en embaraso pro manko de rimedo, venis homo de malproksime. Hura! Li estis He Ĉang, hejmen revenanta sin ŝirmante per ombrelo.

Vidante min en tia situacio, li tuj etendis sen-vorte la ombrelon super min. Ankaŭ li demetis sian veston kaj kovris per ĝi la pakojn.

Dum la fulmotondro mi rakontis al li la historion de la pakoj. Neatendite li laŭdis min kiel veran kuraĝulon kaj aldonis, ke poste ni ne plu pensu pri venĝo. Mi opiniis liajn vortojn pravaj, sed samtempe mi plendis al li: "Kial vi ne diris tion pli frue? Vane mi atendadis du monatojn kaj hodiaŭ mi eĉ nenion manĝis pro atendado?" He Ĉang diris kun amara rideto: "Ankaŭ mi ekkomprenis tion nur en la hodiaŭa tago."

JANG KUANGHAN:

JUNA ŜAFISTINO

LA nokto sur la stepo plene kvietis kaj ne ĝenis eĉ per brueto. Sed post la noktomezo min vekis kanto bela kaj senpompa, kiu jen kaj jen albloviĝis. Ju pli mi aŭskultis, des pli mi raviĝis. Mi puŝe vekis la gvidiston, kiu povosciis la mongolan kaj hanan lingvojn, kaj petis lin kapti la ŝvebantajn sonojn kaj interpreti por mi la kortuŝajn vortojn:

*Alteĝajn montojn aglo povas
ja transpasi,
ĉar du flugilojn fortajn ĝi
posedas.*

*Pro kio la ŝafar' de l' komunumo
povas tiel grasi?*

*Ĉar por ĝin flegi niaj lertaj
manoj pretas.*

*La sun' la stepon superŝutas
per orlumo,
paŝtistoj marŝas sur ĝi kun
sunplena koro.*

*La fortojn mi dediĉas al la
komunumo.*

*Patrion mian mi glorigas per
laboro.*

La kantanto estis neniu alia ol nia vizitota knabino, la modela ŝafistino Ŝajengaŭva. Ŝi gaje revenis en la lunlumo, post la model-elekta kunveno de la produkta brigado. La gvidisto diris al mi: "Preskaŭ ĉiu mongolo povoscias kanti, kaj la knabino jam lertis en tio apenaŭ kiam ŝi povis svingi vipon. Kiu laboras plej bone, tiu ofte ankaŭ kantas plej ĉarme kaj sonore. Ŝajengaŭva ĝuste estas tia knabino."

Veron li diris. La dudekjara Ŝajengaŭva paŝtadas ŝafojn jam de sia sesa jaro. Ŝi ĉiam volonte prenas sur sin la plej pezan produktan taskon. En la komenco de la kuranta jaro ŝi hejmenre-

venis fininte sian kurson organizitan de la distrikto, sed antaŭ iri al sia hejmo ŝi unue vizitis la estron de la produkta grupo por ke li asignu al ŝi laboron. La grupestro diris, ke ĉiuj ŝafgregoj jam estas paŝtataj kaj bredataj respektive de komisiitaj komunumanoj. Nun restas nur 50-60 malsanaj ŝafoj ne-prizorgataj kiujn verŝajne oni devos sendi al buĉejo. Ŝi diris: "Ŝafo estas trezoro de la ŝtato kaj la vivo de la komunumo. Se mankas bredanto, mi volonte ilin prizorgos." En la sama tago ŝi jam venigis la skeletajn ŝafojn al sia hejmo kaj kuŝigis la senfortajn ŝafinojn en tendon speciale por ili aranĝitan kaj purigitan. Ekde tiu tago ŝi ŝparadis buteron, brandon kaj sukeron por manĝigi al ili. Nokte, se nur aŭdiĝis eta bruvo, ŝi ĉiam tuj eliris haste kun surmetita

vesto kaj lanterno en la mano por rigardi la ŝafojn. Fine ili ĉiuj resaniĝis.

Sed Ŝajengaŭvan trafis ne-atendita malfeliĉo, ke ĉe la komenco de majo la ŝafaro de ŝi bredita estis infektita de variolo. Oni klopodis por ĝin kuraci, sed vane, kaj ŝi tre maltrankviliĝis. Poste ŝi informiĝis, ke malproksime de tiu ĉi loko estas maljuna paŝtistino, kiu povas kuraci tian malsanon. Ŝi unuspire galopis sur ĉevalo ĉ. 50 kilometrojn, kaj akiris indiĝenan recepton. La kuracprovo montriĝis efika. La 30-an de junio, kiam finiĝis la paŝtojaro, oni konstatis ke ne nur neniŭ el tiuj ŝafoj mortis, ili eĉ multe grasiĝis. Estis ĝojige, ke unu ŝafino naskis du amindajn viglajn ĝemelojn.

Poste mi ŝin demandis: "Kiel vi havigis al vi la kapablon tiel bele kanti?" Ŝi respondis tiel senĝene kaj signifoplene: "La stepuloj ĉiuj mem komponas kaj kantas, kantas pri tio, kion ili faras kaj pripensas." Jes, ja plenfreŝa floro elburĝonanta el ŝia koro estis la kanto, kiun ni aŭdis en la lasta nokto, kiu tiel forte kortuŝis. En tiu kanto la vortoj ja harmonie sonoris kun la vibrantaj kordoj de la koro!



Ilustraĵo de Jang Hianjang

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

EKSPOZICIO DE NOVAJ LUDILOJ

Antaŭ nelonge okazis en Pekino Ekspozicio de Novaj Ludiloj en kiu montriĝis pli ol 500 specoj de ludiloj kaj infan-vestaĵoj. Ĝi vekis grandan intereson de la infanoj kaj la gepatroj.

Inter la ludiloj troviĝis elektre funkciata "konkurso de tabloteniŝo". Kiam ĝi estas funkciigita, la du ludantoj ĉe la malgranda verde lakita tablo eksvingas siajn frapilojn kaj la pilko komencas flugi tien kaj reen super la tableto. Flanke ĉe la tableto estas rekord-tabuleto, kiu povas montri la rezultaton de la konkurso.

BRONZA PEZILO ANTAŭ 2000 JAROJ

Bronza pezilo por gradigita vekt-pezmezurilo uzata en la tria jarcento a. K. estas elfosita lasttempe en Ŝenhi-provinco. La loko kie oni ĝin trovis estis la sidejo de la fama Ofang-palaco, la imperiestra palaco de Kin-dinastio. Sur la pezilo troviĝas multaj ideografiaĵoj kiuj montras, ke la pezilo estis muldita en la jaro 244 a.K., kiam regis la Unua Imperiestro de Kin-dinastio aŭ en la jaro 248 a.K., kiam regis lia patro. Ĝi pezas 30.75 kilogramojn kun alto de 17.2 cm. kaj diametro de 23.6 cm. ĉe la bazo. Tiu trovo estas

tre valora por studo de la sistemo de pezmezuro en tiu tempo.

GIGANTA FOSILIO DE DINOSAŬRO

En lasta junio estis elfosita en Siĉuan-provinco giganta fosilio de dinosaŭro. Dinosaŭro estis speco de reptilioj kun kvar membroj vivanta de antaŭ 160 milionoj da jaroj ĝis antaŭ 70 milionoj da jaroj. La spino de la fosilio laŭtakse estas 40 cm. larĝa kaj la korpo estas 20 metrojn longa kaj du metrojn alta. Ĝi estas la plej granda el la tri samspecaj fosilioj elfositaj en tiu provinco deŝt 1949.

En la Sklava Vilaĝo

MALASINF*

EN neĝa tago aparte mirinda estas la vidaĵo sur Korsin-stepo. La vilaĝoj kovriĝas per dika tavolo da blanka neĝo. La tegmentoj, muroj k. s. ĉiuj portas blankajn ĉapojn. En palpebruma daŭro ĉio fariĝas ŝajne multe pli alta. La fenestroj de la vicoj post vicoj da domoj vidiĝas kvazaŭ okuloj ŝtelrigardantaj, tra la palblanka neĝkurteno, la grizan stepon kaj la nebulecan forajon.

La kanto de la neĝo, kiu tuttage sonis sub niaj piedoj, estis haltigita ekster la sojlo; ni eniris en la sidejon de la administra komitato de la Produkta Brigado de la Sklava Vilaĝo. Post kiam ni trinkis la ĉiam ankoraŭ deziratan nigran teon kaj babilis pri la neelĉerpeblaj ĉiutagaj temoj, la partisekretario kompleze faris aranĝon por nia tranoktado kaj rimarkinte ke la tempo estas jam malfrua diris: "Jam tutan tagon vi piediris, do iru dormi pli frue kaj ni rebabilu morgaŭ." Post tio li hejmeniris.

La sidejo de la administra komitato estas kabano el tri ĉambroj. Ni loĝis en la okcidenta ĉambro kaj la orienta ĉambro trans la meza estas la oficejo de la kasisto, kie ankoraŭ brilis lampo. La partisekretario ĵus diris al ni, ke la librotenisto en la ĉambro sin okupas nun pri la kalkulo de la jarfina dividendo kaj enlitiĝas tre malfrue, kaj ke se ni havos ian bezonon, ni iru al li. Vidante la brilan lamplumon, ni povis bone imagi al ni, kiel okupita estas la juna librotenisto, kaj ni ne volis lin ĝeni.

Profundiĝis la nokto kaj ĉesis la neĝado. Mi eliris sola el la domo. Ekstere nek blekis ŝafoj, nek muĝis bovoj, nek henis ĉevaloj kaj nur zumis senĉese la dizelo en la elektrejo de la produkta brigado. Ŝajnas al mi, ke la nokto en la nordo estas pli ŝatinda ol tiu en la sudo. Se la nokto en la sudo estas komparebla kun bela gracia junulino, oni do povas kompari tiun en la nordo kun brava majesta junulo.

Sur la strato mi konatiĝis kun Ĉamusu, la juna elektra laboristo de la produkta brigado. La junulo estis dekok-naŭ-jara, kun paro da okuloj plenaj de revemo kaj scivolemo, kaj sur lia vizaĝo ĉiam ludis naiva rideto. El la interparolo kun li mi eksciis, ke li estas "beletromaniulo", metilernis ĉe la blinda rakontisto Hade en la vilaĝo, legis multajn modernajn novelojn kaj skribis kelkajn mallongajn artikolojn, inter kiuj unu priskribas kiel ilia produkta brigado komencis produkti elektron. Ĉiuj tiuj verkoj estis ŝlositaj en lia ilkesto kaj ne senditaj al iu ajn

* La aŭtoro de tiu ĉi artikolo estas fame konata mongola verkisto, kiu verkis interalie la romanon "La Signalfajroj sur la Stepo".



Ilustritaj de Luo Er'eun

jurnalejo aŭ gazetejo. Kun ambicio li diris: "Estas ankoraŭ ne la tempo por mi publikigi artikolojn." Li tre volentis servi kiel mia gvidisto kaj akompanis min promeni sur la stratoj en la nokto. Sub strata lampo mi vidis du maljunulojn ludantaj ŝakon. Ĉar la ŝakludo estis furioze progresanta sur tre alta nivelo, ni preferis foriri ol ilin ĝeni.

"Ili ankoraŭ ludas ŝakon eksterdome dum tia forta neĝado!" Mi pensis, ke la du maljunuloj ja havas gajan sentimenton.

"Se nur ne ventegas aŭ pluegas, ili tiel agas ĉiutage," diris la juna elektra laboristo. "Dum la plejparto de sia vivo ili servis kiel sklavoj. En la unua tago kiam elektro estis produktata en nia sklava vilaĝo, ili vidis elektrajn lampojn kaj ambaŭ larmis nereteneble!"

Aŭdinte lian mencion pri la vilaĝnomo, mi tuj prezentis al li la demandon, kiu restis ĝis nun ne solvita en mia koro: "Kial via vilaĝo estas nomata Sklava Vilaĝo?"

"Ĉar en la pasinteco ĉiuj loĝantoj en nia vilaĝo estis sklavoj de lordoj kaj riĉuloj."

"Ĉu ankaŭ vi estis sklavoj?"

"Mi estas filo de sklavino."

"Ĉu viaj gepatroj ambaŭ estis gesklavoj?"

"Mia patrino estis. . . ."

"Kaj via patro?"

"Mi ne havas patron."

Ektremis mia koro, kaj mi ĉesis demandi plu.

Iam antaŭe mi aŭdis pri la malfeliĉa sorto de multaj sklavinoj, ke ili estis nur parolantaj bestoj de siaj mastroj kaj havis nenian homan rajton. Tre multaj sklavinoj estis ordonitaj edziniĝi al balailo aŭ fajrstango, ke al ili estis senigita la libero de enamiĝo kaj edziniĝo. Sub diversaj malfelĉaj cirkonstancoj, ankaŭ iuj el ili naskis infanojn—infanojn senpatrajn, kiujn ili nutris per lakto farita el iliaj larmoj ĝis plenkreskiĝo. Evidente Ĉamusu estas unu el tiaj sklavidoj.

"Kiel vi fariĝis elektra laboristo?" Por ne tuŝi lian vundon, mi intence elmetis novan paroltemon.

La junulo ekridis, kaj kapklinante piedfrapis ŝtoneton sur la strato. Li diris honteme:

"Kia elektra laboristo mi estas! Kie mankas kok' por veko, tie servas kamelbleko!"

"Ĉu vi lernis elektroskiencon?"

"Ne."

De post li gradiĝis el supera elementlernejo en 1957, la Poŝta kaj Telegrafa Oficejo de la Ligo** ĝuste varbis leterportistojn, kiuj scipovas kaj la mongolan kaj la hanan lingvojn. Li sin anoncis kaj estis akceptita. En 1958, kiam la dezerta akvokonservejo estis konstruata, li, kiel oficisto de la Poŝta kaj Telegrafa Oficejo, iris helpi la konstrulaboron. La tasko de la konstruado estis tiel urĝa, ke en la aliaj konstruaj distriktoj kie elektraj lampoj estis instalitaj, oni laboris tage kaj nokte. Sed pro manko de elektristo en la konstrua distrikto kie li laboris, elektraj fadenoj ne povis esti instalitaj kaj lumigo en la nokto estis neebla. Multe da utiligebla tempo forglitis kaj la konstruantoj estis tiel maltrankvilaj, ke ruĝiĝis ĉies okuloj.

Tiam ĉiuj, kiuj venis de la Sklava Vilaĝo, sciis ke Ĉamusu laboris en la Poŝta kaj Telegrafa Oficejo kaj petis lin etendigi la elektrajn fadenojn ĉi tien por instali lampojn. Li respondis, ke li ne povas, sed neniu tion kredis. Iuj eĉ plendis: "Kia junulo vi estas! Vidante ke malfruiĝas kaj postiĝas la konstrulaboro en nia konstrua distrikto, vi ankoraŭ ludas ruzajon. Vane vin kulturis la ŝtato dum tiom da jaroj! Vane vin edukis via avo kun tiom da peno!" Kvankam li ne scias kiu estas lia patro, tamen li havas avon patrinflankan. Kiam oni mencias la ŝtaton kaj la avon, nenion li povis eldiri plu. Kvankam ke li sentis ke la senfinaj plendoj estas maljustaj kontraŭ li, tamen li jam ne plu povis diri la vortojn "mi ne povas". Ĝuste tiam la partisekretario de la direkcio de la konstrua distrikto vokis lin kaj havis tre seriozan interparolon kun li, kio efektive metis lin en malfacilan situacion. Sidante ĝuste kontraŭ li, la partisekretario diris gravmiene: "Pro manko de lumigo, la konstrulaboro de nia distrikto

**Nomo por subprovinco en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio.



multe postiĝis ol tiu de la frataj distriktoj. Vi ne devas rifuzi plu en tia kriza momento! Ni donas al vi urĝan taskon: en la daŭro de kvin tagoj ekde hodiaŭ, instalu elektrajn fadenojn kaj lampojn en la tuta konstrua distrikto. Sukceson al vi!” Antaŭ ol li povis respondi, la partisekretario jam stariĝis kaj etendis al li la manon. Li sentis, kvazaŭ la mano sur lia brako ne estus lia propra mano. Nur kun peno li sukcesis etendi ĝin kaj premi la grandan manon de la partisekretario. . . . Li eliris el la direkcia budo kun klinita kapo, pensante: “Jen falsa elektra laboristo mi vere fariĝis. Kion mi povus fari, se ne ekfunkcii!” Li iris al aliaj distriktoj por trovi konatajn elektrajn laboristojn kaj lernis de ili la fundamentajn sciojn. Fine li prunteprenis kelkajn librojn kia *Poŝlibro por Elektraj Laboristoj* por teorie plialtigi sin. Kia mirindaĵo ke efektive en la daŭro de kvin tagoj li efektivigis, ke la tuta konstrua distrikto estis lumigata. . . . Post la finkonstruo de la akvorezervejo, la Sklava Vilaĝo decidis instalati elektrejon kaj li revenis al la vilaĝo por servi kiel elektra laboristo.

“Ha, ha, vere interese!” la junulo finis sian rakonton per du ekridoj. Sed ni povis imagi al ni, kiom da epizodoj, kiom da malfaciloj en la lernado, kiom da ĉagreno pro malsukcesoj kaj kiom da ĝojo pro sukceso li ellasis. . . .

Ĉe la disiĝo li invitis min gastigi ĉe lia elektrejo kaj ni disiris.

Reveninte al la loĝejo, mi trovis ke estas ankoraŭ lamplumo en la ĉambro de la librotenisto. Kiel energia la juna librotenisto estas! Eble li laboros tra la tuta nokto!

Mi eniris en mian ĉambron kaj trovis ke tie estas malvarmege. Por hejti la fornon, mi ne povis ne ĝeni la junan libroteniston. Mi puŝmalfermis la pordon de lia ĉambro. Por ne interrompi lian laboron mi nur diris mallaŭte, “Mi petas transpreni fajron,” kaj rekte iris antaŭ la fornon. Kiam mi levis la kovrilon de la forno kaj trovis, ke ankaŭ en lia forno estas neniuj fajrero. Mi diris:

“Absorbite en kalkulado, vi lasis la fornon estingiĝi.”

“Nu,” senzorge respondis la librotenisto.

“Junulo kun tia energio! Brave!”

Nur kiam mi turniĝis tion dirante, la librotenisto demetis la plumon kaj malrapide stariĝis. Kiam mi jetis rigardon al lia vizaĝo, mi faris kelkajn paŝojn malantaŭen de miro kaj ne povis kredi al miaj propraj okuloj, ĉar staris antaŭ mi maljunulo kun aĝo de sep-okdek jaroj. La ruĝeta vizaĝo de la maljunulo radiis per afableco. Liaj haroj estis neĝblankaj, sed ankoraŭ tre abundaj, kaj lia barbo unu futon longa pendis antaŭ lia brusto kvazaŭ arĝentaj fadenoj. Sonore ridante li diris:

“Kamarado, ĉu vi ĵus venis hodiaŭ? Pro okupateco mi ne eliris por vin saluti.”

En embarasiteco mi rapidis pardonpeti:



“O . . . O, ĵus mi pensis, ke juna librotenisto laboras ĉi tie. Pardonu, avĉjo, ke mi diris nedecajn!”

“Kamarado, se vi bezonas materialojn aŭ ciferojn, diru al mi kaj mi donos al vi.”

“Ne, ne,” mi diris haste, “mi petos informojn de via librotenisto, kiam mi lin trovos morgaŭ.”

Kiam la maljunulo aŭdis miajn vortojn, la afableco sur lia vizaĝo iom post iom malaperis kaj kun altrudita rideto, kiun oni devas montri al gastoj pro minimuma dececo, li sidiĝis senvorte. Profitante la ŝancon, mi eliris. Kiam mi vekigis post dormado en la nokto, ankoraŭ brilis lamplumo en lia ĉambro.

La sekvintan matenon mi iris viziti la junan elektran laboriston en malvarmega vento. La elektrejo estis bone purigita de li kaj sur la muroj estis fiksitaj multaj bildoj kaj antaŭ la tableto apud la lito estis fiksita ruĝa paperslipego, sur kiu nete skribiĝis kelkaj linioj en la mongola lingvo:

Bone memoru la antikvan proverbon:

Ne ŝparu viajn fortojn kiel la ruzuloj

Sed lasu ilin ŝpruci kiel la paŝtistoj!

Via avo

La loĝantoj sur Korsin-stepo kutimas montri sian varman gastamon per densa nigra teo. La juna Ĉamusu preparis por mi tiel densan nigran teon ke ĝi gustis amara. Li ankaŭ hejtis la fornon tiel varmega, ke ĝi bruis kvazaŭ lokomotivo. Kiam ni sidiĝis ĉirkaŭ la forno, mi demandis al li montrante al la ruĝa papero:

“Ĉu la vortoj estas skribitaj de via avo?”



“Sufiĉe bele, ĉu ne? Mia avo estas pli ol kvindek jarojn pli aĝa ol mi, sed li vizitis lernejon kune kun mi.”

Neniam antaŭe mi aŭdis, ke avo kaj nepo lernas kune, tial mi demandis plu:

“Ĉu via avo estis instruisto aŭ lernanto?”

“Kompreneble li estis lernanto, kaj krome ‘lernanto perfekte bona’.”

Mi ne povis kredi liajn vortojn, ĵetis al li nekompreneman rigardon kaj silentis.

Ĉamusu aldonis du manplenojn da seka bovfe-kajo en la fornon. Tuj disetendiĝis el la forno bonodoro, kiu estas tre intima al ni stepanoj. Ĝi ne estas tiel gorĝ-ekscita kiel karbofumo, nek tre intense aroma kiel incenso. Ĝi estas malforte dolĉa odoro kun la aromo de la floroj kaj herboj sur la stepo, kiu flarite rememorigas al vi la hejmlokon la patrinon kaj la kantojn en la infanaĝo. . . .

Trinkante la densan teon, Ĉamusu de tempo al tempo forviŝis ŝviton de sur la frunto kaj daŭrigis nek rapide nek malrapide:

“Ŝajnas al mi, ke vi neniom kredas, ke mia avo estis lernanto en elementa lernejo. Do mi rakontu al vi de la komenco. En 1951 fondiĝis en nia vilaĝo unuagrada agrikultura kooperativo. Ĉar en la pasinteco ĉiuj en la vilaĝo estis sklavoj kaj neniu scipovis legi aŭ skribi, la laborpoentoj ne povis esti registritaj per ciferoj. Por signi la laborpoentojn oni devis trempi penikingon en inkon kaj stampi cirklojn sur papero. Tiam ankaŭ mia avo aliĝis al la kooperativo kaj fariĝis poent-registristo. Pensante ke tia metodo de poent-registro ne estas praktikebla por ĉiam, mia avo sendis min al lernejo. Li pensis, ke post lernado de unu aŭ du monatoj kiam mi povos skribi la ciferojn, mi forlasu la lernejon kaj helpu lin registri la

laborpoentojn. Tiutempe mi estis nur sesjara kaj la lernejo estis sufiĉe malproksima de nia vilaĝo. Mi ne povis unuope iri al la lernejo. Tial ĉiutage la maljuna avo portis min sur sia dorso al ĝi. Kiam mi havis lecionojn, li kaŭris sola ĉe angulo de la klasĉambro kaj forte fumadis sian pipon. La lerniganto estis virino. Kvankam ŝi ĉiam kaj ternis kaj tuis pro la sufoka fumo, ŝi diris nenion pro ĝentileco. Kiam la avo elfrapis tri masojn da tabako-cindro ĉe la murangulo, estis tempo por ni fini la lecionojn. Post lecionoj, la avo denove min surdorsigis kaj portis hejmen paŝon post paŝo. Ŝtormis iutage en vintro kaj la vetero estis precipe malvarmega. Mi diris al la avo: ‘Morgaŭ ni petu forpermeson por unu tago.’ Paŝante kontraŭ la ŝtormo, la avo diris: ‘Knabo, ja nur en la nuna tempo infanoj el familioj kia la nia povas viziti lernejon. Ĉu vi ne vidas, ke tra la tuta vilaĝo ni ne povas trovi iun, kiu scipovas registri laborpoentojn? La kooperativo senpacience atendas, ke vi pluen portu la torĉon. Neniun tagon ni devas prokrasti!’ Ekde tiam mi vizitis la lernejon senvorte, kiel ajn forta estis la vento, kiel ajn profunda la neĝo kaj kiel ajn malvarma la vetero. Iun tagon, post leciono, mi subite rimarkis, ke la avo tre dense skribis multajn vortojn sur la terplanko. La fakto estis, ke dum ni havis lecionojn, ankaŭ li lernis tie. Mi estis tiel ĝoja, ke mi tuj kuris al la instruistino kaj sciigis tion al ŝi. Ŝi iris tien kaj vidinte la vortojn kiujn la avo skribis surtere ŝi profunde kurtuŝigis. Ŝi palpebrumis kaj ruĝiĝis ŝiaj palpebroj. Nur pro la ĉeesto de la gelernantoj ŝi detenis la larmojn. Kiam komenciĝis la lecionoj la sekvintan tagon, en la klasĉambro aldoniĝis unu benko. La instruistino iris al mia avo kiu kaŭris ĉe angulo kaj ruĝiĝinte transdonis al li krajonon kaj kajeron,

dirante: 'Avĉjo, bonvolu sidiĝi sur la benko kaj lerni kune kun ni.' Tiamaniere la sesdekjara avo fariĝis samklasano de infanoj ses-sepjaraj. Tiel serioza estis li en la lernado, ke kiam ajn troviĝis io kion li ne komprenis, li nepre laŭte demandis al la instruistino de malantaŭe: 'Knabino, tion ĉi reklarigu!' aŭ 'Infano, reskribu ĝin!' Poste mi plialtiĝis kaj ne plu petis lin surdorse min porti. La avo diris: 'Ankaŭ mi devas lerni ĝis certa grado.' Tiel en la tago li iris al la lernejo kun mi portante librosakon kaj vespere li registris laborpoentojn kaj kalkulis la kontojn de la kooperativo. Post kiam ni kune gradiĝis en la supera elementlernejo, mi fariĝis leterportisto en la urbo kaj li fariĝis librotenisto de la produkta brigado en la vera senco."

"Ĉu via avo ankoraŭ sane vivas?"

"Tre sane. Li kalkulis la kontojn tutan nokton hieraŭ kaj iris por ĉeesti kunvenon en la administrejo de la popolkomunumo hodiaŭ matene."

"Ĉu la maljunulo kun blanka barbo estas via avo?" Denove aperis antaŭ miaj okuloj la figuro de la maljunulo sub lamplumo hieraŭ nokte kaj aŭdiĝis en miaj oreloj liaj sonoraj ridoj.

"Jes ja."

Tiam mi komprenis la kaŭzon kial la afabla mieno malaperis for de la vizaĝo de la maljunulo lastnokte kaj volis tuj lin trovi por fari klarigon. Mi do demandis: "Kiam li revenos?"

Ĉamusu respondis: "Ĉivespere estos kunveno de la tuta brigadanaro por publikigi kiel oni dividas la jarfinan dividendon. Avĉjo nepre revenos."

Mi decidis renkonti lin antaŭ la kunveno. Post vespermanĝo mi iris al la vilaĝgrando por lin atendi ĉe la ŝoseo. La neĝoŝtormo ĉesis kaj kvieto regis sur la tuta kamparo. La subiranta suno aldonis nuancon rozkoloran al la senfina neĝa stepo. La korturnoj, kiuj povas bone prikanti la neĝon, estis gaje kantantaj tremskuante siajn ruĝbrunajn plumojn.

En momento kiam mi malstreĉis la atenton, la maljuna librotenisto rajdante ĉevalon venis apud min. Mi rapide iris renkonte al li kaj alparolis: "Ĉu vi ĝuste revenas de la komunuma oficejo?"

La maljunulo lerte desaltis de la ĉevalo kaj diris kun la sama afabla mieno: "La kunveno kunvokita de la komunumo ankoraŭ ne finiĝis, sed mi petis forpermeson por reveni pli frue."

Ni paŝis ŝultro ĉe ŝultro en la vilaĝon. Mi volis iom klarigi pri kio okazis hieraŭ, sed ne sciis de kie komenci. Kiam mi estis ŝanceliĝanta, la maljunulo demandis al mi: "Ĉu vi bone ripozis hieraŭ nokte?"

Profitante la ŝancon, mi respondis:

"Maljuna kamarado, bonvolu ne miskompreni. Hieraŭ nokte, mi. . ."

Kiam mi parolis ĝis tie ĉi, la maljunulo ridegis kaj kompleze kaptante mian manon diris: "Junulo, mi scias kion vi volas diri. Vi ne kulpis en tio. Tio ofte okazas al mi. Iun fojon venis iu provinca departementestro de la Aŭtonoma Regiono. Vidinte ke

mi enskribas la kontojn, li ankoraŭ demandis: 'Kie estas via librotenisto?' Ja tiel multaj estas nun la junaj intelektuloj en vilaĝoj kiel la steloj sur la ĉielo. Kie tia aĝulo, kia mi, funkcias kiel librotenisto de produkta brigado? Kamarado, mi konfesas, ke la cerbo de ni, maljunuloj sep-okdekjaraj, ne funkcias tiel bone kiel tiu de junuloj, sed ol nia cerbo niaj membroj funkcias ankoraŭ pli mallerte. Ni povas nek paŝti nek labori sur la kampoj. Nia koro ne tiel malfortiĝas kiel niaj korpoj. Ni ne volas resti senlaboraj sidante sur la terlitoj. Ni liveras tiom da fortoj kiom ni povas. Kiam mi laboras kiel librotenisto, unu junulo povas esti liberigita por fari pli gravan laboron. Ĉiel ni ĉiuj klopodas por la kolektivo!"

Aŭskultante kion la maljunulo diris, mi sentis la tutan korpon varma. Nur tiutempe mi rimarkis, ke la subiranta suno ĝis nun prilumas min per siaj varmaj radioj. Ni estas ĉiutage prilumataj de la subiranta suno, sed tre malmulte ĝin observis atente. Nur hodiaŭ mi rimarkis, ke ĝi estas tiel impona kaj ĉarma!

La subiranta suno iel ajn adiaŭos la teron kaj la homaron. Ĝi tamen plenforte penas resti unu minuton aŭ unu sekundon pli longe por postlasi al ni, al la tero kaj al la mondo sian plej lastan radion de brilo kaj varmo.

TRAD. PANDIŜO

PROVERBOJ

KOREAJ


1. Nur post river-transvado, oni scias la profundon; nur longa kunvivado povas montri la korfundon.
2. Ju pli plena spiko estas, des pli forte ĝi kliniĝas; ju pli hom' en scioj riĉas, des pli multe li modestas.
3. Ne ĉiuj forto-havaj estas homoj bravaj.
4. La malamiko, ekster dubo, ne estas ŝafo, sed nur lupoj.

MONGOLA

Ĉu longas aŭ mallongas la vipuroj, ne estas diferenc' en la naturoj; najbara aŭ ne estas malamiko, ja ĉiam ili samas en praktiko.

VJETNAMA

Neniu vulpo honestas, humana tigro ne estas.



VULPO, SIMIO KAJ ALIAJ



ANTAŬE, en la arbaro la vulpo estis abomena por ĉiuj siaj najbaroj, ĉar li sin vivtenis per trompado kaj ofte sin amuzis per embaraso al aliaj. Ĉiuj en la arbaro suferis de liaj malbonfaroj, sed nenian rimedon ili trovis por sin venĝi al li.

Por fari punon al la vulpo, la simio, ankaŭ loĝanto en la arbaro, cerbumis kaj cerbumis sidante sur arbobranĉo ĝis plena sulkiĝo de la frunto. Finfine, venis al li en la kapon bona ideo. Ne povante sin deteni de ekscitiĝo, li sin jetis malsupren de la arbo kaj diris la ideon al sia proksima najbaro—la eta leporo. Sed anstataŭ lin gratuli ŝi nur dubeme palpebrumis. Vidante ke ŝi ne kredas al liaj vortoj, la simio diris: “Nu, mi tuj iru al la fiulo. Iru

sur tiun montpinton kaj vidu kiel iros mia projekto!”

Li do venis al la vulpo kaj diris kapbalancante: “Saluton sinjoro vulpo! Ĉu vi scias, kio estas la plej bongusta en la mondo?”

Aŭdinte la vorton “bongusta”, la vulpo tuj ekstreĉis la orelojn kaj diris: “Kio plej bongustas? Jen demando interesa! Ĉu vi scias?”

“Mi jus informiĝis hodiaŭ,” respondis la simio. “La plej bongusta frandaĵo en la mondo estas postvango de ĉevalo. Sed, estas tre malfacile ĝin gajni.” Intence ŝajnigante embarasiĝon li aldonis: “Se vi volas ĝin gustumi, vi devas antaŭ ĉio firme ligi vian voston kun tiu de la ĉevalo”

“Pro kio?” tuj demandis la vulpo.

“Se vi ne tion farus, vi ne povus lin kuratingi kiam li forkuras. . . . Sciu,” la simio mallaŭtigis sian voĉon, “venante ĉi tien mi vidis ke la ĉevalo dormas kuŝante sur tero.”

La vulpo ege ĝojiĝis. Sed li ŝajnigis sin tute indiferenta kaj diris malrapideme: “Pri la demando, kio estas la plej bongusta, mi bezonas ankoraŭ fari enketon. . . . Estas malsaĝe agi tro haste. . . . Nu, ni rebabilu pri tio alitage, ĉu bone? Sed, bridu vian langon, ne disbabilu tion!” Pavante sian longan voston li ekiris for. Sed, post ne longe, li rigardis returne kaj trovinte ke la simio forestis, li tuj kaŝe revenis por serĉi la bongustajon.

Post peza laboro la ĉevalo profunde dormis. La vulpo ŝtele alproksimiĝis al li, ligis sian voston kun la lia, kaj poste, faris fortan mordon en lian karnoplenan giuteon. En sia dolĉa sonĝo, la ĉevalo subite sentis akran doloron en la postajo, li saltleviĝis kaj ekkuris freneze ne sciante kio okazis. La vulpo estis terenjetita, forte sin frotadis sur la tero kaj veadis trenate de la galopanta ĉevalo. Kia bongustajo por li! Li jam ne sciis, ĉu li devas domaĝi la felon aŭ la belan voston.

Adiaŭinte la vulpon, la simio iris ne malproksime kaj grimpis sur arbon por observi kio okazos. Vidante la ruzulon pagata per kontuzoj, li tiel ĝojegis ke li tuj komencis manklaki kaj dance salti sur la branĉoj. Pum! li falis de la arbo glute-al-tere. Kaj, ekde tiam, la simiaj sidvangoj ĉiam restas ruĝaj. Vidante la baraktadon de la vulpo ĉe morto kaj la falon de la simio la leporo sur la montpinto, eksplodis per ridego, kaj tio fendis al ŝi la supran lipon.

Kaj pro tiu akcidento, la ĉevaloj ĉiam dormas starante kaj ne plu kuraĝas kuŝadi, eĉ kiam ili estas ekstreme lacaj ili faras nur ruliĝon sur la tero kaj tuj ekstaras. Kaj la posteuloj de la vulpo preskaŭ ĉiuj portas pelton kun makuloj—tion kaŭzis la kontuzoj.


Tiru la jenajn instruojn el la fablo:

Malbonfaremulon repagos malbono;

Gardu vin kontraŭ malamiko eĉ dum via dormo;

Ne ebriiĝu de ĝojo pro triumfo;

Zorgu viajn lipojn kiam vi priridas aliajn.



TANG KEHIN

Kiel Mi Komencis Verki?

METILERNANTO

Miaj gepatroj ambaŭ estas laboristoj. Neniu el miaj samfamilianoj iam vizitis lernejon. Firme konvinkite, ke ilian mizeran vivon kaŭzis la analfabeteco, la gepatroj faris ĉion eblan, ke mi povu lerni kelkajn jarojn en lernejo, esperante ke mia sorto fariĝos pli bona ol la ilia. Do mi sukcesis iri en la elementan lernejon de la vilaĝo, sed mi devis ĉesigi por ĉiam la vizitadon al la lernejo nur post tri jaroj pro tio ke ni ofte ne povis pagi ĝustatempe la lernokotizon.

Mi tre ŝatis ludi kun kamparanaj knaboj, kiuj ofte regalis min per rakontoj tiel interesaj, ke ili ofte forgesigis min pri malsato kaj dormo. Kaj mi ofte ne matenmanĝis por ŝpari la du cendojn donatajn de la patrino kaj lupreni bild-libretojn.

En la jaro, kiam mi estis dekjara, la flamo de la Kontraŭjapana Rezistmilito envolvis nian vilaĝon kaj mia familio falis en la abismon de senlaboreco. En la 11-jara aĝo, mi estis devigata labori kiel tajlora metilernanto. Post malpli ol jaro mi forlasis la mastron pro lia neelporteble kruela turmentado. En la aĝo de 12 jaroj, mi venis al Ŝanhajo kaj denove laboris kiel metilernanto por min vivteni. Fakte mi fariĝis sklaveto! Ĉiutage mi vartis la infanojn de la mastro kaj preparis manĝojn por ili — tiel pasis kvar jaroj kaj duono.

LEGADO MALPERMESITA

Kaŭze de la multjaraj malsato, malsufiĉo de dormo kaj peza laborado mi kreskis etstatura kaj malgrasa. Tamen, pli netolerebla por mi estis la

morta soleco en spirito. La fruaj jaroj de la knabeco, precipe la fantaziozaj rakontoj logis min tiel forte, ke mi ofte ŝparis la monon por matenmanĝo por ŝtele lui bildrakontajn broŝurojn. La mastro malpermesis al mi legi dum tago, mi do legis post la endormiĝo de la aliaj, ĉe la lampo transmitita sub la laborstabilon, ĉirkaŭatan kvarflanke per kartonoj, kie estis mia dormejo. Sed finfine tio estis rimarkita de la mastro. Kaj mi ne nur ricevis de li batadon, sed ankaŭ estis senigita je la legajoj. Depost tiam li nuligis al mi la pagon por matenmanĝo.

Ĝis la fino de mia metilernado mi neniam plu povis legi libron. Kvankam mi fariĝis laboristo post la venko de la Rezistmilito, tamen senlaboreco min torturis de tempo al tempo, kiel do mi povus okupiĝi pri literaturajoj?

LA DEBUTO

En printempo de 1949, Ŝanhajo liberiĝis. Tiam la tutaj tagojn ni viglis en ĝoja festado pri la liberiĝo kvazaŭ en senfina novjartaga atmosfero en la fabriko. Ĉiuvespere, post la laboro, ni ĝoje kolektiĝis sur la placo brile lumigita por kunveni, danci, prezenti teatraĵojn kaj kanti kantojn alportitajn de la Popola Liberiga Armeo. Vere ne priskribebla estis nia ĝojego.

Ĝuste tiam mi kontaktiĝis kun literaturaj verkoj. Kvankam tiam mi restis duonalfabeto, tamen mia forta deziro koni la novan mondon donis al mi forton. Plie, tiuj verkoj estis facile legeblaj, kaj mi kaptis iliajn ĉefajn enhavojn dank' al divenado de multaj vortoj.

Forte min interesis tiuj libroj, ĉar ĉiu intrigo, ĉiu heroo, eĉ ĉiu frazo en ili estis tiel intima kaj familiara al mi. Iam kaj tiam, legante ilin, mi sentis kvazaŭ mi estus enirinta novan mondon. Ĉu la reala mondo ĉirkaŭ mi ne ĝuste prezentiĝas tia? Miaj okuloj kvazaŭ subite akriĝis. La fabriko, la laboro kaj miaj kamaradoj — ĉio ĉi tio ekhavis signifon tute malsaman ol tiu en la pasinteco. Kiel mi deziris rakonti al aliaj miajn novajn komprenojn kaj sentojn!

Foje amiko rakontis al mi, ke venis al lia fabriko kamaradino, en arma uniformo kaj kun mallonge tondita hararo, kiu estis sendita de la Milita Kontrola Komitato por transpreni la fabrikon. Sed post atenta rigardo oni rekonis, ke ŝi estas neniu alia ol la laboristino, kiu ofte gvidis strikajn luktojn kaj poste "malaperis" el la fabriko antaŭ la Liberiĝo. Sekve de tio la laboristoj ĉie parolis inter si: "Ni laboristoj nun tenas la gvidantecon; la Kompartio kaj la Liberiga Armeo estas de ni mem!" La afero min tre emociis. Mi deziregis ĝin rakonti al pli da homoj kaj komuniki al ili mian kortuŝiĝon. Iuj kamaradoj konsilis al mi verki artikolon, sed tion mi ne kuraĝis eĉ pensi, ĉu homo kia mi kapablas ion verki! Sed mi ne povis dormi kaj netolereble

ĝeniĝis pro la neplenumiĝo de mia deziro. Mi do komencis skribi la rakonton en la postlaboraj horoj kaj ĝin finis post duonmonato. La artikolo enhavis malpli ol 800 ideografiaĵojn, dum ĝia kvarono konsistis el eraroj kaj diversaj signoj. Kaj en iuj lokoj mi eĉ ne povis min esprimi per taŭga signo, do mi devis lasi tie blanketon.

LERNADO

Ekspedinte la manuskripton, ĉiutage mi maltrankvile preterpasis la leterkeston, esperante kaj ankaŭ timante ricevi respondon de la redakcio.

Post pli ol semajno fine venis la respondo. Ĝi estis tre mallonga: Post poluro la artikolo estos publikigita. Oni invitis min al la redakcio por interparoli kaj esperis, ke mi multe verkos en la estonteco. . . .

Baldaŭ la artikolo aperis en *Amasa Literaturo*. Denove mi ricevis leteron de la redakcio. Malferminte la koverton, mi trovis en ĝi krom leterpapero du tabelojn kaj unu lernantokarton de la Kurso de Postlabora Verkado por Ŝanhajaj Laboristoj. Mi tiel ĝojigiĝis, ke mi longe staris senmove ĝin tenante kiel trezoron per ambaŭmanoj, kaj ne sciis kion fari.

Ekde tiu tago mi fariĝis ano de la kurso. Dank' al la lernado mi akiris elementan konon pri la socialisma literaturo. En la pasinteco mi ne sciis, kio estas la celo de verkado, mi sciis nur, ke la literaturajoj alportas al mi multe da informoj kaj instruoj kaj helpas min koni la vivon. Sole pro tio mi inkliniĝis al kaj multe interesiĝis pri literaturo. Kaj krome multaj aferoj en la vivo min kortuŝis kaj mi ege deziris komuniki al aliaj ĉion de mi viditan kaj spertitan, kaj miajn pensojn kaj sentojn pri ili. Kaj mi ne povis maltrankviliĝi ĝis la realiĝo de tiu deziro. En la lernado mi ekkomprenis, ke la proleta literaturo estas nemalhavebla parto de la tuta afero de la proleta revolucio. Ĝi estas edukilo por la popolo kaj forta batalilo kontraŭ la malamiko, kaj ankaŭ grava kaj serioza revolucia laboro, ne nur amata ĉevaleto por iuj individuoj.

ĈIAM BARDO POR LA LABORISTARO

La feliĉoj de la nova vivo estas nekalkuleblaj. Ĉiutage, eĉ ĉiuhore okazas kortuŝaĵoj en grandaj nombroj.

En la jaro 1953 nia tekstlaborejo estis ekipita per malvarmaera ventolilo. Ĉesis la sufoka varmego en la laborejo, kiun la laboristoj antaŭe nomis "vaporumujo". Kiam la somera suno torturas per bruliga varmego, interne de la laborejo refreŝigas malvarmeto kvazaŭ en printempo; la laborkondiĉoj multe pliboniĝis. La laboristoj des pli amas siajn fabrikon kaj laborejojn, kio faris al mi fortan efekton. Kiam mi rakontis tion al mia malsana patrino, kuŝanta sur la lito, ŝi ekploris kaj diris: "Feliĉaj vi estas! Se la liberiĝo realiĝus pli frue je kelkaj jaroj, mi

ne trafus tian malsanon, kaj certe restus en la laborejo!" Tion aŭdinte mi ne povis min deteni de larmoj. Mi bone scias, kiel ŝi pasigis la lastajn 20-30 jarojn en pezaj laboroj kaj falis en gravan malsanon. Fortega emocio devigis min elskribi tion por ke pli multaj homoj sciu, ke grandega feliĉo estas por ni ke ni povas vivi en la nova socio.

Kaj komence de la sepa vespere tuj post la laboro, mi ekskribis senĉese. Mi sentis kvazaŭ mi ne estus skribanta, sed rakontanta en mitingo. Mia plumo senhalte galopis sur la papero, mirinde rapide eĉ por mi mem. Kiam mi finskribis la lastan vorton kaj flanken metis la plumon, mi trovis ke jam estas post la kvina matene.

Post iom pli ol unu semajno, en la tagjurnalo *Liberiĝo* aperis mia verkaĵo kun la titolo *Printempo en la Laborejo*.

Tiam mi estis lernanta aliloke. Vespere, kiam mi revenis al la fabriko kaj apenaŭ eniris la pordon, kelkaj kamaradoj jam ĉirkaŭis min kaj diris emocie: "Kehin, bonege vi diris, vi eldiris ĉion, kion ni deziras diri el nia koro. . ." Ili ankaŭ diris al mi, ke ĉiu grupo de la laborejo jam legis kaj diskutis la artikolon, kaj multaj el ili larmis de emociiĝo. Sed mi nenion diris. Kion mi povis diri? En tiu momento unuafoje mi sentis ke mi ĝuas la plej grandan feliĉon kaj pli profunde mi konis la signifon de la verkado kaj mian devon.

ĈIAM FILO DE LA LABORISTARO

Sub la kuraĝigo de kamaradoj kaj helpo de la Kompartio, en tiu jaro mi verkis la rakonton *Mia Majstro* kaj kelkajn aliajn. Post ilia aperigo mi ricevis kuraĝigon de gvidantaj kamaradoj de la literaturaj rondoj kaj veteranaĵ verkistoj. Por plie kulturi min, la partia organizo de la fabriko asignis al mi amasan laboron por vastigi mian kontakton kun la laboristoj kaj levi mian politikan kaj ideologian nivelon.

En la jaro 1956 la partio denove transpostenigis min al la redakcio de la ŝanhaja literatura gazeto *Burĝono*. En 1958 mi aliĝis al la vicano de la Kompartio kaj fariĝis membro de la avangarda trupo de la laborista klaso. Mi sentis, ke novan vivon mi akiris kaj plenpleniĝis de juneca vivenergio.

Por mi, simpla laboristo, la literatura verkado estas malfacila kaj peniga. Ĝi estas afero neimagebla por mi sen la partia flegado kaj sen la kreiĝo de la nova socio. Ke hodiaŭ mi sukcesis ion verki, mi multe ŝuldas al la popolo kaj la partio. Ekpensante pri tio, mi sentas honton kaj maltrankvilon, kaj tio samtempe kuraĝigas min konkeri malfacilaĵojn kaj senlace antaŭenmarŝi.

Mi ĉiam memoros la admonon de la maljuna laborista generacio, ĉiam restos filo de la laborista klaso kaj dediĉos la tutan vivon al verkado por mia klaso.

PEKINA OPERO

ĈINIO havas tre riĉan heredaĵon de naciaj operoj. La diversaj lokaj operoj nun ludataj en Ĉinio nombras ĉ. 370 specojn. Inter ili la Pekina Opero estas la plej populara kaj influhava. Ĝi ekĝermis ĉe la fino de la 18-a jarcento, kaj iompostiome disvolviĝis kaj maturiĝis en la ĉefurbo Pekino, tial ĝi nomiĝas Pekina Opero, kaj jam havas historion de preskaŭ 200 jaroj.

La ĉefaj arioj de la Pekina Opero devenis de la Han-opero de Hubej-provinco kaj la Huj-opero de Anhuj-provinco kaj poste ĝi adoptis ariojn el multaj aliaj operspecoj. Dum longtempa prezentado en Pekino, ĝi evoluiĝis en operon riĉan je lokaj koloroj de Pekino kaj kun propra stilo en la muziko kaj lingvo.

Ĉar la Pekina Opero estas kreaĵo de la popolo per kombino de diversaj lokaj teatraĵoj, tial enhance ĝi estas plena je realisma spirito kaj forme kun klaraj naciaj trajtoj. Ĝi estas harmonia kaj strikta kombinaĵo de la artoj de kantado, muziko, deklamo, dancado, belarto, ĉinaj tradiciaj luktartoj kaj akrobataĵoj.

En la Pekina Opero la ĉefaj rolludantoj estas klasigitaj en 4 kategoriojn: Krom la vir-roluloj kaj virin-roluloj, kiuj rolas diversaĝajn virojn kaj virinojn, troviĝas ankaŭ buntvizaĝuloj kaj arlekenoj. La buntvizaĝaj rolas ofte la militistojn kaj civilulojn, kiuj estas krudaj, malkaŝemaj aŭ insidemaj, kaj ĉiujn ilin oni prezentas per speciala troigo en iliaj agmanieroj kaj cetere ilian karakteron oni reliefigas helpe de "vizaĝodesegnoj". La arlekenoj rolas civilulojn kaj militistojn kiuj estas spritaj kaj humuraj aŭ malicaĵaj.

Unu el la ĉefaj trajtoj en esprimaj manieroj de la Pekina Opero estas, ke la agado de la teatraĵoj

Dank' al Nia Patrio

La 15-an de januaro, iu sinjoro Je el Hongkongo, reveninte de la teatro Tajping al la Hotelo por Elmigrintaj Ĉinoj en Kantono, trovis ke perdiĝis lia ora kalendara brakhorloĝo. Servistoj de la hotelo lin konsolis kaj klopodis ĝin serĉi por li diversloke, sed vane. Iu servisto admonis, ke li restu ankoraŭ unu tagon, ĉar se iu ĝin trovos, li ĝin resendos al li. Sed li opiniis, ke tio estas nebla kaj reiris al Hongkongo la sekvintan matenon. Sed post du-tri tagoj, neatendite lia amiko veninta

el Kantono telefonis al li: "Via horloĝo estas en la Oficejo de Perdaĵoj de la urba policejo de Kantono."

Jes, lia horloĝo estis trovita ĉe la pordo de la teatro fare de kamarado Luo Bokang, kiu venis al Kantono el Hajnan-insulo pro laboro. Ĝin trovinte, li tuj ĝin sendis al proksima policejo. La sekvintan tagon oni ĝin transsendis al la Oficejo de Perdaĵoj, kies laborantoj faris detalan enketon kaj finfine trovis la mastron de la horloĝo.

Matene de la 26-a, s-ro Je venis el Hongkongo al la Oficejo de Perdaĵoj por repreni sian horloĝon kaj li vidis tie horloĝojn, biciklojn, monujojn kaj multajn aliajn altvaloraĵojn atendantajn la perdintojn. Tio mirigis lin. "Mi vizitis multajn landojn", li diris poste, "sed neniam vidis tian fenomenon. Miaj amikoj en Hongkongo diris, ke mi havas bonŝancon. Sed mi pensas, ke ne bonŝancon, sed bonan popolan registaron, bonan popolon de mia patrujo mi havas."

verkoj estas tute ne limigita en tempo kaj spaco de la scenejo. Tio ebligas al la operverkisto havi plej grandan liberecon en la aranĝo kaj disvolvo de la intrigo. La Pekina Opero povas prezenti la intrigon kaj agojn de la personoj tre klare al la spektantoj sen helpo de dekoracioj aŭ aliaj scenejaj instalaĵoj kaj necesajoj malsimplaj. Ĝuste en tiu speciala maniero de prezentado kuŝas la malsameco inter la ĉina opero kaj la opero aŭ dramo de la Okcidento.

El tiu speciala esprimmaniero, estiĝis alia karakterizaĵo en ĝia arta prezentado, t.e. ke multaj agoj sur la scenejo estas simbolaj tamen alte realismaj. Ili realisma kuŝas en tio, ke ili estas senescepte artaj imitoj de agoj en la reala vivo, tial ili povas precize prezenti la realon.

La prezenta arto de la Pekina Opero konsistas el 4 partoj, nome, la kantado, recitativo, ludo kaj dancado. La kantado inkluzivas solon kaj alternan kantadon; la recitativo monologon, dialogon kaj flankenparolon. En la Pekina Opero tre severa estas la postulo al la ludantoj rilate al tiuj kvar partoj kaj je ĉiu vorto, kantsilabo, man- aŭ pied-movo, oni devas strikte sekvi la difinitajn formulojn, kaj agadi ĉiam kun ritmaj movoj laŭ la takto de la muziko.

La muziko akompananta la ludon en la Pekina Opero estas dividita en 3 partojn: kordinstrumenta, blovinstrumenta kaj frapinstrumenta. Oni uzas la kordajn kaj blovajn instrumentojn ĉefe por akompani la kantadon de la ludantoj kaj la frapajn instrumentojn por regi la takton de iliaj movoj kaj dancoj kaj krei certajn etosojn.

La tradicia repertuaro de la Pekina Opero plejparte prenis siajn temojn el la popolaj legendoj kaj

rakontoj, el ĉinaj klasikaj literaturaj verkoj kiaj la "Tri Regnoj", "Ĉe la Akvorando", "Pilgrimo al la Okcidento" kaj aliaj romanoj. Ĝi havas intiman rilaton kun la kantorakonta literaturo, la antikvaj dramoj kaj aliaj lokaj teatraĵoj.

La Pekina Opero estas dramarto veninta el la popolo. Kvankam en King-dinastio (1644-1911) ĝi iam fariĝis ankaŭ kortega arto, tamen ĝi neniam rompisan rilaton kun la popolo dum la pli ol cent jaroj, sur la scenejo aperadis multaj talentaj aktoroj, kaj la arto de prezentado senĉese disvolviĝas dank' al kreemaj provoj, tial ĝi estas unu el la operpecoj ŝatataj de la ĉina popolo. Dum la pasintaj pli ol dek jaroj, ĉinaj trupoj de Pekina Opero multfoje vizitis fremdajn landojn, faris prezentadojn al iliaj popoloj kaj trovis grandan ŝaton de ili al la operarto de Ĉinio.

La Velo kaj la Ombrello

Kiam blovas vento, la velo disetendas siajn flugilojn, ŝveligas sian bruston, kun fiero mieno kaj aroganta sinteno ĝi fanfaronas sen deca estimo al la vento: "Vidu mem, ĉu la ŝipo povus iri sen mia puŝo?" Sed tuj kiam ĝi perdis sian batakamaradon — la venton, ĝi tuj mal-espere ŝrumpiĝas kaj fariĝas senutilaĵo.

Kiam la ombrello estas bezonata en pluva aŭ varmega tago, ĝa sin disetentas tutforte por doni protekton kaj neniam mallaboremas. Sed kiam oni ne plu bezonas ĝian servon, ĝi tuj kuntiriĝas kaj sin kaŝas ĉe angulo por ne malhelpi alies laboron.

KURIOZAJ FLOROJ SUR NEĜMONTO

FU ĜENHIN

En Gansu-provinco de nordokcidenta Ĉinio troviĝas Kilian-montaro. La kapoj de tiuj montegoj tutjare sin kovras per arĝenta neĝo, sed ĉe iliaj piedoj verdegas primitivaj arbaroj, kiuj kreskas dense kaj prospere, kaj tie konkure pompas ankaŭ diversaj floroj. La komplika kaj kaprica klimato tiea donas maloftajn trajtojn al la fizionomio de tiu montaro. Iatemp, ĉe neĝblovado, la pompe florantaj floroj tuj sin vestas per blanka mantelo, tamen ili ankoraŭ restas vivece starantaj. Ekzemple, la purpura fazanfloro (karagano) kaj flava sovaĝpapavo ĉiuj povas kreski kaj flori sur neĝmonto ĉ. 4000 metrojn alta.






VEJĈIO

II. ELEMENTAJ TAKTIKOJ (Daŭrigo)

7. Oferludo

Ĝis nun ni parolis plej multe kiel kapti la ŝtono(j)n de la kontraŭa flanko por gajni la ludon. Sed en la praktiko ofte estas necese oferi ŝtonon al la kontraŭa flanko por atingi la celon. Tia ŝtonmeto estas nomata oferludo. Ĝi estas eĉ tre efika metodo por savi iun grupon el kriza situacio.

Diag 41



Vidu Fig. (1) de la Diag. 41. La enfermita blanka grupo havas nur unu okulon ĉe la angulo, kaj la ekstera nigra grupo estas tre forta. Versajne ĝia situacio estas jam senespera. Sed se la blanka flanko faros oferludon je C, ĝi estas tuj savita. Ĉar kiam la nigra forkaptos la oferŝtonon je B, ĝi povos tuj minaci la lastan je A. Tiam la internaj nigraj ŝtonoj estos forkaptitaj aŭ je C (se la nigra ne tuj respondos je tiu ĉi punkto) aŭ je Ĉ (se la nigra tuj respondos je C).

En Fig. (2) la enfermita nigra grupo havas jam du okullokojn, kaj unu el ili estas eĉ jam sekura. Sed se la blanka flanko faros oferludon je B, ĝi povos forkapti la tutan grupon. Ĉar tiam la nigra devos forkapti tiun oferŝtonon je A (ĝi ne povos okupi punkton C timante ke la blanka forkaptos ĝiajn

suprajn kvar ŝtonojn je A). Sed tiam la blanka povos tuj minaci je C la nigran ŝtonon L14, kaj la tuta nigra grupo estos perdita.


Fig. (3) estas alia ekzemplo, kiu montras, ke per oferludo oni povas turni krizan situacion kaj venki la kontraŭan flankon. La tri blankaj ŝtonoj E4, F4 kaj F3 estas sieĝataj de la kontraŭa flanko, kaj la ceteraj blankaj ŝtonoj estas disigitaj. Ŝajne estas malfacile por la blanka flanko fari kontraŭatakon. Sed se ĝi faros oferludon je C, ĝi povos ne nur savi la tri sieĝatajn ŝtonojn sed ankaŭ forkapti la tutan malsupran nigran grupon. La ludo iros jene:

La blanka, C (oferludo); la nigra, B (forkapti la ŝtonon C); la blanka, A (minaci la 4 nigrajn ŝtonojn); la nigra, C; la blanka, D (minaci la 7 nigrajn ŝtonojn); la nigra, Ĉ; la blanka, E (minaci la tutan malsupran nigran grupon). Fine la blanka grupo konkeros la tutan teritorion ĉe la angulo.

8. Tuja Rekupto kaj Duobla Tuja Rekupto

Tuja rekupto iom similas al oferludo. Sed en tia situacio oni povos rekapti la kontraŭan grupon je la

Diag 42





“La Sekreto de la Trezora Lagenario”

“**L**A sekreto de la Trezora Lagenario” estas novelo por infanoj skribita de la fama ĉina verkisto Ĉang Tianji. La Ĉina Esperanto-Ligo nun preparas esp-an eldonon de tiu interesa verko. Jen ni konigas unue al niaj legantoj la samnoman filmon adaptitan laŭ tiu novelo.

La “Trezora Lagenario” estas malnova fabelo kiun avinoj ŝatas rakonti. Ankaŭ la avino de Vang Baŭ scipovas ĝin rakonti. Kaj Vang Baŭ jam ĝin aŭskultis li ne memoras kiom da fojoj.

Iun tagon, plena de malĝojo, Vang Baŭ revenis de la lernejo. Ĉar li ne povis solvi aritmetikan problemon kaj ne bone ĉirkaŭvolvis elektrajn fadeojn dum farado de bobeno en la Scienco-teknika Rondo. Reveninte hejmen li aŭdis, ke la avino ree rakontas al lia fratino la Trezoran Lagenarion dirante, ke se oni posedus tiun trezorajn, oni povus havigi al si kion li deziras sen cerbumo kaj klo-podo.

Dum la aŭskultado de la rakonto, la imago de Vang Baŭ klopodis prezenti antaŭ li iluzion de la Trezora Lagenario. Kaj fine li tiel laciĝis, ke li klinis sin sur la tablon.

Subite sur la ekrano aperas ondetanta lago, kies akvo estas klara kaj trembrila. Ĉe la lago Vang Baŭ sidas fiŝante. Li levas la fiŝstangon, sed vidas nenion sur la hoko. Li rigardas la apudan siteleton: ankaŭ ĝi estas malplena. Li koleriĝas, forjetas la fiŝstangon, kuŝiĝas sur la herbejo kaj gape rigardas la ĉielon en meditado.

Li pensas: “Mi faros multan laboron por la kolektivo por fariĝi glora homo! . . . Sed pli bone estus se mi povus tion fari sen peno!” Dum tiel li pensadas, subite li aŭdas voĉon:

sama punkto de la oferludo, tuj kiam la oferŝtono estis forkaptita de la kontraŭa flanko.

Fig. (1) de Diag. 42 estas la plej simpla formo de tia ludo. Se la blanka faros oferludon je B, la nigra flanko tuj ĝin forkaptos je A. Tiam la blanka povos tuj rekapti la suprajn 8 nigrajn ŝtonojn je B, la sama punkto de la oferludo.

En Fig. (2) la enfermita nigra grupo ŝajne estas jam sekura. Sed se nun estas la vico de la blanka flanko, la lasta povas aranĝi situacion de tuja rekopto per ŝtonmeto je C, kaj konkeri la nigran grupon. Ĉar poste ĝi povos fari oferludon je B por kapti la 3 ŝtonojn A4, B4 kaj A3. Se la nigra tuj respondos je B por malebligi la oferludon, tiam la blanka sin retiros per ŝtonmeto je Ĉ, kaj la okulloko estos detruita.

Fig. (3) estas iom komplika kazo. La enfermita nigra grupo ŝajnas esti tute sekura. Krom unu preta okulo, ĝi havas ja sufiĉan lokon ĉe la limo por krei alian okulon. Se la blanka provos ĝin ataki je B aŭ Ĉ, ĝi povos tuj ligi per ŝtonmeto je C la disajn ŝtonojn en unu grupon kaj formi alian okulon ĉe la limo. Sed se la blanka faros oferludon je C, do poste la nigra je B, la blanka je A, tiam estiĝos la situacio de tuja rekopto, kaj la nigra estos perdita.

Duobla tuja rekopto disvolviĝas el “tuja rekopto”. Fig. (4) estas ĝia simpla formo. La enfermita nigra grupo en tiu ĉi Fig. havas jam du okulojn, kaj la blanka ŝtono J2 estas jam morta. Sed se la blanka flanko faros oferludon je A, tiam estiĝos situacio de duobla tuja rekopto, t.e. kaj la dekstra kaj la maldekstra partoj fariĝos situacio de tuja rekopto. La tuta nigra grupo ne estos plu savebla.

"Vang Baŭ, Vang Baŭ, vi ja pravas!

Ideon briln jen vi havas.

Ĝi realiĝos ja estonte,

kaj vin servados mi volonte."

Kiu ĝi estas? Ha! La Trezora Lagenario, pri kiu la avino ofte rakontis. Estas ĝi kiu povos fari ĉion anstataŭ li! Kiel bone estas, ke aperos al li ĉio kion li deziras! Ho! Nun lia deziro efektiviĝos jam.

Antaŭ la okuloj de Vang Baŭ, el la lago leviĝas akvokolono kiu kun disŝprucantaj akveroj, pli kaj pli altiĝas. Sur la akvokolono la Trezora Lagenario dancadas kaj subite ĝi transflugas sur la teron. Vang Baŭ ĝin kaptas ĉirkaŭbrake kun ĝojo kaj miro demandante: "Kiel vi min trovis?" "Mi scias, ke vi min bezonas!" diras varme la Trezora Lagenario. Kaj konfide ĝi diras al Vang Baŭ: "La afero inter mi kaj vi malkaŝiĝu al neniu alia! Tio estas plej granda sekreto. Alie mi ne plu utilos!" Pri tio ĉi Vang Baŭ senhezite donis konsenton. Kaj tuj ĉe la promeso la sitelo fariĝis arĝenta, kaj plena de saltantaj fiŝoj. Eĉ kelkaj orfiŝoj inter ili! Vang Baŭ pensas: "Se ili estus mangĉ. . ." Je palpebrumo, la fiŝo en lia mano turniĝis jam en fiŝon fumajitan! "Se mi havus panon" — tuj ĉe tio aperas unu post alia el la tero pano, pomo, patkuko ktp. inter kiuj iuj estas eĉ ankoraŭ ne pensitaj! Jen vere eblas en la mondo tia gajno tute senpena! Kia feliĉo! Vang Baŭ ĝojege ruliĝas surtere kvazaŭ frenezuleto.

Kaj la Trezora Lagenario nun montras eĉ sian pli grandan kapablon. Ĝi leviĝas portante sur si Vang Baŭ en la aeron kaj flugas tra nuboj. Vang Baŭ ĝuas la belajn vidaĵojn sur la tero: riveroj, ŝtuparkampoj, urboj, domegoj . . . ĉio moviĝas post ilin. Vere interese!

Kion Vang Baŭ volas kaj deziris li jam tiel senpene gajnas kiel la avino rakontis: nenian penon li bezonas fari. Sed ĝuste pro tio perdiĝis lia intereso pri laboro kaj sekve kaŭziĝis al li multa ĝeno kaj malĝojo.

Kiam Vang Baŭ iras al la biblioteko de la lernejo por legi la gazeton *Sciencaj Scioj*. Ĝin legas liaj kolegoj. Sed li ne scias kiel multaj numeroj de la gazeto jam plenŝtopis lian librosakon. Kion fari? Li povas nur elŝteliĝi. Alifoje Vang Baŭ ŝakludas kun sia kolego, li intencas elimini la Ĉevalon de la kontraŭulo, kaj subite blua Ĉevalo flugas en lian buŝon. Li devas teni la buŝon fermita kaj ne kuraĝas paroli. Vang Baŭ iras en la Porinfanan Magazenon, kaj volas ion aĉeti. Subite la libreto *La Vivo de San Maŭ* eniras nerimarkite en lian poŝon. Kiam li rigardas la biciklojn, ĉiuj ili kuras al li. Haste li rapidas hejmen. Ho! diversaj ludiloj de la Porinfana Magazeno—amindaj ĉevaletoj, aŭtomobiletoj k.a. jam estas




1. La Trezora Lagenario subite alflugas al la bordo kaj Vang Baŭ etendas siajn manojn por ĝin akcepti.

4. La Trezora Lagenario havigis al Vang Baŭ ekzamenpaperon bone responditan de alia lernanto. La instruistino malkovris la trompon kaj lin pridemandis. Vang Baŭ ne scias kion respondi.




en lia ĉambro! Kiel tio okazis? La avino ekmiras kaj la kunlernantoj eksuspektas. Vang Baŭ sentas sin multe ĝenata.

Plej maldece estas ke kiam Vang Baŭ ne povas solvi la aritmetikajn problemojn dum ekzamenado en la klasĉambro, la Trezora Lagenario interŝanĝas per ŝtelo lian neresponditan ekzamenpaperon kun alies bone respondita ekzamenpapero. Kia skandalo! Ŝteli alies paperon de ekzameno! La instruisto devas fari la aferon klara. Kun malĝojo Vang Baŭ volas ekiri kaj ekprenas la librosakon. Jen falas el ĝi neatendite la longe perdita gazeto *Sciencaj Scioj* de la bibliote-



2. Li ne scias kiel multaj numeroj de la gazeto jam plenigis lian librosakon.

5. La Trezora Lagenario de tempo al tempo donis al Vang Baŭ ĉion kion ĝi ŝtelis de aliaj. Liaj kunlernantoj kaj instruistino ĉiuj suspektas lin pri ŝtelado. Li sentas sin maljuste traktata de ili kaj decidas forlasi la Trezoran Lagenarion.



ko. La kunlernantoj direktas siajn okulojn sur Vang Baŭ — ili tute ne atendis ke Vang Baŭ povas fari tian hontindaĵon. Vang Baŭ kun larmoj en la okuloj elkuras el la lernejo kaj elprenas la Trezoran Lagenarion dirante al ĝi: “Kiu volis ke vi prenu alies ekzamenpaperon?”

“Tio kion mi kapablas fari estas doni al vi ĉion kion mi prenis de aliuloj!” Petoleme diras la Trezora Lagenario.

“Tio estas ŝtelo! Ŝtelo!” Vang Baŭ koleregas.



3. Vang Baŭ timas ke liaj kunlernantoj vidos la gazetojn kaj lin kulpigos pri ŝtelo tial li kaŭras kun la librosako premata al sia brusto kaj ŝajnigas sin suferanta ventrodoloron. Liaj gekamaradoj lin kredas kaj donas al li varmigan sakon por kvietigi lian doloron.

6. Subite eksplodis la Trezora Lagenario kaj Vang Baŭ vekigis el profunda dormo.



“Ja tia trezoro mi estas!” la Trezora Lagenario diras senĝene.

Ĉar la Trezora Lagenario estas fiaĵo emanta gajni sen peno kaj ĉion ŝteli de la aliaj Vang Baŭ jam ne povas plu ĝin teni en kompanio. Sed tiu lagenariaĉo ankoraŭ sin kroĉas al Vang Baŭ kaj ne volas lin forlasi. Sed li kuraĝe malkaŝis la sekreton de la lagenario al la instruisto kaj kunlernantoj, kaj ĝi tuj krevas. Pro la eksploda bruego Vang Baŭ vekigis el la sonĝo kaj laŭte diras: “Kia trezoraĉo! Neniam mi ĝin volos plu!”



Anna Louise Strong (meze) salutata de vicĉefministro Ĉen Ji kaj k-dino Deng Ĵingĉaŭ okaze de sia naskiĝotaga festo aranĝita de Mondpacdefenda Komitato de la Ĉina Popolo.

Foto de Liu Kingĵu

Rememoro pri Jan-an

Mi estis ĝuste sesdekjara, kiam mi unuafoje vidis Jan-an en 1946.

Mi pasigis la vintron en Jan-an, loĝante en “kaverno”, ĉambro de 12 × 20 futoj, fosita en krutajo, kun arkaj termuroj kalkitaj, ŝton-pavimita planko kaj fasado el latiso kun paper-fenestroj. Ĉu mi povas klarigi kial mi volis resti tie por ĉiam? Tie troviĝis ne luksajoj kaj malmulte da komforto. Tie estis homoj kun akraj mensoj, profundaj pensoj kaj vido pri la mondo. Mi sentis mian propran menson disvolviĝanta. Mi skribis poste: “Neniam mi sentis min tiel proksima al la homa potenco, kiu konstruas la mondon, kiel en tiu izolita, sieĝata Jan-an”.

Funkciuloj de la partio, kun nenutrivaj manĝaĵoj, laboris longajn horojn apud dubhelaj lampoj en la malvarmaj kavernoj, sed ili laboris aplombe eĉ sub de-temp-al-tempa blinda bombado. Ilia fido estis ne esprimita en ajna fanfaronado ke “la komunistoj venkos”. Ĝi estis “la ĉina popolo venkos kaj la komunistoj gvidos tiel longe kiel ili servos al la popolo”.

La ĉina popolo kaj la popolo de la mondo estis la fina referenco. “Iru inter la popolanojn”, “Lernu de la popolanoj” estis la admonoj. Intelektuloj kaj oficistoj estis ĉiam asignitaj iri inter la kamparanojn je longaj periodoj. Kamparanoj kun pedikoj — realaj pedikoj, ĉar mi vidiĝ ke kamparanoj ilin kaptis kaj frakasis, — ofte venis al kaj tranoktis en la kavernoj de Generalo Ĝu De kaj Prezidanto Maŭ Zedong. Dum la dekdu jaroj en Jan-an la ĉinaj komunistoj jam sin adaptis al la loko, la ritmo de ĝiaj sezonoj kaj la humoro de ĝiaj kamparanoj. Ili sentis sin hejme en la hejmoj de la popolanoj, agante konfide kaj sentime. Eĉ kiam la malamikoj estis antaŭen

Kial Pekino Altiras Min?

ANNA LOUISE STRONG*

* Anna Louise Strong estas fama usona verkistino. Tiu ĉi artikolo estas mallongigo de ŝia verko “Kial Mi Venis al Ĉinio en la Aĝo Sesdekdu-jara”. La subtitoloj estas aldonitaj de ni.

La Red.



*La verkistino akompanata de k-dinoj Deng Jingcǎu (la dua de maldekstre), Ju Likjun (la unua de maldekstre) kaj aliaj.
Foto de Liu Kingjuj*

marŝantaj sesdek mejlojn for kaj Jan-an estis evakuata, popolanoj prenis tempon por priĝoji la novan neĝfalon kaj diris: “Tiel bona por la grenplantoj”.

En Pekino

En Pekino mi trovis la kvalitojn, kiuj altiris min al Jan-an, sed en pli vasta skalo. La akraj mensoj kaj profundaj pensoj funkcias nun por la lando, kiu havas kvaronon de la homaro. Tie ankoraŭ estas la kredo, ke ordinaraj homoj estas pli grandaj ol la fortoj de la naturo aŭ la meĥanismoj faritaj de homaj manoj, kaj fine mastros ilin ĉiujn. Tiu ĉi kredo nun funkcias por jungi la riverojn kaj rekonstrui la eluzitan grundon por kvarono de la popolo sur la tero. Tie ankoraŭ estis la vido mondampleksa. Homoj alvenis al Pekino el centoj da landoj kaj estis akceptitaj kiel egalaj partoprenantoj en la homa lukto por progreso. Ili ankoraŭ opiniis ke venko dependas ne de la forto de armiloj, sed de vekado de la homa konscio.

Mi trovis min fariĝanta pli juna, pli sana, eĉ pli bonhumora. Mi skribis kvar librojn en la unuaj tri jaroj, rekordo neniam atingita antaŭe. Mi vizitis Tibeton — la sola usona virino kiu iam vidis Lhasa, grimpis la dektri etaĝojn de la Potala-palaco ĝis la tegmento, vidis la liberigon de servutuloj kaj la komencon de agrara reformo.

Tiun ĉi kreskon en labor-kapablo mi atribuis parte al la stimulo, kiun Pekino oferis kiel ĉefurbo de la mondo, kaj parte al la ĝentileco por persona vivo en Ĉinio, montrata precipe al maljunuloj. Mi kuntiriĝas nun je penso pri vojaĝo en la Okcidento, kie maljunulinoj estas senvaloraj kaj forpuŝataj de ĉiu. En Ĉinio “maljunulino” estas respekta titolo.

“Forto Estas en la Popolo”

En Pekino kiel en Jan-an, oni klopodas teni la gvidantojn proksimaj al la popolo, ĉar la vekiĝinta konscio de la popolo estas la granda fonto de forto. Novaj teknikoj por tio ĉi estas senĉese elpensitaj. Studentoj el elementaj lernejoj ĝis universitatoj elspezas sufiĉan tempon laborante sur kampoj aŭ en fabrikoj por kontakti kun la vivo de la popolo. Oficejaj funkciuloj kaj civilaj laborantoj faras la samon. Mia sekretario uzas unu monaton ĉiujare, ĝenerale kelkajn tagojn ĉiufoje, por sarki maizkampoj aŭ rikolti tritikon kie necesas. Membroj de la Centra Komitato kaj altrangaj oficistoj tro maljunaj por fizika laboro estas atendataj elspezi kvar monatojn ĉiujare for de siaj oficejoj vojaĝante tra la lando.

Ĉinio tenas sian revolucion spiriton vigla ne nur per kontakto de gvidantoj kun laboristoj kaj kamparanoj, sed ankaŭ per partopreno de la luktoj de subpremataj popoloj kaj nacioj en la tuta mondo. Oni venas al Pekino el multaj landoj, precipe el popoloj en Azio, Afriko, Latin-ameriko, en ribelo kontraŭ imperiista subpremo, serĉantaj scion kaj helpon. Ĉinio dividas kun ili sian propran sperton kaj lernas de ili siavice. Ĉinio ĉiam konsideras, ke tiu ĉi interŝanĝo estas reciproka. La socialismaj landoj, per siaj ekzistado kaj sperto, helpas al la lukto de la koloniaj popoloj por liberiĝo; tiu ĉi lukto de la koloniaj popoloj kontraŭ imperiismo estas la ĉefa forto frakasanta imperiismon kaj tiel savanta la socialismajn landojn. Tiel ili estas egalaj aliancanoj en la antaŭen-marŝo de la homaro.

TRAD. ĈEN ĜAŬJING

Japania Amiko Parolas pri Medicino de Ĉinio

La verkinto Vakaziki Ŝunĉi estas la estro de la Saku-a Ĝenerala Hospitalo en Nagano-gubernio, Japanio. Li vizitis Ĉinion fine de 1963. En la 4-a kaj 11-a de decembro de la sama jaro, publikigis lia artikolo pri la vizito al Ĉinio en la ĵurnalo Asahi Simbun. Ni donas ĉi tie ĝian resumon kun nia titolo.

— La Red.

ANTAŬ nelonge, mi ĉeestis la Okan Tut-ĉinian Ĥirurgian Kunvenon. Tio kio min mirigis estis la neatendita progreso de la ĉina medicino kaj tekniko. Precipe en la fakoj de korĥirurgio, sangotuba ĥirurgio, abdomenĥirurgio kaj traŭmatologio*, ĉiuj ili jam atingis la internacian nivelon.

El la medicinaj atingoj de Ĉinio, tiuj en ĥirurgio estas speciale eminentaj. Antaŭ ol ni iris al Pekino, de la fremdlingva eldono de la *Ĉina Medicino*, ni sciis ke ili jam atingis sufiĉe altan nivelon en ĥirurgio. Ni japanaj medicinistoj ne povis ne ege emociiĝi de la viditaĵoj dum ĉi-foja vizito.

La estro de nia medicina delegacio, Profesoro Fokuda Tamozi de la Ĝuntendo Universitato, diris emocie: "Vere, tio estas ekster mia atendo. Se la medicino de Ĉinio daŭre disvolviĝos tiamaniere, ĝi baldaŭ iros antaŭ nin." Estas ne facile por Ĉinio, kiu estis en duon-kolonia stato, efektiviĝi modernan medicinan esploradon per sia propra klopodo dum la dek kvar jaroj post la Liberiĝo spite al diversaj malfaciloj, kaj atingi tian grandan sukceson hodiaŭan.

Utiligante la progresintan teknikon de la mondo de profunda hipotermio kaj aparato de artefarita koro, la ĉinaj kuracistoj povas fari rektvidan kor-operacion. En Pekino, ni vidis tiuspecan operacion en la Fuvaj-hospitalo. En tiu hospitalo, oni faras ĉ. tri cent kor-operaciojn ĉiujare. Eĉ nia aŭtoritatulo de korĥirurgio nepre ekmiros, se li scios ke en Ĉinio oni faras pli ol mil tiajn operaciojn de internacia nivelo. Ja estas rimarkinde, ke la ĉina medicino progresis ĝis tia grado dum tre mallonga tempo.

Tio kio min enviigas estas la fakto ke en Ĉinio estas integra kaj unueca organizo inter la ŝtato kaj la hospitaloj, kaj intime interrilatiĝas la hospitaloj. Ĉiujn patientojn, por kiuj kor-operacio devas esti farita, oni sendas al tiaj specialaj hospitaloj, malsame kiel en Japanio, kie kuracistoj kaj hospitaloj koncentriĝas en malvasta areo, kaj konkuras unu kun alia por havigi al si patientojn. Tia fenomeno ne ekzistas en Ĉinio. La ĉinaj hospitaloj serioze traktas kaj zorgeme kuracas ĉiun patienton. En Japanio, oni opinios ke fari la samon ne estas profite por la hospitaloj. La traktado de la ĉinaj hospitaloj al la patientoj tute sen


konsidero pri la kuraca pago k.s., estas nekomprenebla al ili.

En la lastfoja Tut-ĉinia Ĥirurgia Kunveno, emfaze raportita estis la procezo de la rekunigo de la detranĉita mano de ŝanhaja laboristo Vang Cumbaj en februaro pasint-jara.

Post kiam ni revenis al Japanio, mi okaze legis en la usona gazeto *Times* detalan raporton pri la rekunigo de detranĉita mano en Ĉinio. Ankaŭ la usonaj medicinistoj laŭdas la sukceson de la operacio. La usonaj kuracistoj tamen opinias, ke la tempo uzita por la operacio povus esti mallongigita de sep horoj ĝis tri dank' al apliko de kudra maŝino. Sed por Ĉinio tio estas vere fierinda.

La fakto, ke oni akiris tian grandan sukceson en tia urĝa operacio kia rekunigo de detranĉita mano, montras ke la progreso de traŭmatologio en Ĉinio

* *Scienco pri kuracado de korpaj vundoj.*



Kor-operaciado en Fuvaj-Hospitalo, Pekino.

Foto de Tian Bo

estas ĝenerala. Inter la raportoj faritaj en la Ĥirurgia Kunveno, multaj estis pri traŭmo, precipe pri kuracado de fingra traŭmo. Ankaŭ pri la traktado de la brulvunda surfaco, la regado de infekto, frua transfluigo de sango kaj aliaj, multaj apartaj esploradoj estis faritaj en Ĉinio. En traktado de brulvundo per artefarita haŭto la ĉina teorio ĝenerale koincidas kun tiu de Profesoro Fokuda Tamozi, sed en Ĉinio la teorio jam sukcese aplikigis al kliniko. Ni vidis en Ĉinio ke medicino bone servas la laborantan popolamason.

Ni miras ke en Ĉinio oni ne nur fervore studas la okcidentan medicinon, sed ankaŭ alte taksas samtempe sian tradician medicinon, kiu estas konsiderata kiel nescienca de la okcidentaj kuracistoj. La ĉina aŭtoritatularo alprenis realisman politikon al la tradi-

cia kuracado, kiu enradikiĝis jam delonge en la kamparo por ke granda sukceso estu akirita en la disvolviĝo de la tradicia ĉina medicino. Kiam ni vizitis la kamparon, plejmulto de la kuracistoj kiujn ni renkontis en la popola komunumo estas kuracistoj de la tradicia medicino.

En Ĉinio, oni tre alte taksas sian tradician kuracadon, kaj samtempe senĉese studas teknikojn de la okcidenta medicino. Ili ellaboris artefaritajn korpulmajn aparatojn, artefaritajn hepatojn kaj renojn, kaj la plej delikataj estas la sangtuboj artefaritaj de Ĉinio. Mia kolego, Profesoro Fokuda Tamozi diris: "Kiel enviinde. La japana budĝeto por esplorado ja estas tro malgranda kompare kun tiu de Ĉinio."

TRAD. ĈEN HOŬHENG

JAPANAJ NEGRANDAJ ENTREPRENISTOJ:

PRI ĈINIO

Post la reveno al sia lando tri membroj de la Ĉinio-vizita Delegacio de la Ligo de Mezgrandaj kaj Malgrandaj Entreprenistoj-kamaradoj de Japanio sinjoroj Toi, Makino kaj Mogi preparolis kion ili propraokule vidis en la nova Ĉinio, ĉe la kunveno speciale aranĝita de la redakcio de la japana semajngazeto "Ekonomiisto".

MODESTECO, PURO KAJ SANO

Toi: Unuvorte la 650,000,000 popolanoj estas modestaj, puraj kaj sanaj, unuanime kaj akorde klopodantaj por socialisma konstruado. Estas malfacile bildigi tian grandiozan scenon per vortoj. Nia tuta membraro sentas, ke la socialisma konstruado de Ĉinio prezentas scenon grandiozan kaj belegan.

Makino: Alveninte Ĉinion, oni povas ĉie vidi portretojn de Prezidanto Maŭ. Iu el nia delegacio estis tiel scicia pri Ĉinio, ke vidinte la portretojn li demandis kiun ili prezentas. Sed revenonte al Japanio li diris kortuŝite: Se mi povus elekti iun landon por senzorge sendi mian infanon en infanvartejon kaj lin edukigi, mi elektus Ĉinion. Mi opinias ke tiel pura kaj sana Ĉinio estas.

Mogi: Ĝenerale, antaŭ mia vizito al Ĉinio, ankaŭ mi mem estis tia, ke mi multe aŭdis diversspecajn malvirtojn de la kapitalisma socio, tamen se iu demandus min, kian socisistemon sur la tero mi preferas, mi opinius ke la socialisma socio estas timinda, kvankam mi teorie scias la superecon de la socialisma socio. Firmiĝis en mi la opinio ke en la socialisma socio la homo seniĝas je la homa naturo. Sed ĉifoje

alveninte Ĉinion, ni ĉiuj havis komunan impreson ke fakte la socialisma socio estas absolute ne stranga aŭ eksterordinara. Ni sentas en ĝi neniom da teruro aŭ timo. Se mi efektive vivus en tia socio, mi sentus nur ĝojon sed nenian timon.

Toi: Ĉiuj ĉinoj ŝajne havas unu komunan deziron, nome, eternu la amikeco inter la japana kaj ĉina popoloj.

AKCEPTO PLENA JE AMIKECO

Mogi: Mi pensas ke invito de gastoj estas komuna ĝentilajo de ĉiuj landoj en la mondo. Tamen la akcepto al ni en Ĉinio ne estas formala ceremonio. La sinteno de la ĉinoj al ni estas ĉiam konsekvenca, kaj ili konfirme diris: kvankam malpaco longe regis inter Ĉinio kaj Japanio, tamen la popoloj de ambaŭ landoj ĉiam estas amikoj.

Iuj ordinaraj homoj, kiujn ni hazarde renkontis, diris al ni ke la amikecon inter la japana kaj ĉina popoloj neniu povas detrui. En la pasinteco 90% de la loĝantoj de Ĉinio estis analfabetoj, sed en la lastaj dekkelkaj jaroj jam okazis radikala ŝanĝiĝo, nuntempe la analfabetoj konsistigas nur 3% de la loĝantaro.

NEEKVILIBRECO NETROVEBLA

Mogi: Antaŭe mi supozis: Kvankam oni diris diversajn belajn vortojn, sed fakte mizero kaj neekvilibro probable jam regas en multaj ekonomiaj branĉoj de Ĉinio pro tio, ke Ĉinio suferis naturajn katastrofojn en la lastaj tri sinsekvaj jaroj, kaj ke ankaŭ

la socialisma konstruado progresis ne tre ideale. Sed, mi devas konfesi ke ni neniel povis trovi tian neekvilibrecon, eĉ se ni intencis tion trovi. Mi pensas, ke oni povas diri, ke jam tute kreviĝis la deziro pri probabla eltrovo de neekvilibreco. Ni 13 personoj jam plene konvinkiĝis, ke la ekonomia konstruado de Ĉinio disvolviĝas pli rapide ol laŭ nia imago kaj la juĝo laŭ la monda kriterio. Kvankam Ĉinio renkontis diversajn obstaklojn restigitajn de la historio kaj malfacilojn en la respektivaj periodoj, tamen ĝi jam akiris miraklan sukceson kaj faris, kiel la ĉinoj diras, "antaŭensaltegon" en la daŭro de nur dekkelkaj jaroj.

Toi: Tute pravas sinjoro Mogi. Sed mi vizitis Ĉinion kun miaj opinioj. Mi rimarkis fakton, ke la produkta povo de grandaj kaj malgrandaj fabrikoj disvolviĝas fulmrapide en komparo kun tiu antaŭ la Liberiĝo. Kaj plie, la labora fervoro de la laboristoj kaj la entuziasmo de la kamparanoj por produkto multe diferencas de la pasinteco pro tio ke ili jam fariĝis mastroj de la lando.

LA BAZAJ TEKNIKOJ DE INDUSTRIO JAM AKIRITAJ

Mogi: Kiel mekanika specialisto mi opinias: Taksante laŭ la alte disvolvitaj partoj de la ĉinaj industrioj, oni povas diri, ke Ĉinio jam baze solvis la teknikajn problemojn en la fundamenta konstruado de ĉiu ajn industrio bezonata por realigi industriigon de Ĉinio kaj kontentigi la bezonon de la nacia ekonomio.

Toi: Mi pensas ke oni povas fari tian takson.

Makino: La industria nivelo de Ĉinio estas sufiĉe alta. La bicikloj kaj kudromaŝinoj jam povas plene

kontentigi la enlandan bezonon. Laŭdire ĝi eĉ povas eksporti iom da ili. Mi opinias ke ankaŭ la ĉinaj ilmaŝinoj teknike jam leviĝis ĝis la nivelo konforma kun la nuna konstruado de Ĉinio kaj jam povas kontentigi la enlandan bezonon. Tamen, por apliko de la teknikoj kun tia nivelo en produktado (ekzemple, disvastigi pumpstaciojn aŭ plimultigi traktorajn staciojn en la popolaj komunumoj) kaj en ĉiuj branĉoj de la nacia ekonomio ankoraŭ multon oni devas fari. Sed la atingita nivelo mem estas sufiĉe alta.

Mogi: La teknika nivelo estas sendube sufiĉe alta. Sed ĝi ankoraŭ ne puŝis la produktan povon disvolviĝi por kontentigi la bezonojn de la tuta lando. Ankoraŭ restas granda problemo nesolvita. Ni devas klare vidi ke tia ankoraŭ estas la aktuala stato de Ĉinio.

TEKNIKA NIVelo DE LA MALPEZA INDUSTRIO

Toi: Se vi pririgardas la produktaĵojn de ĉinaj malpeza kaj fibra industrioj, vi povas trovi ke la ĉinaj malpezindustriaj teknikoj, kvankam tre altaj, ankoraŭ ne estas disvastigitaj. Kompare kun la nuna teknika nivelo de la japana malpeza industrio, tiu de Ĉinio estas postĝinta ĉ. tri jarojn. La nivelo de la ĉina malpeza industrio ankoraŭ estas malpli alta ol tiu de Japanio, sed la kvalito de la eksportitaj malpezindustriaj produktaĵoj de Ĉinio estas neniom malpli bona ol tiu de la japanaj. Fronte al la malfacila kaj ampleksa socialisma konstruado de la 650,000,000 popoloj, Ĉinio ankoraŭ ne povas ĝuigi al ĉiuj la bonon de la teknikoj kun tia nivelo, t. e. la teknikoj ankoraŭ ne estas disvastigitaj.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

KONDAMNO AL MASAKRO AL BUDHISTOJ

Je la sesa de junio ĉijare la gvidanto de la Ĉina Budhista Asocio publikigis deklaron kondamnantan la masakron fare de usonaj aeroplanoj al budhistoj en Sud-vjetnamio. La masakro okazis je la unua kaj la dua de la lasta majo, kiam usonaj aeroplanoj bombardis Monakejon Me Lang en Tracu-gubernio de Tra Vinh Provinco. Kelkaj centoj da budhistoj kaj monakoj estis mortigitaj aŭ vunditaj. Troviĝis inter la viktimoj ankaŭ dek kvin infanoj.

MUZIKO AL FABRIKOJ KAJ VILAĜOJ

Muzikistoj en Pekino kaj Ŝanhajo senĉese klopodas por servi la

laboristojn kaj kamparanojn per muziko.

En Pekino membroj de la Centra Konservatorio aranĝis pli ol tridek koncertojn de la nacia muziko al laboristoj kaj kamparanoj en la pasintaj kelkaj monatoj. Membroj de la Ŝanhaja Konservatorio faris regulajn vizitojn al kamparoj kaj fabrikoj por prezenti tie muzikaĵojn ekde 1958.

Ankaŭ la famaj muzikistoj, kiel pianisto Liu Ŝikun, premiito en pluraj internaciaj muzikaj festoj, ludis muzikojn de revoluciaj kantoj kaj popularajn muzikojn por la komunumanoj en la ĉirkaŭurbo de Pekino.

En la popolaj komunumoj kaj fabrikoj, ili vivas kune kun la laboristoj kaj kamparanoj kaj par-

toprenas iliajn taglaborojn. Tio ebligis al ili kompreni la sentojn kaj gustojn de la laboruloj kaj donis al ili freŝajn inspirojn por ilia verkado. Kiam ili restis en la fabrikoj aŭ popolaj komunumoj, ili ankaŭ helpis la amatorojn organizi ĥorojn.

AFRIKAJ KRESKAĴOJ EN ĈINIO

Kelkaj dekoj da specoj de afrikaj kreskaĵoj ekz-e *adansonia*, *murunga* (*moringa oleifera*) k.a., estas bone kreskantaj en la botanika ĝardeno de Kantono. Tiuj kreskaĵoj estas semitaj lastjare kaj la semoj estis alportitaj de la estro de la botanika ĝardeno, de la afrikaj landoj Ganao, Gvineo, Malio kaj Maroko en lasta jaro.

SPORTO



Ĉijare de la 17-a de junio ĝis la 8-a de julio, la Volana kaj Kamposporta Teamoj de Indonezio faris amikan viziton al Ĉinio. Ili konkursis kun ĉinaj teamoj en ses urboj de Ĉinio por komuna pliperfektigo en sportarto kaj plifortigo de amikeco, unuiĝo en la batalo kontraŭ imperiismo.


Fotoj de Vang Gingde

Supre:
Post la konkurso de volano vicĉefministro He Long akceptas la membrojn de ambaŭ teamoj.

Meze:
Interŝanĝo de sperto pri diskojeto inter la Ĉinaj sportistoj Sun Giujuan (maldekstre), Ŝi Baŭĝen (dekstre) kaj la indonezia sportisto Usman Efendy (meze).

Malsudre:
Volankonkursado inter sportistinoj Ĉen Juniang (de Ĉinio) kaj Minarni (de Indonezio).





Letero al Malproksimaj Amikoj (III)

NOFHAN

Ĉina Lingvo

Karaj geamikoj,

Vi diris, ke Vi tre volas lerni la ĉinan lingvon por pli bone koni la ĉinan popolon. Jes, por koni profunde iun popolon estas nepre necese lerni ties lingvon. Nia korespondo en la internacia helpa lingvo nuntempe ja nur helpas.

Tamen estas malfacile por mi instrui al vi la ĉinan lingvon per leteroj. Nun mi volas informi al Vi nur kelkajn aspektojn de la ĉina lingvo. Koncerne lernadon de la lingvo Vi devas elekti bonan lerno-libron de tiu lingvo. En la jaroj 1958-1959 sur EPĈ aperis "kurso de la ĉina lingvo", sed tiu ĉi kurso ne estas daŭrigata nun.

Eble antaŭ ĉio mi devas Vin atentigi, ke en Ĉinio ekzistas multaj nacioj, tial troviĝas en ĝi ankaŭ multaj lingvoj. El ili la han-lingvo estas la plej vaste uzata. Ĝi ludas en Ĉinio duoblan rolon: unue lingvo de la han-oj kaj due komuna lingvo de la tuta Ĉinio, dum la aliaj naciaj lingvoj estas uzataj nur en la vivo de la koncernaj nacioj. Tial eksterland-an-oj ofte nomas la han-lingvon ĉina lingvo. Nun ankaŭ mi parolos nur pri la han-lingvo.

Kio estas la plej okulfrapa specialaĵo de la han-lingvo? Tio certe estas ĝia skribo-maniero. Ĉar ĝi estas lingvo ideografia* kaj ĉiu ideografiaĵo formas apartan blokon ordinare kvadratan. Tial oni nomas ĝin kvadrata skribo.

La elparolo de la han-lingvo ĝenerale ne estas esprimata en la skribo. Por lerni la elparolon oni devas memori la prononcon por ĉiu aparta ideografiaĵo. Nur lasttempe oni iniciatis latinigan skribon por la han-lingvo. Sed praktiko de tiu ĉi skribo estas nur komencita. Kompreneble ĝi donas jam nun grandan helpon al lernado de la han-lingvo. En la elementaj lernejoj, la lernantoj nun lernas unue la latinigajn skribojn kaj poste helpe de ili la ideografiaĵojn.

En la elparolo de la han-lingvo troviĝas ankaŭ alia specialaĵo kompare kun la hindeŭropaj lingvoj. Tio estas ke tono de la elparolo havas preskaŭ same gravan rolon en la vortoj, kiel la sono. Malsamaj tonoj de la sama sono esprimas tute malsamajn signifojn. Ofte ne estas facile por eksterlandanoj kapti tiun delikatan diferencon.

Ĉiu vorto (aŭ vortradiko) de la han-lingvo havas fiksan formon. Kaj ĝi akceptas nenian ŝanĝon pro gramatikaj roloj. Tamen severan gramatikon la lingvo havas, kaj ĝi estas esprimita per vort-ordo kaj la interligaj vortoj kaj finaĵoj.

Iu diris, ke la han-lingvo estas unusilaba. Tio ne estas vera. Eble tiu misprenas ĉiun apartan ideografiaĵon nur kiel memstaran vorton. Fakte la ideografiaĵoj ludas ankaŭ ofte la rolon de vort-elementoj, per kiuj oni povas fari kunmetitajn vortojn. Eble interese estas por esperantistoj, ke la vortfarado de la han-lingvo ia-sence similas al tiu de Esperanto.

La han-lingvo estis kaj estas kulturportanto jam de multaj jarmiloj. Kaj nun ĝi servas al pli granda tasko, ke Ĉinio fariĝu unu el la plej modernaj landoj, kaj en ekonomio* kaj en kulturo. Antaŭe falsaj lingvistoj asertis, ke la ĉina lingvo ne kapablas esprimi modernan civilizacion* kaj eĉ en la ŝtataj altaj lernejoj oni lekciis kaj lernis per iu fremd-landa lingvo. Sed nun eĉ en la plej altnivelaj sciencaj studoj, la han-lingvo fariĝis la sola oficiala lingvo.

LIU ĜENG:

Fazano kaj Fajro

Estis ege malvarme. Iu ĉasisto postlasis en la arbaro amason da brul-ig-itaj branĉoj tuj cindr-iĝ-ontaj*.

Fazano* venis ĉe la varm-ajon kaj sentis sin agrabla tra la tuta korpo, kvazaŭ ĝi ĝuus la sunon de printempo. Ĝi pensis: "Jen la t. n. fajro de la homo! Vere mirinda ĝi estas. Nun mi fine trovis por la fazanaro vere netakseblan trezoron*. Sed ni fazanoj ne devas esti tiel sencerbaj kiel la homo. Ni devas plene ĝui ĝin. Jam tiel agrable estas apud la fajro, kiel feliĉe devus esti, se oni sidus aŭ simple transloĝiĝus sur ĝin!"

La fazano fervore kolektis branĉojn kaj konstruis por si neston sur la varmaĵo. Ho, kia sekvo! Ĝi estis vekita el sia dormo de densa fumo. Perdita estis ĝia zorge konstruita loĝejo, kaj preskaŭ forbrulis ĝia plumaro*.



Nia Vortareto

Cindro — Griza brul-restaĵo.

Civilizacio — La tuta atingo de la evoluo de la homa socio.

Ekonomio — Stato de la socia riĉeco.

Fazano — Kok-simila birdo kun bela vosto.

Ideografio — Skriba sistemo, kiu signas ĉefe la ideojn de koncernaj vortoj.

Plum-aro — Vesto de birdoj.

Trezoro — Mult-valor-ajo.



GEINSTRUISTOJ DE ESP-O PRETAJ

Post sesmonata lernado de E. la gestudentoj de la Ŝtata Seminario por E-instruistoj posedas jam necesajn sciojn por instruado de la Internacia Lingvo.

Je la 28-a de junio la Ministerio de Edukado kaj Ĉina Esperanto-Ligo aranĝis kunvenon por celebri la sukcesan finiĝon de ilia lernado. Parolis en la kunveno la reprezentantoj de ambaŭ institucioj, emfazante la utilecon de Esp-o kaj necesecon prepari novajn adeptojn por kontentigi la bezonon de la Esp-aj laboroj.

K-do Vu Juĝang, 90-jara ŝtata veterano kaj favoranto de Esp-o kaj multaj aliaj respondeculoj de koncernaj altaj lernejoj ĉeestis la kunvenon. Kompreneble ankaŭ pekinaj geesp-istoj. Al ili la geinstruantoj raportis pri sia lernado kaj prezentis sian programon de teatraĵo, deklamoj, humora dia-

logo, jango-danco kaj kantoj tute en E. kun necesaj interpretoj aŭ komentarioj en la nacia lingvo. Ĉiuj prezentoj rikoltis varmajn aplaŭdojn de la ĉeestantaro.

E-KURSO EN HIAMEN- UNIVERSITATO

Jam frue en la somero de 1963 j. estis organizita studrondo de Esperanto el instruistoj kaj funkciuloj de Hiamen-Universitato en Fugian-provinco. Poste en septembro de tiu jaro oni ekinstruis Esperanton kiel oficialan kurson, duan fremdlingvon al studentoj de la fakultato de la angla lingvo. Nun en tiu ĉi kurso lernas 24 gestudentoj. Laŭ la plano la kurso daŭros 2 jarojn kaj okupas 2-3 horojn ĉiusemajne. Post la lernado dum pli ol unu semestro la lernantoj jam povas skribi simplan leteron. Altirite de la perfekteco kaj utileco de la lingvo, ili ĝin lernas pli kaj pli entuziasme.

E-KURSOJ EN KOREIO

Troviĝas nun en Pjengjang, ĉefurbo de la Korea Demokratia Popola Respubliko, pluraj E-kursoj. Unu el ili estas gvidata de K-do Hjen Vizin en la Pedagogia Instituto. Lernas en tiuj kursoj sume ĉirkaŭ 120 gestudentoj.

Nova vortaro Esp-korea bezonata de koreaj esperantistoj eldoniĝis antaŭ nelonge. (Laŭ informo de K-do Kim Hansun)

POLAJ JUNAJ GEESPERANTISTOJ

En la Komerca Lernejo de Jelenia Gora, Pollando, estas multaj junaj gelernantoj Esp-o. En la Maja Festo ĉijare ili demonstraciis kun slogan-tabuloj sur kiuj estas skribita la vorto ESPERANTO.


LA UNUA E-LERNILO EN CEJLONO

Aperis en majo la unua vortareto Esperanto-sinhala eldonita de UEA kaj presita de la Universitato de Cejlono. La vortareto estas bazita sur statistiko pri la plej oftaj esperantaj vortoj. La sinhala lingvo estas nun la oficiala lingvo de Cejlono, kie ĝi anstataŭis definitive la anglan en la komenco de 1964. (IGS/579)

La kursanoj ludas esperantan teatraĵon.




Pekinaj esperantistoj kaj reprezentantoj de kelkaj institucioj ĉe la kunveno.



KULTURA SEMAJNO EN FRANCIO

De la 31-a de marto ĝis la 7-a de aprilo, 1964, en la Kastelo GRESILLON (kulturdomo de la francaj esperantistoj) okazis Kultura Semajno organizita de U.F.E. kaj sub la patronado de Ministerio pri Nacia Edukado. Tiun aranĝon partoprenis ĉ. 85 esperantistoj, inter ili 33 senpage gastigitaj gelernantoj el Esperanto-kursoj en francaj instruist(in)aj seminarioj. Ĉeestis ankaŭ gejunuloj el Anglio, Italio, Nederlando. Preparis kaj gvidis la tutan disvolvigon S-roj Llech-Walter kaj Blanc. Ĉiutage la partoprenantoj vizitis praktikan kurson, aŭdis 1-2 prelegojn pri kulturaj temoj. Aktivan rolon ludis la gelernantoj mem ĉar ĉiu siavice devis preparoli iun temon. Ĉiutage ludoj en Esperanto (S-ro Motillon), kantoj (S-ino Turin). Ĉiuvespere projek-



ciado de lumbildoj pri diversaj landoj. Dimanĉe ekskurso al la renesancaj kasteloj de Luaro.

Bonege sukcesis la tuta programo. Multe progresis la estontaj geinstruistoj, ĉiuj entuziasme

promesis disvastigi nian lingvon. La lastan tagon Inspektoro de la Ministerio venis kaj esprimis sian plenan kontenton. S-ron Llech-Walter intervjuis la Regiona Televido.

SUD-NIA LIBROBRETO

LETEROJ EL SUD-VJETNAMIO

— Redaktita kaj eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1964. Formato 13 × 19 cm., 121 p.

Vere simpla libreto. Sed mi estis tuj altirita de la titolo. Sud-vjetnamio ja altiras ĉies atenton tra la mondo. Ĝi altiras la atenton de ĉiuj subpremataj popoloj batalantaj por la liberigo de sia nacio. De ĝi ili ricevas inspiron kaj kuraĝigon kaj al ĝi ili donas simpatian kaj kunsenton. Ĝi altiras ankaŭ la atenton de la militaristoj en Pentagono kaj iliaj lakeoj. Ĉar ili vidas tie sian katastrofan sorton kaj klopodas nepre trovi tie rimedon por sin savi.

Ekleginte la libreton mi jam ne povis ĝin flankenmeti antaŭ ol fini la lastan paĝon. Ĝi donas kvazaŭ okazon por rememori la vivon de la ĉina popolo dum la rezistmilito kontraŭ la japanaj invadantoj, aŭ en la liberiga milito kontraŭ la usonaj lakeoj en Ĉinio.

Ĝi ne estas libro verkita por la legantoj, sed nur kolekto de leteroj skribitaj de sud-vjetnamaj popolanoj al siaj edzoj, edzinoj, filoj, fratoj aŭ aliaj karuloj en la norda parto de sia patrolando. Ili disiĝis jam multajn jarojn, kaj la nepenetrebla muro starigita de la usonaj lakeoj inter la zonoj de Nord- kaj Sud-vjet-

namio malebligas ilian rekuniĝon. Tiuj leteroj eĉ ne povis esti senditaj tra poŝtoj por rekte atingi la adresatojn, sed devis transiri de mano al mano, de vilaĝo al vilaĝo, milfoje kurbajn vojojn, foje eĉ tra eksterlandaj urboj antaŭ ol ili atingis la nordon.

Kion ili rakontas en tiuj leteroj? Kompreneble la vivon de ili mem, la vivon konsistigantan la nudajn faktojn de Sud-vjetnamio.

Eble multaj jam legis la libreton *Surtera Infero*, kiu priskribas la kruelajn en la Punlaborejo de Pulo Kondoro de la uson-dziema reĝimo. Sed ĝi estas nur unu faceto de la vivo de sud-

vjetnamanoj. En la nuna libreto oni povas ricevi panoramon de tiu mondparto. Tie la homvizaĝaj demonoj elŝiras homajn hepaton kaj okulojn. Tie ili manĝas homan karnon kaj verŝas bolantan akvon sur homajn korpojn por ilin senhaŭtigi. Tie estas inventita "la torturo de la Sankta Virgulino" por seksatenci virinojn. Tie la malliberulinoj, tute nudaj estas enfermitaj en ĉeloj de malliberaj viroj. Kaj tie estis ŝutita sur la vasta kamparo toksaĵo kiu venenis kaj la animalojn kaj la vegetaĵojn.

Legante tiujn liniojn de la libreto, mi vole-nevole rememoris la libreton *Medalioj* priskribantan la terurajojn de hitleranoj.

Sed oni ne supozu, ke la sud-vjetnamanoj estas timigitaj kiel deziras la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. Male, ĉio ĉi tio pli hardis ilin en la batalo por la nacia liberigo. Post kiam la amata edzino estis forrabita kaj mortigita, la simpla kamparano fariĝis heroo timinda por la malamikoj. Kiam la aĝa fratino falis en la batalo, la malforta knabino, iam mokita de sia amato pro la nudeleskaj manoj, sin ĵetis en la batalvicon. Eĉ la naivaj etuloj en la "strategiaj vilaĝoj" severe administrataj de la malamikoj estas edukitaj de la vivo kiel malami la usonajn lakeojn. Jen estas la decida forto kiu direktas la sorton de Sud-vjetnamio. Kiu ne komprenas tiun forton, tiu rompos sian kapon antaŭ ĝi.

Mi forte rekomendas tiun libron al ĉiuj esperantistoj kiuj respektas la faktojn kaj celas al justo kaj la vera paco.

HONFAN

NOVA VORTARO ESPERANTO-KOREA — Eldonita de la Korea Esperanto-Asocio, 1964. Formato 9 × 12.5 cm., 350 p.

Jen la unua vortaro Esperanto-korea kiun mi vidis. Krom la vortara parto ĝi enhavas ankaŭ du aldonojn: "mallongigoj" kaj

"ĉefaj geografiaj nomoj de Koreio". En ĝi troviĝas ĉ. 5,300 vort-radikoj kaj la derivitaj kaj kunmetitaj vortoj proksimume duobligas tiun nombron.

Rimarkinda karakterizo de tiu ĉi vortaro estas tio, ke la vortaro ne celas esti kompleta kiel aliaj vortaroj eldonitaj lasttempe kaj ŝarĝitaj per tro multe da neofte uzataj kaj eĉ nerekomendindaj vortformoj, sed provizas ĉefe praktikan referencan instrumenton por Esperanto-lernado kaj esperantaj laboroj.

Multaj balastaj vortoj estas forigitaj. Sed la komunajn vortojn kaj la ofte uzatajn teknikajn vortojn oni povas trovi en ĝi.

La plej aprobinda estas tio, ke ĝi kolektis kompare pli multe da aktualaj terminoj, precipe tiuj kiuj vaste cirkulas en la vivo de socialismaj landoj, ekz-e "agrikultura kooperativo", "socialisma reformo de agrikultura mastrumado" k. s. Ankaŭ la ofte uzataj esprimoj en ĝi estas pli multaj ol en la samampleksaj vortaroj.

Mi do povas diri, ke ĝi estas vortaro zorge kompilita sed ne simpla kopio de iuj aliaj vortaroj. Mi bedaŭras, ke mi ne scias la korean lingvon kaj mi nenion povas diri pri la korea traduko.

VEREN

VARSOVIO REKONSTRUITA —

Albumo pri Varsovio detruita kaj rekonstruita kun enkonduko priskribanta la historion de tiu fama urbo. Eldonita de la Eldonejo "Polonia", Varsovio, 1962. Formato 16 × 16 cm., 138 p.

Mi devas diri, ke tiu ĉi albumo estas malofta valorajo por esperantistoj. La bildoj montrantaj la aspektojn de la samaj lokoj post la detruo kaj konstruo estas tiel kontrastaj kaj elokventaj, ke ili ne bezonas iajn ajn superfluaĵajn klarigojn.

Ĉiam validan instruon oni povas eltiri el la ne tre longa sed

tre bona enkonduko, kiu rakontis kiel la hitlera reĝimo planis ekstermi la loĝantojn de Varsovio kaj la urbon "ebenigi kun la tero" kaj tion efektivigis. Antaŭ tiuj historiaj faktoj vole-nevole mi pripensas la predikon "estu pacemaj kontraŭ la agresaj fortoj".

Mi ne dubas, ke ankaŭ la pereintaj varsovianoj en la hitlera ekstermado estis pacemaj. Sed tion la agresantoj tute ignoris.

La rekonstruado de la detruita urbo certe plej bone montras la pacan deziron de la varsovianoj. Sed kio ebligis tion? Ĉu nur la paca deziro? Lasttempe mi legis la libron *Leteroj el Sud-vjetnamio*. Tiam mi pensis, ke kio okazus, se la sud-vjetnamoj celas nun nur al paca rekonstruado kaj ne kontraŭbatalas kontraŭ la subpremado de la imperiistoj kaj iliaj lakeoj. Ĉu la nunaj agresaj fortoj estus vere pli prudentaj ol iliaj antaŭaj majstroj?

La legantoj eble trovos la respondon.

Mi ripetas, ke tiu ĉi albumo estas malofta valorajo por esperantistoj. Oni ĝuu la belajn bildojn de la fama urbo kaj pripensu pri ĝia instrua historio.

Fine mi devas esprimi mian bedaŭron, ke al la ricevita recenza ekzemplero mankas la paĝoj 101-113, sed anstataŭe tie aperis ripete la paĝoj 61-72.

HONFAN

DISTRA KOKTELO — Kiel montras la titolo, la broŝuro estas kolekto de distraj materialoj. La enhavo estas dividita en "rakontoj kaj noveloj", "anekdotoj kaj informoj", "enigmoj kaj ŝako", "humorajoj" kaj "diversaĵoj". Ili estas kolektitaj el diversaj fontoj. Legajo utila por gajaj vesperoj aŭ enuigaj vojaĝoj. Ĝin eldonis la Aŭstria Esperanto-Junularo. Oni povas ĝin mendi ĉe la Aŭstria Esperanta Federacio, Vien 15. Funfhausgasse 16, Aŭstrio.



Vera Bildo de Faktoj

Estus superflue diri, kiel alte mi taksas "El Popola Ĉinio". Estas ĉiam granda ĝojo por mi kiam ĝi alvenas, kaj mi ne povas resti kontenta ĝis mi legis la tutan enhavon. Estas multaj mensogoj pri Ĉinio en nia gazetaro, kaj por akiri veran bildon de faktoj via Esperanta eldonaĵo estas granda helpo tiucele. Estas ĉiam granda ĝojo por mi legi ne nur la enhavon de EPĈ sed ankaŭ la bonan Esperanton per kiu la diversaj artikoloj estas skribitaj.

M. L. Mc. NAMARA,
NOV-ZELANDO

Ĉarmigo kaj Admiro

Krom la ebleco trovi per tiu revuo ligojn kun la tuta mondo, legante la tre belajn artikolojn kaj artikoletojn pri la nova ŝtato kun la tre malnova popolo ĉina, mi estas ĉarmita — per la grandaj sukcesoj de via popolo. Mi admiras la sanan dum jarcentoj provitan ĉinan karakteron, kiu nome gvidas vin al la feliĉo de la estonteco.

Mi tre ŝatas viajn opiniojn pri la literaturo, precipe tiun de la cent floroj . . . Kiel mi deziras aŭdi vin tiurilate ankoraŭfoje. Mi tre ŝatas ankaŭ vian specon de ĉina korpoekzerco — io tre grava por la korpo kaj kune kun tio — por la animo de homo.

H. G., BULGARIO

Fonto de Senperaj Sciigoj

Ni multe ekscias pri via lando el nia gazetaro, sed pli interesaj kaj enhavoriĉaj estas senperaj sciigoj. Kun kreskanta scivolo ni malfermas ĉiun numeron de EPĈ. Ĉiu leganto trovas en ĝi sian interesan objekton. Kelkfoje ni

profitas artikolojn por prezenti ilin en nia montrokesto. Intere son vekas aldonajoj en mezo de la revuo. Krome, la multaj artikoloj prezentas al ni vian landon tre detale tiel, kiel ni ĝin ne konas kaj alimaniere ne ekkonus.

Ankaŭ dum niaj renkontiĝoj ni elektas kelkajn facilajn legajojn por ekzerci la lingvon kaj samtempe satigi la scivoleon de la gekursanoj.

E-RONDO DE Z.W.E.
"ELTRA", POLLANDO

Scio pri Ĉinio

Jam de longe mi tre malhavis vian riĉenhavan kaj interesan dumonatan revuon. En ĝi oni trovas ĉion, kion oni devas scii pri via bela lando kaj ankaŭ pri Esperanto. Mi legas ĉiun artikolon detale, ĉar min treege interesas la vivo de la popolanoj ne longe liberigitaj de kolonia jugo, sed precipe Ĉinio, kiu havis faman prakulturon kaj kiu atingis la plej grandan evoluon inter la socialismaj popolaj respublikoj dum tre mallonga tempo. El viaj rakontoj kaj revoluciaj agadoj, oni povas dedukti ke la ĉina popolo estas tre konscia kaj tre inteligenta.

T. J., RUMANIO

Jen Nia Opinio

Ni ricevis nun numeron 2, 1964, kaj ni admiras la koloran fotografadon pri la ŝpinistino, la koloran ekspozicion de krizantemoj kaj la pentraĵon de Hju Kihjong "Floristino" kun du aliaj inoj.

Ni krome volonte legis la rakonton de Han Laŭhua — La Unua Leciono. Tiaj rakontoj plaĉas al ni.

VAN BENTUM, NEDERLANDO

Skribu pri Moroj, ktp

Min tre interesas via malproksima lando, kaj mi volus, ke la revuo "El Popola Ĉinio" pli multe skribu pri vialanda moro, pri viaj popolaj legendoj, proverboj, enigmoj, ktp. Bonvolu pli multe skribi pri belegaj lokoj en via lando, kaj, se estas, legendoj pri ili.

A. B., USSR

Pli da Historioj

Mi bonvenigas la publikiĝon — de tempo al tempo — de pli da historioj kaj eĉ prahistoriaj informoj pri Ĉinio. Ni scias ke ĉinoj inventis la paperon, kompason, pulvon, presadon kaj sian propran skribomanieron, sed ni ne scias multe pri tio krom la nova fakto.

W. F. ROLT, NOV-ZELANDO


Proponoj pri Esp-disaŭdigoj

Kiel vi scias, venontan jaron oni havos Universalan Kongreson de UEA en nia lando Japanio, Tokio. Do mi proponas al vi, ke via radio-disaŭdigo enmetu esperanto-programojn je tiu ĉi okazo. Ĉar oni bone povas aŭdi Peking-brodkaston en vasta parto de la mondo. Se tiu ĉi projekto havas eblecon eĉ iomete, bonvole informu tion al mi aŭ al japanaj esperantistoj kaj alilandaj esperantistoj, kiuj certe deziras esperantan disaŭdigon, kaj certe helpos je ĝia realigo.

MORIŜIMA TAKEO, JAPANIO

Mi deziras alvoki ĉiujn legantojn amase skribi leterojn postulate radio-disaŭdigojn de Ĉina Radio, ĉar tio estas la plej bona kaj plej akurata metodo de informado. Certe, se multaj homoj el la tuta mondo deziras tion, la direkcio de la koncerna radiostacio serioze pritraktos la problemon kaj kontentigos la bezonon. Mi opinias ke tiu bezono ekzistas, sed ĝi ne estas ankoraŭ elmontrita. Ni, la legantoj de "El Popola Ĉinio", elmontru ĝin!

I. A. BULGARIO



Mi kaptas la okazon por esprimi al vi mian profundan malkontenton pro la fakto ke preskaŭ ĉiuj (kompreneble nur tiuj al kiuj li skribis — Red.) el tiuj viaj abonantoj, kiuj publikigis en via revuo korespondinvitojn, kutime eĉ ne indikas (respondas — Red.) tiujn, kiuj akceptis ilian inviton korespondi, almenaŭ je simpla sciigo pri la ricevo de lia skribaĵo. Tia konduto ja estas malkorekta kaj ne povas ne mirigi kaj malplezurigi tiujn, kiuj fidis je la seriozeco kaj sincereco de ilia invito. Mi kredus do oportune, ke vi petus tiujn sinjorojn bonvoli esti pli ĝentilaj kontraŭ la samideanoj, kiuj akceptis ilian korespondinviton.

Agostino BRIZZI, Italio

Korespondi Deziras

Oni Plendas

Ĝis nun ni aperigas senpage sur nia gazeto laŭeble korespond-anoncojn de legantoj. Sed nun oni plendas kontraŭ la tre facilanimaj korespond-anoncintoj. La plendo estas tute prava, tial ni decidis ĝin publikigi ĉi tie. Tamen ĝi ne estas agrabla por nia senprofita servo. Ni do devas peti sincere ĉiujn sendantojn de tiaj anoncoj konsideri antaŭe la konsekvencojn kaj iel garantii plenumadon de la devo de korespond-anoncintoj. Tio ja koncernas la honoron de la anoncantoj mem, ankaŭ de nia gazeto. Ni donas fidon al la servopetantoj sed ne esperas misuzon de tia fido.

LA RED.

* Milos Ther, náměstí 9, května 78, Police nad Metují, Ĉeĥoslovakio, volus kor. kun ĉina s-ano pri popola vivo, kutimo, ktp. kaj interŝ. il. pk. kaj esp. gazetojn.

* Hioe Go-an (studento 22j), str. Malioboro 189, Gogjakarta, Indonezio, dez. kor. kaj interŝ. bk., pm., kun amikoj de Azio kaj Afriko.

* Junulara Esp-Rondo GUTO EN MARO ĉiam gvidas novajn kursojn por gejunuloj, do konstante estas serĉataj adresoj de eksterlandaj esp-istoj aĝe 14-25 jaroj. Garantias respondon kaj seriozan korespondadon. adreso: Junulara Esperanto-Rondo GUTO EN MARO, Poŝta Liceo, str. Grodzka 34, NOWY SACZ 2, Pollando.

* Eber Pacheco Barbosa, CX 1115, Belo Horizonte, Brazilo, par-donpetas al siaj gekorespondantoj, ĉar provizore ne povas plu korespondi pro la landa situacio.

* Geknaboj serĉas kor. kun nenajbaraj landoj. Petas kartojn, eĉ uzitajn, kun kristnaska aŭ novjara motivoj por ekspozicio. Ĉiu ricevos respondon. Krome ni premios la plej belan karton, la plej malproksiman sendinton, la plej fruan kaj la plej nombrajn sendaĵojn. Ne atendu decembron! Esperanto, lernejo, Bila Voda, okr. Usti nad orl., Ĉeĥoslovakio.

* * *

F. D. por Instruado, UEA, TYBURCJUSZ K. TYBLEWSKI, Jelenia Gora-Kesto 49, Pollando. akceptas ĉian esperantan libron por eduksciencaj celoj kaj estas preta rekompenci per egalvaloro en iu ajn akirebla eldonajo aŭ poŝtmarkoj.

* * *

* Bonvolu noti novan adreson de Azarov Viktor: Naberejnaja 67 kv. 47, Novorossijsk, USSR.

* George Shepherd, 318 Heaton Rd., Newcastle upon Tyne, 6,

Anglio, kun ĉl. pri internaciaj aferoj, instruado de Esp. k ĝia disvastiĝo, ŝako, etimologio, lingvoj.

*Kieva junulara Esp. grupo volas kontakti kun junularaj Esp-grupoj, organizoj, ktp. el tuta mondo. Adr: USSR, Kiev-3, ul. Vladimirskaĵa 45, Domo de Sciencistoj, Esp.-Sekcio (por junulara grupo).

*Ivan Daskalov, str. Botev 50, ur. Mezdra, Bulgario, 24j. pentristo k fotoamatoro, dez. kor. kun Ĉinio, Kubo, Izraelo, Argentino, Kanado, Vjetnamio, Japanio, Italio, Grekio, kc. k interŝ. esp-taĵojn, il. pk., librojn, fotojn ktp. Respondo garantiata.

*Jan Rezner, Glucholazy, ul. Kraszewskiego 35 a. pow. Nysa, Pollando, dez. kor. pri diversaj temoj k interŝ. bk., fotojn k etajn popol-artajn aĵojn. Mia 6j. knabo petas pri pm. Rekompence li povas sendi bk.

KOREKTO

En la 8-a linio de la dekstra kolono sur paĝo 101 de nia gazeto, n-ro 3 la teksto "...estis jam 95.6% plialtaj ol tiuj en 1950" devas estis legata "...estis nur 95.6% de tiuj en 1950".

TRI SAĜULOJ

— RAKONTO-ENIGMO —

Tri saĝuloj disputas inter si pri tio kiu el ili estas la plej saĝa. Iu preteriranto petite konsentis kontroli iliajn kapablojn.

“Rigardu al mi,” diris la homo. “Jen estas 5 ĉapoj, 3 nigraj kaj 2 blankaj. Nun fermu viajn okulojn!”

Tiam la preteriranto surmetis po unu nigran ĉapon sur ĉiun el la tri saĝuloj kaj enmetis la du blankajn en sian poŝon.

“Nun malfermu viajn okulojn!” li diris. “Kiu povos diveni la koloron de la ĉapo sur sia kapo, meritis la titolon la homo plej saĝa!”

La tri saĝuloj rigardis unu al la alia, kaj longe tiel staradis sed diveni neniu povis. Fine, unu saĝulo ekkriis: “Sur mia kapo estas ĉapo nigra!”

Kiel li povis tion eldiveni? Bonvolu pripensi kaj sciigi al ni kun detala rezonado!

Premio por la unua solvanto de ĉiu lando: unu ekz. de la “La Ora Hakilo”, grandformata multkolora presita bildrakonto.

Denove pri

SENPAGA EKZEMPLERO

de nia gazeto
al esperantistaj grupoj

Multaj E-istaj grupoj en diversaj landoj ĝuas en la kuranta jaro donacon de senpagaj ekzempleroj de nia gazeto por siaj membroj. Ni volas scii ĉu tia donaco devos esti daŭrigata en la venonta jaro kaj ĉu troviĝas ankoraŭ novaj E-grupoj, kiuj volas ricevi tian donacon. Ni do petas sciigojn de ĉiuj E-grupoj de ĉiuj landoj.

De la grupoj, kiuj ricevis niajn senpagajn ekzemplerojn, ni petas informojn ĉu la gazeto estis konstante montrita al la grupanoj kaj kiamaniere, kiom da ĝiaj mem-

TION DIRIS MIA PATRO

En usona juĝejo.

Juĝisto: “Kial vi strangolis vian tri-jaran frateton?”

Knabino: “Mia patro diris, ke oni strangolu tiun kiu ne obeas.”

Juĝisto: “Kio estas via patro?”

Knabino: “Laboranto en la Federacia Buroo de Esplorado.”

KIEL PUNI

Imperiestro demandis sian korteganon:

“Kiel oni punu mensogulon?”

“Detranĉu la orelojn de la homo kiu mensogojn kredas,” konsilis la kortegano.

TROMPI FORMIKOJN

Iu venis en butikon por aĉeti sukeron. La butikisto malfermis vazon kun la etikedo KAPSIKO.

“Sukeron mi volas,” diris la aĉetanto.

“Jes, sukero estas en la vazo.”

“La etikedo ja estas KAPSIKO, ĉu ne?”

“Tion oni faris nur por trompi formikojn,” diris la butikisto.

EL POPOLA ĈINIO

Dumonata gazeto eldonata de

ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 5 (88) 1964

Ĉefa Enhavo

Bildo sur la kovrilo — Danco de Kava-nacio

Foto de Huang Hiangkun

Popola Ĉinio 15-jara

Subtenon al la Vjetnama Popolo en Batalo kontraŭ la Usona Agreso

Usono Rompis la Ĝenevan Interkonsenton

Ĉinaj Esperantistoj Subtenas Vjetnaman Popolon

En la Dek Kvin Jaroj

La Pekina Opero Renovigas

Plej Gravaj la Kvalito

Konkero de la 14-a Plej Alta Monto Neniam Surgrimpita

Avo Ŝercemulo

Tri Vojaĝoj tra la Granda Kanalo

La Han-lingva Fonetika Alfabeto en Praktiko

Pekino — Hieraŭ kaj Hodiaŭ

Mi Kreskas en la Nova Ĉinio

Surpostene

Duafoja Vivo

Kuraĝo

Juna Ŝafistino

En la Sklava Vilaĝo

Vulpo, Simio kaj Aliaj

Kiel Mi Komencis Verki?

Pekina Opero

Dank' al Nia Patrio

Veĵcio

“La Sekreto de la Trezora Lagenario”

Kial Pekino Altiras Min?

Japana Amiko Parolas pri Medicino de Ĉinio

Japanaj Negrandaĵaj Entreprenistoj: Pri Ĉinio

Post la Kurso

Bildo sur la dorskovrilo — Nokto de Festo

Foto de Sun Kiaŭsen



B
E
L
A
J
Â
C
I
E
L
S
K
R
A
P
A
N
T
O
J

F
O
T
O
D
E
H
U
A
N
G
H
I
A
N
G

